NATIONALBIBLIOTHEK
IN WIEN
700163-D
PERIOD.

LIBERPENSULO 1925

Österreichische
Nationalbibliothek
Digitale Services

ÖNB
+Z60410809

# Liberpensulo

Oficiala Gazeto de la Internacia Ligo de Liberpensuloj

Estraro de Internacia Ligo de Liberpensuloj: Prezidanto: *C. F. Everts*, Alb. Cuyp-Str. 169, *Amsterdam* (Holando). Vicprezidanto: *Gustav Weigel, Bodenbach-Peiperz 14* (Ĉekoslovakio). Sekretario: *Kurt Hubricht* (Adreso: vidu apude). Kunsidanto: *M. Bartzsch*, Lochmannstrasse 4, *Leipzig-Stötteritz* (Germanio). Landreprezentantoj: Adresojn vidu sur lasta paĝo.

Sekretariejo: Kurt Hubricht Mariannenstrasse 22, I. Leipzig-Neustadt (Germ.) Poŝtĉeka numero: 43808 Leipzig

Gazetkomitato: K-doj *E. E. Yelland, E. R. Read, R. Wood*, K-dinoj *H. Halliday, T. Sujadinova*, ĉiuj en *Londono*. — Manuskriptojn bonvolu sendi al la gazetkomitato. Adreso: S-ino *T. Sujadinova*, 3 Fonthill Road, *London 4* (Anglio).


Represo de artikoloj permesata nur se oni citas la nomon de nia gazeto. Sendu du pruvekzemplerojn.

## ANTAŬEN!

Karaj Geamikoj!


Vi tenas en viaj manoj la unuan numeron de nia propra gazeto "Liberpensulo". Kelkaj, certe, diros: Ree nova gazeto....! Sed tiuj estas nur duone pravaj. Jam antaŭ la mondmilito ekzistis liberpensa bulteno eldonita de Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj. Vidu la bildon apude. Venis la mondmilito, kaj la nomita societo kaj la gazeto "Libera Penso" endormiĝis. Nia "Liberpensulo" estas nun kvazaŭ daŭrigo de "Libera Penso", kaj ni esperas, ke ĝi fariĝos la tribuno de la tutmonda liberpensularo.

Kun la apero de nia propra gazeto ni eniras novan epokon. Grandega estas nia tasko gajni niajn neesperantistajn sampensulojn kaj societojn por Esperanto. Ĝis 1923 ni ne vidis ian sukceson en la liberpensa mondo por Esp.o. Mi bone scias, ke jam dum la Internacia Liberpensula Kongreso en Buenos-Aires en 1906 oni akceptis rezolucion por Esp.o. Sed tio estis baldaŭ malatentita. Tiuj rezolucioj taŭgas nur por la paperkorbo.

Post la fondo je la fino de 1923 kaj dum la pasinta jaro 1924 nia Internacia Ligo de Liberpensuloj vigle propagandis la internacian helplingvan demandon inter la liberpensuloj; kaj ni devas diri, ke la sukceso, malgraŭ malgrandaj monrimedoj, estas atendinda. Per granda stabo de fervoraj kunbatalantoj ni sukcesis aperigi artikolojn pri Esp-o kaj pri nia Ligo en kelkaj naciaj liberpensaj gazetoj, nome: Atheist, Fruehling. Der Proletarische Freidenker, Der freie Geist, Mensch, Monistische Monatshefte, Kulturzeitung, (Germanio), Freigeist (Aŭstrio), Freier Gedanke (Ĉeĥoslovakio), Mysl Wolna (Polio), De Vrijdenker (Holando), L'Action Rationalist (Belgio), The Literary Guide (Anglio), The Crucible, The Truth Seeker (Ameriko), Bezboĵnik (Rusio), The Rationalist (Aŭstralio) ktp.

Kelkaj el la nomitaj gazetoj aperigas regule artikolojn en la rubriko "Esperanto-Servo". Du grandaj societoj fariĝis membroj de nia Ligo kaj subtenas nin mone, nome: "Ligo de Proletariaj Liberpensuloj por Rejnlando kaj Vestfalio" kaj "Ligo de Proletariaj Liberpensuloj de Ĉekoslovakio". Dum la kongreso de la proletariaj liberpensuloj en Vieno prof. Hartvig prelegis referaton pri Esperanto. Ni esperas atingi baldaŭ pluajn sukcesojn.

Nia kampo estas vasta. Ni petas, ke ĉiu Ligano kunlaboru en nia gazeto kaj



Jaro 1914. — N° 3. Marto

LIBERA PENSO

Oficiala Organo de la Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

NOVA KATEKISMO

CAPITRO KVARA

DIO

sendu raportojn, notojn, artikolojn, gazetojn, bildojn ktp. el la liberpensa movado de sia lando. Elektu E-an materialon de niaj F-aj kontraŭuloj kaj verku pri ili interesajn aferojn. Tiamaniere ni povos pruvi plej boue al niaj neesperantistaj sampensuloj la grandan valoron de Esp-o ankaŭ por la libera penso. Instigu viajn liberpensajn amikojn lerni Esp-on kaj vian societon aliĝi al nia "Internacio" aŭ almenaŭ, ke ili sendu al ni sian gazeton.

Nia morala stato estas sendube tre bona; sed ni ne devas ripozi. En aŭgusto 1925 okazos granda Internacia Liberpensula Kongreso en Pariso, la unua post la milito. Nepre tie ni devas ankaŭ batali por Esp-o en la intereso de la libera penso.

Kaj nun Esperantistoj-Liberpensuloj subtenu la movadon. Ne ekzistu flegmuloj inter ni. Ni tenu en memoro la fablon de Björnson: "Du ranoj, unu optimisto, la alia pesimisto falis nokte en poton plenan de lakto. Malgraŭ multaj penadoj, ili ne povis eliri. Fine la pesimisto ĉesigis sian penadon kaj dronis, sed la optimisto daŭre kaj vigle piedfrapis kaj kiam tagiĝis, li eksentis firman grundon sub siaj piedoj — li staris sur butero".

Do, antaŭen! *K. H.*

## La sankta jaro

De Kristnasko 1924 ĝis Kristnasko 1925 daŭros la "Sankta Jaro", aranĝita de la romkatolika eklezio. Papo Bonifacius VIII estas la fondinto de tiu festeno. Li promesis en sia papa dekreto de 22. aprilo 1300 absolvon de pekoj al ĉiu pilgrimanto kiu dum certa tempo vizitos almenaŭ unufoje tage la preĝejon de Petro kaj Paŭlo. Estis decidite aranĝi tian sanktan jaron unu foje en centjaro. Sed la riĉa enspezo, kiun donis tiu entrepreno al Romo kaj al la papo, kaŭzis, ke ĝi okazu pli ofte. Papo Klementio VI (1343) dekretis ke post ĉiu 50 jaroj la "Sankta Jaro" estu festata. Urban VI (1389) faris, ke oni festu ĝin post ĉiu 33 jaroj, kaj Paŭlo II (1470) — post 25 jaroj. Papo Aleksandro VI (1500) enkondukis specialan riton. Dum Kristnasko la papo iras en solena procesio en la preĝejon de Petro. Li frapas tri fojojn kontraŭ la murigita pordo de Petro. Nun la muro antaŭ la pordo estas forigata de masonistoj, kaj la pordo restas malfermita la tutan jaron ĝis 24. decembro 1925.

Bonifacius IX, vere komerca papo, komprenis ke multaj kredantoj pro multekosteco ne povas vojaĝi al Romo. Pro tio li sendis delegitojn, kiuj estis rajtigitaj doni plenan absolvon de pekoj al ĉiuj, kiuj pagos la trionon de la kosto de vojaĝo al Romo. Malgraŭ tiu plifaciligo, la kredantoj venis amase al Romo kaj en la "Sankta Jaro" dum Nikolaus V la ponto

700,163 - D Period.

trans la Tiber ne povis porti la amason da homoj; ĝi rompiĝis, kaj 200 homoj dronis.

Ankaŭ en ĉi tiu jaro la katolika mondo festas la "Sanktan Jaron" en eksterordinara maniero. La itala registaro subtenas per eldono de poŝtmarkoj, kies prezo estas je 50% pli alta, kio iros por la profito de la katolika eklezio. Jam deklaris sin multaj pilgrimantoj el ĉiuj partoj de la mondo. La tuta holanda episkoparo kaj multaj privataj holandanoj ĉeestos, por partopreni la solenon, en kiu la holandano Petrus Canisus estos nomota "sanktulo".

En nia tempo de scienco kaj tekniko, de la grandaj progresoj en ĉiuj fakoj de homa scio, tia faro, vere, estas ofenda por ni modernaj liberpensantoj kaj por homa intelekto ĝenerale. Superhoma laboro estas ankoraŭ necesa, por forigi superstiĉon.

En aŭgusto 1925 okazos granda Internacia Liberpensula Kongreso en Pariso. Ni esperu, ke la kunveno estos granda manifestacio kontraŭ superstiĉo kaj malsaĝeco. *K. H.*

# Bibliografio de Internacia Liberpensa Gazetaro

Post la mondmilito komenciĝis, speciale en la novaj respublikoj, vigla liberpensa movado. Tion pruvas la nun aperantaj liberpensaj gazetoj. Samtempe en kelkaj landoj, kiel Finnlando, Rumanio, ktp. pro diversaj kaŭzoj la liberpensaj societoj kaj liberpensaj gazetoj ĉesis ekzisti.

La liberpensa gazetaro havas kelke da tre bonaj presorganoj kun beletristiko kaj ilustraĵoj. Eldonado de la holanda gazeto "De Vrijdenker" (La Liberpensulo), por malgranda kredema lando kiel Holando, estas, sendube, granda laboro. Ĝi aperas semajne en granda formato, ofte ilustrata, kaj havas ankaŭ rubrikon "Esperanta Servo".

En Germanio estas, vere, liberpensa gazet-arbaro. Apero de tiom da liberpensaj gazetoj estas, laŭ mia opinio, nur malŝparo de tempo kaj de energio. Estus sufiĉe, se ĉiu flanko de libera penso havu saman presorganon. "Monistische Monatshefte" (Monistaj Monatkajeroj) oni, certe, povas nomi — gvidanta scienca organo de Liberpensula Mondo.

"Proletarische Heimstunden" (Proletaj Hejm-Horoj) celas disvastigi bonan literaturon; ĝi enhavas bonajn ilustraĵojn de famaj proletaj artistoj.


Notinda estas la nuntempe aperanta en Rusio gazeto "Bezboĵnik" (Sendiulo), kiu enhavas kolorajn ilustraĵojn.

Ankaŭ en Aŭstralio aperas jam de post unu jaro liberpensa gazeto "The Rationalist". Nia esperanto-gazeto "Liberpensulo" estas la plej juna inter la liberpensa gazetaro, kaj ni esperas, ke ĝi fariĝos la spirita rubando liganta la diversajn naciajn liberpensulojn.

En Ukrainio estas projektita gazeto "Bezvirnik" (Senkredulo) kaj en Japanio ankaŭ aperas liberpensula gazeto.

Sekvas nun bibliografio ankaŭ en bildo, montranta grandan parton da liberpensaj gazetoj kio, certe, interesos niajn legantojn.

Ĝis nun ne ekzistis tia bibliografio. Mi bone scias, ke la laboro ne estas kompleta; pro tio mi petas la kunhelpon de ĉiuj por kompletigi la bibliografion. Per starigo de ĉi tiu bibliografio ni pruvu al la liberpensuloj, ke nia Internacia Ligo de Liberpensuloj povas servi praktike al libera penso.




Post kiam la papo prelegis sian dekreton, la kretantoj ricevas inde la pilgrimantojn: ili plialtigas la prezojn.

### Anglio

*The Freethinker* (La Liberpensulo) Fondo 1881. Apero: semajna. Lingvo: angla. Formato: 22×34 cm. Eldonejo: The Pioneer Press (G. W. Foote and Co., Ltd.), 61 Farringdon Street, London E.C.4.

### Aŭstrio

*Der Freidenker* (La Liberpensulo). Fondo 1895. Formato: 31,5×47,5 cm. Apero: monata. Lingvo: germana. Eldonejo: Gustav Kness, Radetzkystr. 21, Wien III.

*Der Freigeist* (La libera penso). Fondo 1924. Lingvo: germana. Formato: 24×31,5 cm. Apero: monata. Eldonejo: Rud. Forberich, Wien, XVI., Hippgasse 9,

*Freundschaft* (Amikeco). Fondo 1922. Apero: monata. Lingvo: germana. Formato: 21×28 cm. Eldonejo: Selbstverlag des Salzburger Freidenker-Vereins, Salzburg, Arbeiterheim Paris Lodronstr. 21.

*Die Leuchtrakete* (La lumraketo). Humora gazeto. Fondo 1923. Lingvo: germana. Formato: 24×32 cm. Eldonejo: Wien IV., Mittelsteig 3a.

### Belgio

*L'Action Rationaliste* Fondo 1923. Lingvo: franca kaj vlama. Apero: monata. Formato: 27,5×36,5 cm. Eldonejo: Théo Debehogne, 26 rue de la Royauté, Laeken-Brux.

*La Pensée* (La Penso). Fondo 1906. Apero: semajna. Lingvo: franca. Formato: 36,5×55 cm. Eldonejo: Louis van Brussel, 70 rue de Canal, Louvain.

*Le Penseur* (La Pensulo). Fondo 1922. Lingvo: franca. Formato: 53×37 cm. Apero: monata. Eldonejo: M. A. Bovy, 79 rue Jonfosse, Liége.

*De Tribun* (La tribuno). Fondo 1914 Apero: monata. Lingvo: vlama. Formato: 36,5×54,5 cm. Eldonejo: And van Heugten, Geuzenstraat 13, Antwerpen.

### Ĉekoslovakio

*Freier Gedanke* (Libera Penso). Fondo 1921. Apero: dusemajna. Lingvo: germana. Formato: 24×32 cm. Eldonejo: Bund Proletarischer Freidenker in der Tschechoslovakischen Republik, Bodenbach, Peiperz. 14.

*Havliĉek* (Havliĉek estas la nomo de ĉeĥa poeto el la estinta jarcento). Lingvo: ĉeĥa. Praha II, Podskalska 51.

*Maják* (Lumturo). Lingvo: ĉeĥa. Vinokrady, Ruská trida 3.

*Matice svobody* (Patrino de la libereco). Lingvo: ĉeĥa. Lom u Mostu.

*Volna Myŝlenka* (Libera Penso). Lingvo: ĉeĥa. Praha II, Podskalská 51.

*Volne slovo* (La libera vorto). Lingvo: ĉeĥa Privoz, Sokolská 619.

### Francio

*La Libre-Pensée Française* (La Libera Penso). Fondo 1914. Lingvo: franca. Apero: monata. Formato: 28×38 cm. Eldonejo: Maurice Bonnardot, 96 rue de Lagny, Montreuil (Seine).

### Germanio

*Atheist* (Sendiulo). Organo de Komunumo de Proletar. Liberpensuloj. Fondo 1904. Apero: monata. Lingvo germana. Form.: 24×32 cm. Eldonejo: Verlagsanstalt Proletarischer Freidenker, Kösner Str. 15, Leipzig-Lindenau.

*Deutsche Kultur-Zeitung* (Germana kulturgazeto). Fondita 1924. Apero: semajna. Lingvo: germana. Formato: 31×44 cm. Eldonejo: Graetz & Co., Berlin C 25, Kaiserstr. 25.

*Der Freie Geist* (La Libera Spirito). Fondo 1918. Apero: monata. Formato: 23×29,7 cm. Lingvo: germana. Organo de Ligo de Württembergaj Liberpensuloj kaj Monistoj. Eldonejo: G. Sulzberger, Senefelder Str. 72b, Stuttgart.

*Freie Religion* (Libera Religio). Fondo 1921. Apero: monata. Form.: 18×24 cm. Lingvo: germana. Organo de Liberreligiaj komunoj kaj lokgrupoj de Popolligo por Spirita Libereco en Sudokcidenta Germanio. Eldon.: Biehl & Feuer, Mainz.

*Fruehling* (Printempo). Gazeto por la germana liberpensa junularo. Fondo 1924. Lingvo: germana. Formato: 22,6×28 cm. Apero: monata. Eldonejo: Emil Lehmann, Jakobistr. 26, Hannover.

*Kurier* (Kuriero). Fondo 1924. Apero: monata. Formato: 23,5×31,7 cm. Lingvo: germana. Presservo de Komunumo de la Proletariaj Liberpensuloj. Eldonejo: Gemeinschaft Proletarischer Freidenker, Kösner Str. 15, Leipzig-Lindenau. — La gazeto estas sendata senpage al la tuta proletaria kaj liberpensa gazetaro.

*Monistische Monatshefte* (Monistaj Monatkajeroj). Fondo 1916. Lingvo: germana. Formato: 15,6×23 cm. Apero: monata. Organo de Ligo de Germanaj Monistoj.




*Die Geistesfreiheit* (La Libereco de Spirito). Fondo 1921. Apero: monata. Formato: 24×31,5 cm. Lingvo: germana. Organo de Popolligo por Spirita Libereco. Eldonejo: Dr. Kramer, Jaegerstr. 3, Bochum.

*Der Gottlose* (Sendiulo). Sciigilo por la grupoj de la distrikto Freiberg de la proletar. liberpensuloj. Lingvo: germana. Formato: 32×24 cm. Eldonejo: Max Odrich, Freiberg, Hainichener Str. 60.

*Der Mensch* (La Homo). Fondo 1924. Apero: semajna. Formato: 15×21,5 cm. Lingvo: germana. Eldonejo: München, Lug ins Land 6, III.

*Mitteilungsblatt der Freireligiösen Gemeinde Leipzig* (Sciigoj de la liberreligia komuno Leipzig). Fondo 1924. Apero: monata. Formato: 16×23 cm. Lingvo: germana. Eldonejo: Karl Peter, Leipzig, Zeitzer Str. 32, III.

Eldon.: Hamburger Druckerei u. Verlags-Akt.-Ges., Abc-Str. 57, Hamburg 36.

*Der Pionier* (La Pioniro). Fondo 1924. Apero: monata. Formato: 23,5×31,5 cm. Lingvo: germana. Organo por la funkciuloj de Komunumo de Proletariaj Liberpensuloj. Eldonejo: Gemeinschaft Proletarischer Freidenker, Kösner Str. 15, Leipzig-Lindenau.

*Der Proletarische Freidenker* (La proletaria Liberpensulo). Organo: Ligo de Proletar.

Liberpensuloj por Rejnlando kaj Vestfalio. Fondo 1921. Lingvo: germana. Apero: monata, Formato 24×31,5 cm. Eldonejo: Bund proletarischer Freidenker, Essen (Ruhr), Steeler Str. 17.

*Proletarische Heimstunden* (Prolet. hejmhoroj). Fondo 1923. Formato: 15×23 cm Lingvo: germana. Apero: monata. Eldonejo: Verlag: Die Wölfe; Leipzig Plagwitz.

*Urania* (Uranio). Monatkajeroj por naturscio kaj sociologio. Fondo 1924. Apero: monata. Lingvo: germana. Formato: 17,5×25,5 cm. Eldonejo: Urania-Verlags-Gesellschaft, Jena.

*Vierteljahres-Mitteilungen des Vereins der Freidenker für Feuerbestattung* (Kvartalaj sciigoj de unuiĝo de la liberpensuloj por kremacio. Fondo 1905. Apero: kvartala. Lingvo: germana. Form.: 22×30 cm. Eldonejo: Berlin N O 18, Friedensstr. 60.

**Holando**

*De Vrijdenker* (La Liberpensulo). Fondo 1919. Lingvo: holando. Apero: semajna. Formato: 50×35 cm. Ateista Organo de la Liberpensul-Unuiĝo, "De Dageraad" = la aŭroro. Eldonejo: H. N. Luigies & Zonen, Lange Torenstraat 22—26, Rotterdam.

**Polio**

*Myśl Wolna* (Libera Penso). Fondo 1922. Lingvo: pola. Apero: monata. Formato: 15,5×23 cm. Organo de Societo de Polaj Liberpensuloj. Eldonejo: Myśl Wolna, ul. Krolenska 16, Warszawa.

**Rusio**

*Bezbojnik* (Ateisto). Fondo 1923, Lingvo: rusa. Apero: monata. Form.: 26×35 cm. Eldonejo:

**Svisio**

*Geistesfreiheit* (Libereco de la Spirito). Fondo 1922. Apero: monata. Formato: 35×25 cm. Lingvo: germana. Eldonejo: I. Wanner, Mythen Str. 9. Luzern.

**Aŭstralio**

*The Rationalist.* Fondo 1924. Apero: monata. Formato: 33×21,4 cm. Lingvo: angla. Organo de: The Rationalist Association of Australio. Eldonejo: I. S. Langley, Naples Road, Mentone.

**Usono**

*Freidenker* (Liberpensulo). Fondo 1871. Apero: semajna. Lingvo: germana. Formato: 27×36,5 cm. Eldonejo: Turner Publishing Co., New Ulm, Minnesota.

*The Crucible* (La fandvazo). Fondo 1910. Apero: semajna. Lingvo: angla. Formato: 60×38,5 cm. Eldonejo: The Crucible Publishing Co., 1330 First Ave, Seattle, Washington.

*The Truth Seeker.* Fondo 1873. Apero: semajna. Lingvo: angla. Formato: 28,5×40,5 cm. Eldonejo: The Truth Seeker, 49 Vesey-Street, New-York.

*Svobodna škola* (Libera lernejo). Lingvo: ĉeĥa. Oak Park, Ill. 1408 S. East Avennue.

*Vék Rozumu* (Epoko de la prudento). Lingvo: ĉeĥa. Chicago, Ill., 2000 Sv. Ashland Avennue.

# Kion vualas la Biblio?

de *Edward C. Saphin*

**Kun permeso de la aŭtoro el la angla lingvo tradukis** *Torĉo*

Pro la pretendo de Kristanoj, ke la Biblio estas revelacio, la mondo jam kovriĝis per sango kaj larmoj. Premado, persekutado, torturado kaj malpaco estis instigitaj kaj subtenitaj pro la deziro efektivigi personan aŭ sektan klarigon pri tio, kion la "revelacio" signifas. Tamen el la milionoj da homoj, kiuj jam konfesis kaj nomis sin Kristanoj, ne eĉ du individuoj estas troveblaj, kiuj interkonsentus pri tio kio estas "revelaciita".

Tio pruvas al senpartiaj pensantoj, ke estas neniu "revelacio" kaj tuj sugestas, ke la Biblio estis verkita por kaŝi kaj ne por malkaŝi.

Ke faktoj estis kaj ankoraŭ estas intence kaŝataj de sekretaj societoj kaj grupoj, ne povas esti refutataj. Signoj, simboloj, arbitraj signifoj por ordinaraj vortoj, ebligis kaj ĉiam ebligos al la iniciitoj paroli antaŭ la neiniciitoj kaj samtempe ne malkaŝi la "sekreton"; ĉar, kio estas dirata kaj kio estas aŭdata ne estas tio kio estas intencata.

Tre frue en la Biblio oni legas pri pastroj, kaj kie ajn estas pastro tie estas mistero. "Mistero" iras tra la Malnova kaj Nova Testamentoj, sed estas plej videbla en tiaj libroj kiaj Ezekielo kaj Danielo kaj la libro, kiu, sendube, estas ironie nomata la Libro de "Revelacio"... de Johano!!! Kristo en Marko iv. 11 diras, "Al vi estas donita la mistero de la regno de Dio"; kaj Paŭlo en I. Kor. ii. 7 diras, "Ni parolas la saĝecon de Dio en mistero". De Genezo ĝis Apokalipso estas mistero, kaj neniu pastro aŭ predikanto hodiaŭ kuraĝas nei, ke la mistero ekzistas, nek kuraĝas, aŭ povas, klarigi tion, kio estas la mistero. La Biblio pruvas kiel facile oni povas fari misteron el io kio estas evidenta kaj simpla. Estas la simpleco kiu mistifikas, kaj oni povas akiri monon daŭrigante la misteron, sed oni ne akiras monon klarigante ĝin. La Biblio estas fundamente la sekreta, alegoria scio de primitiva homaro pri la Naturo. Ĉiuj misteroj estas elpensitaj misteroj kaj klarigeblaj, se oni komparas ilin kun Naturo, kaj nur kun Naturo.

Unu glora natura objekto — la suno — per ĝia videbla irado trans la ĉielon klarigas jaron post jaro ĉiujn pretenditajn "supernaturajn" okazaĵojn "kronikitajn" en la Biblio. La supreniro kaj malsupreniro de la suno donas al ni la alternadon de tago kaj nokto, somero kaj vintro, semadtempo kaj rikolto. Tiuj klarigas ĉion kio bezonas esti klarigata kaj neebligas al ĉiu senpartia esploranto nei, ke Kristanismo estas intenca komercado sur fabrikita nescio kaj kredemo de homoj; aŭ nei, ke sub la vorto Kristo, la suno estas egale tiel adorata en Anglujo kiel ĝi estis, kaj estas, en Persujo. Nenia persono kia la Kristo de la kvar evangelioj iam vivis, aŭ mortis, aŭ reviviĝis. Kristo estas la suno, kaj la suno estas Kristo.

Ĉiu pretendita "fakto" en la vivo de "Kristo", kun liaj dekdu disĉiploj, havas sian paralelon en la ĉiujara irado de la suno tra la dekdu signoj de la Zodiako. La suno regas kaj reguligas la dekdu monatojn de la jaro. La nombro dekdu troviĝas tra kaj la Malnova kaj Nova Testamentoj, kaj ĉiufoje rilatas al la dekdu monatoj de la jaro.

Laŭ ĉiuj aŭtoritatuloj, la "signoj" datiĝas de la tempo de Homer, kiu, laŭ la aserto de kelkaj kleruloj, estis samtempulo kun Abrahamo. Ni ekzamenu la "signojn" kaj komparu ilin kun la kvar ĉefaj "okazintaĵoj" rilate al Kristo.

*La signoj estas —*

| | | |
|---|---|---|
| Aquarius | Akvoportanto | Januaro |
| Pisces | Fiŝoj | Februaro |
| Aries | Virŝafo | Marto |
| Taurus | Taŭro | Aprilo |
| Gemini | Ĝemeloj | Majo |
| Cancer | Kankro | Junio |
| Leo | Leono | Julio |
| Virgo | Virgulino | Aŭgusto |
| Libra | Pesilo | Septembro |
| Scorpio | Skorpio | Oktobro |
| Sagittarius | Sagpafisto | Novembro |
| Capricornus | Kapro | Decembro |

*La okazaĵoj estas —*

1. La Virgulina Nasko.
2. La Krucumo kaj Reviviĝo.
3. La Ĉieleniro.
4. La promesita reveno por juĝi.

*La Nasko*

Bedaŭrinde estas, ke la edukado al infanoj, kaj akirita dum juneco antaŭjuĝo malhelpas al homoj, ke oni legu, en ordinara kaj inteligenta maniero, la priskribon pri la naskiĝo de Kristo, kiel ĝi estas rakontita en la Biblio. Por konvinki iun cerbesanan personon, ke la rakonto estas absolute nevera, estas nur necese, ke la 'faktoj' estu verkataj en ĉiutaga lingvo. Oni sciigas al ni, ke iu vilaĝa virgulino kaj la vilaĝa ĉarpentisto gefianĉiĝis. Estas supozate, pro neceso, ke ilia konduto estis absolute neriproĉebla, kaj tamen estis evidente al la familioj de Josefo kaj Mario, kaj al najbaroj, ke io okazis. Josefo estis netrankvila, sed ne tre multe, ĉar li efektive edziĝis kun ŝi, sed li neniam plenumis la edzajn rajtojn "ĝis ŝi naskis sian unue- naskitan filon". Iu ajn junulo nepre dezirus iun mortigi, sed Josefo ŝajne konsentis kun la pozicio; kaj eĉ la najbaroj, en tiu ĉi okazo, ne mortigis per ŝtonoj, laŭ ordono en Readmono xxii. 21, la filinon de Izraelo, kiu faris malsaĝaĵon.

Antaŭ nur kelke da jaroj en ĉi tiu lando iu pastro — Smith Pigott — penis altrudi al ni similan rakonton, kaj la Eklezio metis sin en ridindan pozicion kondamninte lin. Ĉar estas ja decidite de la Eklezio, ke estas blasfemo diri, ke tio povas okazi en la dudeka centjaro, kaj samtempe estas blasfemo nei, ke tio ja okazis en la unua centjaro. Estante senpartiaj legantoj ni asertas, ke tio neniam okazis, kaj la Hebreoj kiuj estis tie tiutempe neadis, ke tio okazis.

Aparte de la terura kulpigo kiun la rakonto metas sur "Dio" — ĉar ja ne povas esti unu grado de moraleco por homo kaj multe malpli alta grado por dio — oni devas memori, ke ĉiuj dioj de antikveco estas "naskitaj" laŭ precize similaj cirkonstancoj. Ne estas "respektinde", ke homoj estu naskitaj ekster edzeco, sed neniu respektinda dio estis iam naskita alie. Nur kiam oni konsideras, ke la suno estis la "dio" kaj, ke la suna jaro komenciĝas je 12-a horo noktomeze la 24-an de Decembro ĉiujare kiam la stelaro Virgulino estas ĉe la horizonto, tiam oni povas trovi ian racian signifon en la rakonto. Alegorie ĝi sanktigas ĉi tiujn faktojn en la Naturo; religie ĝi insultas inteligentecon kaj degradas moralecon.

Oni instruis en antikva Egiptujo, ke la suna jaro komenciĝas je la momento kiam la suno atingas sian unuan gradon de supreniro la 12-an horon noktomeze la 24-an de Decembro ĉiujare. Je tiu momento la pastroj aperigadis la infanon Horuso, kiu, ili diradis, estis trovita en la brakoj de sia Virgulina patrino Isis. Tute same, pli poste, la Kristanaj pastroj diris, ke Jesuo estis naskita de Virgulino la 25-an de Decembro; tio pruvas la identecon de la du kultoj kaj, ke Kristo ne estas la originala aŭ la sola "Dio" virguline naskita.

La dogmo pri la virgulina nasko, kiel dirite en la Evangelio de Mateo, recitata en la Kredoj kaj instruata en lernejoj kaj preĝejoj, degradas "Dion", endanĝerigas virinojn, amuzas virojn, kaj senmoraligas geknabojn. Moralo kondamnas ĝin, racio malakceptas ĝin, scienco ignoras ĝin, kaj la pastroj vivadas per ĝi. Pastroj povas vivadi per ĝi nur se ili vualas la fakton, ke, kiel astronomia alegorio, ĝi estas ĝuste vera kun fakto. Ĉar de ĉirkaŭ la dato, alskribita al la Eliro, ĝis la komenciĝo de la "Kristana" ero, la stelaro, kiu leviĝas en la oriento je la 12-a horo noktomeze la 24-an de Decembro, estis la stelaro Virgulino; kaj la pretendata nasko okazis ĉe Betlehemo, kiu signifas „la domo de Pano", kaj tiu sama Virgulino estas la signo por Aŭgusto, kiu estas la monato de la grenrikolto.

Ĉar la tagoj estis mallongaj, la noktoj longaj, la atmosfero malseketa kaj malvarmeta, kaj la suno aspektis tiel senpova kiel infano, la pastroj farante alegorion personigis la sunon kaj stelaron, dirante, "Jen la infano Savanto en la brakoj de la virgulina patrino" — blasfeme sugestante, ke Dio povas havi patrinon, se iam povus ekzisti tia estaĵo!!! Al la neiniciitoj ĉi tio estis "senvualigata" en formo de miraklo, kaj ili nescie kaj facilanime kredas de post tiam, ke tio ja vere okazis, kaj ili ne rimarkas (kio ne bezonas ian "senvualigon"), ke tio okazas ĉiujare.

Ektrompinte per alegorio, la pastroj estis devigataj daŭrigi la fraŭdon. En la kvar evangelioj, kiuj estas permesitaj atingi nin (el pli ol sepdek laŭscie ekzistintaj) ni povas sekvi, turnante nin al la Zodiako, la evoluon de la rakonto en la sinsekvo de la monatoj kaj sezonoj de la jaro. Januaro, la "malfermanta" monato de la jaro, montriĝas en Kristanismo kiel Petro kun la ŝlosilaro ĉe sia zono, precize kiel Januso, la pordisto aŭ gardanto de la ŝlosilaro, montriĝas en la mitologio de antikva Romo. D.ro William Smith diras en "The Smaller Classical Dictionary" (La plimalgranda Klasika Vortaro) paĝo 225, Artikolo Januso: "Li prezidis la komenciĝon de ĉio. Li malfermis la jaron kaj la sezonojn. Li estis la Pordisto de ĉielo."

Februaro estas la monato de fiŝoj, kaj la disĉiploj de Kristo estis fiŝkaptistoj. Pastroj "senvualigas" al ni, ke ni devas fasti je viando dum tiu ĉi tempo de la jaro por plaĉi al "Dio", sed ili ne mencias, ke en la epoko kiam riĉeco estis kalkulata laŭ posedo de ŝafoj kaj bovoj, kaj ĉiam la sezono de ŝafidnaskiĝo kaj bovidnaskiĝo estis proksime — Marto kaj Aprilo —, ke estus ne nur malŝpare, sed abomene mortigi dum ĉi tiu tempo kaj, ke prudento kaj dececo postulas abstinencon de bovoviando kaj ŝafviando.

*La krucumo kaj Reviviĝo*

Marto estas la monato de la Virŝafo, kaj la 21-an de tiu monato ĉiujare la suno dum sia supreniro krucumas la linion de la ekvatoro, farante tagojn pli longajn ol noktojn, kaj vokante Naturon el la morto de vintro al la reviviĝo de printempo kaj la promeso de rikolto. Tiu ĉi fakto en Naturo estis celebrata kiel la Festo de Pasko centojn, se ne milojn, da jaroj antaŭ la alveno de la pretendata fondinto de Kristanismo. Ke Pasko estas pagana Sunfesto ne povas esti neata de iu kiu legas la Libron de Komuna Preĝado, por trovi kiel fiksi la daton de Pasko. "Paska Dimanĉo" devas esti la unua Dimanĉo post la unua plena luno post la 21-a de Marto". Pro tio estas en la monato de Marto (monato de la Virŝafo) kiam la suno kruce transiras la linion, ke pastroj diras "Jen la Virŝafo de Dio, kiu forprenas la pekon (aŭ malbonon) de la mondo", kaj "Estas vivo, se oni rigardas al la krucumito." Ĉion ja ili diras sen rideto. Kaj plenaĝuloj aŭskultas al ĉio sen la sento de honto. Astronomie la dirajoj estas tiel veraj kiel vidado, kaj tiel pruveblaj kiel scienco, sed dogme kaj religie tiel falsaj, kiel pastra politiko kaj tiel malvirtaj kiel bigoteco.

*La ĉieleniro*

Por ke li supreniru en la ĉielon antaŭ la okuloj de siaj disĉiploj, oni rakontas al ni, ke Jesuo rajdis en Jerusalemon sur du azenoj. En la monato de Junio, en ĉiuj landoj norde de la ekvatoro, la suno atingas sian plej altan punkton antaŭ la okuloj de ĉiuj homoj; kaj du el la steloj en la stelaro Kankro estas konataj, el tempo prahistoria, kiel la Azenoj. Ĉu faktoj povas esti pli klaraj aŭ demonstrado pli kompleta?

*La promesita reveno de kristo aŭ reveno por juĝi*

Antaŭ la pretendata morto de la pretendata Savanto, estas dirite, ke li promesis al siaj disĉiploj reveni denove, sed por esti juĝisto, kaj por apartigi la ŝafojn de la kaproj; aŭ, kiel la verkinto de Apokalipso xxii. 12 diras, por "repagi al ĉiu laŭ lia faro". Tio neniam estas plenumita de la Kristo de la Evangelioj, sed la suno ĉiujare je la 21-a de Septembro, en la signo de la pesilo, ja efektive donas al ĉiu laboranto laŭ lia laboro (ĉar kiam tiu ĉi mito originis, ĉiu laboranto estis terkulturisto). Kiel li prilaboris la grundon kaj semis en la printempo, tiel li rikoltas. Oni tre bone scias en la kamparo nuntempe, ke la farmisto "kiu bone prilaboras sian grundon" rikoltas eĉ en "malbona sezono" kaj, ke la farmisto, kiu „ŝvitigas" sian grundon, neniam restos longe sur la sama farmbieno. Kiel oni semas tiel oni rikoltos.

Ĉiuj mirakloj de Jesuo estas klarigeblaj sammaniere — malvarmo, mallumo, malvarmeta vintra vetero ĉiam naskas malsanon; sed sunbrilo estas la granda sanigisto de malsanuloj kaj afliktitoj. En la mallumo la homo estas blinda, sed la leviĝo de la suno malfermas la blindajn okulojn. Nenia dio, homo, dihomo, aŭ hom-dio iam nutris 5 000 aŭ 7 000 homojn per kvin panbuloj kaj du fiŝetoj; sed la suno, pligrandigante al ni la rikoltojn de tero kaj maro, faras tion ĉiujare kaj satigas nin per manĝaĵoj kaj niajn korojn per ĝojo. Ĉiufoje, kiam la suno donas al ni la tritikan rikolton, ĝi instigas al ni, ke ni kolektu dekdu korbojn plenajn — restantaj post la rikolta festo. Se ni ne kolektus dekdu korbojn plenajn, unu por ĉiu monato kiu devas pasi antaŭ la suno refaras tiun ĉi grandan laboron en Naturo, ni mortos pro malsato. Per alegorio ruzaj pastroj ludis artifikojn kontraŭ malavara Naturo kaj vualis la glorojn de la universo, por ke ili povu altrudi sian supernaturan nenion-sciadon al siaj kredemaj viktimoj.

Esploratâj laŭ tiu ĉi vidpunkto la faktoj amasiĝas ĉiuflanke por konfirmi la sunan originon de la Kristana religio. En sia arto la Eklezio pentras, kaj en siaj ritoj imitas, la diversajn fazojn de la suno en ĝia ĉiujara videbla vojaĝo. Ĝia fenestraro el varikolora vitraro, ĝiaj skulptitaj, broditaj, aŭ forĝetitaj altaraj frontoj, drapiraĵoj kaj muraj ornamaĵoj, montras ripete la centraĵon "ŝafido kaj flago" subtenatan de viro kaj virbovo unuflanke, kaj de leono kaj aglo aliflanke — ĉiuj estas signoj de la zodiako. La Eklezio, por helpi al si en la pretendo ke Kristo triumfis kontraŭ la Skorpio (tiu maljuna Serpento la Diablo), forigis la emblemon kaj anstataŭigis ĝin per Aquilala Aglo.

Kiam ajn Kristo aŭ iu el liaj disĉiploj estas pentrata, ĉu sole ĉu en grupo, ili ĉiam estas distingataj per "aŭreolo" aŭ "nimbo", kopiita el Egiptujo, Grekujo kaj

Romo, kies antikvuloj ĉiam bildis tiel siajn sunajn diojn.

En multaj preĝejoj kiam oni recitas sian kredon, oni turnas sin al la oriento, ĉar la suno leviĝas ĉe la oriento.

La ĉefa tago de la Eklezio estas "Suntago" (Angle "*sun*day", Esperante, Dimanĉo, Germ. *Sonn*tag).

Ili kantas marŝante procesie ĉirkaŭ la preĝejo, tiel imitante la rondiron de la suno tra la dekdu signoj de la Zodiako.

La "tonsuro" aŭ kutimo razigi al si la kapon, por doni formon de la suno, estas farata de pastroj ankoraŭ en la dudeka centjaro same kiel faris la pastroj en la dudeka centjaro antaŭ Kristo, kaj por la sama celo — por honori sian dion — la sunon. La blanka surpliso estas kopiita el antikva Egiptujo.

La eklezia ĉifro I. H. S. estas vere la ekvivalento de nia I. E. S. — la signo de la Greka dio Kakuso, kies "historio" estas konfesata esti mito pri la suno. La Greka I. aŭ I. E. S. veninta al ni tra la Latina lingvo alprenis la Latinan finiĝon "us", kaj tiel la nomo "Jesus" estis anstataŭita por Bakuso, kaj ĉiu altaro titolata I. H. S. estas altaro starigita al la suno, kaj ĉiu adoranto ĉe tia altaro estas adoranto de suno.

Esplorantoj scias, ke la kruco ne estas Kristana simbolo. Ĝi estas de falika origino, kaj neniu deca homo, kiu komprenas la signifon kaŝitan en ĝi publike portus ĝin.

Kiom longe ankoraŭ la homoj permesos ĉi tiun ŝajnigon, ĉi tiun arlekenadon, ĉi tiun trompon esti la reganta influo en civilizita lando? Ni atendas honestecon ĉe servistoj, ĉe laboristoj, ĉe skribistoj kaj komercistoj. Kiam kunigos sin la homoj por postuli ke la pastraro estu tiel honestaj, kiel aliaj komercistoj? Kiom longe ankoraŭ estos permesataj tiuj ĉi vendistoj de pia sensencaĵo ŝajnigantaj, ke ili preparas pentantajn personojn por iu problema paradizo, erarigi la plastikajn cerbojn de geknaboj kaj gejunuloj per la regado kaj administrado de publikaj lernejoj? Dum miloj da jaroj pastroj nenion novan lernis aŭ eltrovis en sia speciala fako. Tamen la pastraro postulas, kaj estas permesata, direkti la edukadon de la publiko. Dum centoj da jaroj la pastraro, mem sciante nenion kaj timante scion ĉe aliaj, punadis esplorantojn kaj elpensantojn, torturis tiujn, kiuj rezonis, kaj martiris scienculojn.

Se vera progreso estas farota, ĉio, kio estas nekonata, nesciebla kaj nekomprenebla, devas esti malpermesata pli longe vuali, malhelpi, kaj kontraŭstari la scion kaj utilaĵon. Konsiderante, ke neniu homo scias ion pri iu postmorta vivo, oni devas koncentriĝi sur tiu ĉi vivo, igi ĝin vivinda kaj aminda tiom kiom la riĉeco kaj beleco de Naturo permesas al ni. Ĉiu honesta cerbesana homo devas decidi, ke al ili ne estos eble por la nekonata superombri la konatan; la mito anstataŭi la realon; por kredoj dividi, aŭ per "dioj" timigi, sed super ĉio oni devas kompreni, ke ĝis kiam "Dio" ne estos mortinta, homoj ne komencos vivi.

# MONGOLIO

## Kiaj ĉarlatanoj ja estas reprezentantoj de dio.

Iam, laŭ sia kutima kontraŭ natura vojo, dio komunikis al mongoloj, loĝantaj en Mongolio, apud Siberio, ke al li plaĉas, ke mongoloj manĝu nur bestojn mortintaj, ne mortigitajn. Ordono sankte de mongoloj plenumata.

La grandan monaĥejon de lamaitoj en ĉefurbo Urga dio bonvolis ĉirkaŭi per rusaj, ĉinaj magazenoj, feltdomoj de migruloj, kurigi aŭtomobilojn tra la dezerto Gobi de Urga ĝis Pekino kaj reen. Por tio li ankaŭ provizis rimedojn. En granda palaco loĝas "Korpigita dio" mem la lamao Bogdo Gegenne, kiel ĉe ni papo de Romo. Fanatike fidelaj al dio, la mongoloj aĉetas de monaĥoj, servantaj al "enkorpigita dio" liajn ekskrementojn je valoro de oro. Tiuj, laŭ ilia kredo, havas povon kuraci malsanojn.

Eble ĉi tiu kuracilo kune kun la eŭropa malsano al ili alportita de kristanoj, jam dum kelkaj jarcentoj tenas la loĝantaron de Mongolio en la sama nombro. Ĝi neniam superis unu milionon.

*T. Sujadinova*

## Leĝoj pri geedziĝo kaj eksedziĝo en Sovetlandoj.

Depost la apartigo de eklezio de regno ĉiuj religiaj ceremonioj, inter ili ankaŭ la tiel nomata "koronado" (edziĝsoleno) ne havas ian juran signifon. La geedzigo plenumita de pastroj ne estas malpermesata; sed ĝi ne kreas ian rajton kaj devon por la tiel geedzigitaj, se ili ne registras la geedziĝon en registrejo por civitana stato.

Escepto ekzistas nur por tiaj geedziĝoj, kiuj estas kontraktitaj antaŭ 20. dec. 1917 laŭ la ĝis tiam ekzistantaj leĝoj. Ĉiu geedziĝoj kontraktataj post ĉi-limtempo devas esti registrataj civite.

Geedziĝi povas nur personoj atingintaj la "geedziĝaĝon", t. e. por virinoj 16 jaroj, por viroj 18 jaroj. La geedziĝo povas okazi nur je reciproka konsento de la gefianĉoj. Geedziĝi ne povas personoj jam troviĝantaj en jura geedza stato, kaj parencoj. Diference de malnova reĝimo, diversreligianeco kaj promeso de needziĝo ne malhelpas civitanan geedziĝon.

En multaj urboj de Sovetlandoj la gefianĉoj devas ĉe geedziĝo per subskribo atesti, ke li laŭvere informis unu la alian pri ilia sanstato rilate seksajn malsanojn.

La nunaj leĝoj pri eksedziĝo tre diferencas de la antaŭrevoluciaj. Depost 20. decembro 1917 kiel bazo por eksedziĝo povas servi ambaŭa konsento de la geedzoj kiel ankaŭ la nur unuflanka deziro, disiĝi, nenomante la motivon.

Se la persono petanta disigon ne scias la loĝlokon de alia parto, tiam popola juĝejo publikigas pri la afero.

Post dumonata limtempo povas okazi la disigo. Plendo pri kazacio de la disigo estas akceptata nur dum dusemajna limtempo.

Je ambaŭa konsento de la geedzoj la disigo povas okazi ankaŭ en registrejo por civitana stato, sen iaj limtempoj. La eksedziĝo estas registrata, pri kio la iamaj geedzoj ricevas koncernajn atestojn.

Tiuj leĝoj pri eksedziĝo koncernas ankaŭ ĉiujn geedziĝojn kontraktitajn antaŭ 20. dec. 1917 per ekleziaj kaj religiaj ceremonioj.

*H. Frank, Leningrad.*

(El la esp.-gazeto "Sennaciulo").

## Landreprezentantoj.

Anglio: S-ino Sujadinova-Yelland, 3 Fonthill Road London N.
Aŭstralio: S-ro Victor Rutland, 316 Riley Street, Surry Hills, Sidney.
Aŭstrio: S-ro Otto Stöber, Humboldtstraße 46, Linz a. Donau.
Bulgario: S-ro Iv. Sarafov, Pleven [Progrimnazio].
Ĉeĥoslovakio: S-ro Theodor Kilian, Jiráskova 317, Dolni Kounice.
Ĉinio: S-ino Violet Mitchel, 110 Greenwood Road, London E 8.
Danzig: S-ro Kurt Klaps, Karpfenseigen 10, II, Danzig.
Germanio: vidu Estraro (unua paĝo)
Hungario: S-ro Hugai Ferenc, Gyöngyös.
Japanio: S-ro Raitaroo Munemura, Nagoja, P. O. Box 3.
Jugoslavio: S-ro Paskal Bogdanoviĉ, Komixa-Vis.
Litovio: S-ro Lindas Alseika, Biržai.
Nederlando: vidu Estraro. (unua paĝo)
Polio: S-ro J. Szpacenkopf, Willa Eugenja Ciechocinek.
Ukrainio: S-ro G. Tuisoo, Kremenĉug-Pesĉana-Gora, Maksimovski 3
Usono: S-ro Karl Fröding, 419, 7 th. st., Rockford, Ill

La landreprezentantoj prizorgos la aferojn en sia lando. Ili estas ankaŭ rajtigataj alpreni kotizojn.

**Vi subtenas la movadon se vi pagas tuj!**

NOVAJ TEMPOJ
Internacia pedagogia revuo por la nova lernejo
Oficiala organo de TAGE
Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistoj
Demandojn kaj abonon sendu al:
**M. Goldberg, Klemmstr. 14 p., Leipzig - Connewitz (Germanio).**

Eldonejo: Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, Leipzig-Neustadt (Germanio). — Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio).

1-a Jaro, Numero 2 Dumonata Marto—Aprilo 1925

# Liberpensulo

Oficiala Gazeto de la Internacia Ligo de Liberpensuloj

Estraro de Internacia Ligo de Liberpensuloj: Prezidanto: *C. F. Everts*, Alb. Cuyp-Str. 169, *Amsterdam* (Holando). Vicprezidanto: *Gustav Weigel, Bodenbach-Peiperz 14* (Ĉekoslovakio). Sekretario: *Kurt Hubricht* (Adreso: vidu apude). Kunsidanto: *M. Bartzsch*, Lochmannstrasse 4, *Leipzig-Stötteritz* (Germanio). Landreprezentantoj: Adresojn vidu sur lasta paĝo.

Sekretariejo: Kurt Hubricht
Mariannenstrasse 22, I.
Leipzig-Neustadt (Germ.)
Poŝtĉeka
numero: 43808 Leipzig

Por membroj senpage. La kotizo por la Ligo esta laŭ plaĉo, sed minimume gmk. 1.50 aŭ sama valoro Manuskriptojn bonvolu sendi al la gazet komitato. Adreso: S-ino *T. Sujadinova*, 3 Fonthil Road, *London N 4* (Anglio).
Represo de artikoloj permesata nur se oni citas la nomon de nia gazeto. Sendu du pruvekzemplerojn

## Alvoko al la naciaj liberpensulaj organizaĵoj

En nia movado ekzistas nuntempe tri internaciaj organizaĵoj: La "Fédération Internationale dès Sociétés de Libre Pensée", la Svisa Internationalo (kiu enhavas preskaŭ nur germanlingvajn societojn, kaj estas eble, ke baldaŭ ĝi malaperos) kaj venontan Pentekoston oni fondos en Ĉeĥoslovakio la "Proletarian Internacion de Liberpensuloj". La ĝis nun ekzistantaj societoj laboris nemulte, precipe dum la lastaj dek jaroj ili ekzistis nur sur papero.

Nia Internacia Ligo de Liberpensuloj, kiu uzas Esperanton por siaj interrilatoj, ne povas kaj ne volas forigi la nomitajn internaciajn societojn, tute ne. Kontraŭe, ni salutas la fondon de la proletara liberpensula Internacio, ankaŭ la grandan kongreson de la Fédération Internationale dès Sociétés de Libre Pensée kiu okazos en Parizo dum Aŭgusto, kaj esperas, ke de nun estos nova aktiveco post longa dormo.

Pro diversaj kaŭzoj ne estas eble nur unu Internacio. Ni ne plu malkoncentrigu la fortojn, sed kunigu ĉiujn energiojn. La tutmonda liberpensularo priatentu jenajn liniojn.

En nia epoko kiam regas ideoj internaciaj, la nepra devo de liberpensuloj estas alpreni la neŭtralan lingvon Esperanto por internaciaj rilatoj. Ĝis nun mankis gazeto por raporti pri la tutmonda liberpensulo movado.

Al tiu celo nia Internacia Ligo de Liberpensuloj faris fundamenton. Nia Ligo uzas la internacian lingvon Esperanto en kiu ĝi eldonas gazeton "Liberpensulo", destinata fariĝi la centra presorgano de ĉiulandaj liberpensuloj.

Nia Ligo havas membrojn tra la tuta mondo, eĉ tie, kie ne ekzistas liberpensulaj societoj, nek liberpensulaj gazetoj. La fondo de la Internacia Ligo de Liberpensuloj kaj de nia gazeto "Liberpensulo" estis rezulto de firma volo praktike servi al libera penso.

Ni petas, ke la naciaj liberpensulaj societoj subtenu nian movadon por sia propra intereso (jam du grandaj organizaĵoj liberpensaj aliĝis al la Ligo).

Laŭ sperto ni vidas, ke niaj kontraŭuloj tre bone komprenas la valoron de Esperanto por disvastigi siajn ideojn. Ankaŭ ni liberpensuloj, kiuj konsideras sin progresemuloj, devas ne ignori tiun vojon de propagando.

Dum la venonta internacia kongreso de liberpensuloj en Parizo ni denove levos la demandon pri Esperanto; sed ni ne bezonas rezolucion, kiu restos nur sur papero. Jam en 1906 ĉe Buenos-Aires dum liberpensula kongreso oni rezoluciis por Esperanto. Ni bezonas agojn ne parolojn.

Nia Internacia Ligo de Liberpensuloj estas por nia liberpensula movado k o n c e n t r i ĝ o d e f o r t o j. Pro tio estas konsilinde ke ĉiu tuj aliĝu al ĉi tiu internacia Ligo kaj efektivigu la devizon de Ostwald: "Ne malŝparu energion, sed uzu ĝin."

## La bavara Konkordato

En multaj germanaj gazetoj precipe en instruistaj gazetoj ni legas en longaj ĉefartikoloj pri lernejpolitika afero okazanta nuntempe en Bavarujo. Ĝi nomiĝas "La bavara konkordato". Konkordato estas kontrakto de registaro kun la papo. La germana historio montras multajn konkordatojn. Per ili oni volis ĉesigi la tamen ĉiamajn bataladojn inter la Vatikano kaj regantoj de Germanlando. La lasta estis kontraktita en 1817 inter la bavara ŝtato kaj la Vatikano, la revolucio de 1918 nuligis ĝin. Poste la Sankta Kurio sendis al München la nuncion Pacelli, kiu sukcesis fini longdaŭrajn konkordatajn traktadojn kun la bavara registaro. Li vojaĝis Berlinon ŝajne por prepari tie konkordaton kun la germana regno. Ŝancon sukcesi la kurio havis nur en Bavarujo, ĉar tie du trionoj de la loĝantaro estas katolikaj. Por plene certigi ĝin, registaraj partioj de Bavarujo favoraj al konkordato subtenis kontrakti samtempe kun la du protestantaj eklezioj, al kiuj oni volas koncesii samajn rajtojn kiel al la katolika eklezio.

La18-an de Novembro la bavara registaro prezentis al la bavara parlamento kontraktojn inter la registaro kaj la kurio kaj la du protestantaj eklezioj en Bavarujo kaj Pfalz (elp. pfalc). La plej grava el ili estas la "Konkordato".

La bavara ŝtato garantias liberan kaj publikan praktikadon de la katolika religio. Ĝi aprobas la rajton de la eklezio doni leĝojn kaj fari aranĝojn en la kadro de sia kompetenteco, kaj garantias al la katolika eklezio neĝenatan liberecon de kulto ktp.

Nin interesas precipe la paragrafoj koncernantaj la popolan lernejon. La konfesieco ludas le ĉefrolon.

Paragrafo 5: 1. La instruado kaj la edukado de la infanoj en la katolikaj popollernejoj estas konfidataj nur al tiaj geinstruistoj, kiuj estas taŭgaj kaj volaj instruadi en konfidinda maniero la katolikan konfesion kaj eduki laŭ la spirito de la katolika kredo.

2. La geinstruistoj, kiuj volas ricevi oficon en katolikaj popollernejoj, devas pruvi antaŭ sia enoficiĝo, ke ili perfektiĝis laŭ la karaktero de tiuj ĉi lernejoj. Tiu perfektiĝo devas rilati kiel al la religia instruado tiel ankaŭ al tiuj fakoj kiuj estas gravaj por la kredo kaj la moroj. La donado de religia instruado bezonas la "Missio Canonica" de la diocesa episkopo.

3. Garantiigo de konforma klerigo de geinstruistoj.

4. Konforma reprezentado de la eklezio en la ekzamenaj komisionoj donantaj la rajton instrui en katolikaj lernejoj, minimume en la ekzameno de religio.

5.—7. Allaso al instruofico de lernintoj de ordenoj kaj kongregacioj.

Paragrafo 6: Devas esti fondataj katolikaj popollérnejoj en ĉiuj komunumoj post petpostulo de la gepatroj aŭ aliaj edukrajtaj personoj, se ebliĝas laŭorda lerneja labora pro konforma nombro de gelernantoj, eĉ en formo de neizolita lernejo.

Paragrafo 7: 1. En ĉiuj popolaj lernejoj (escepte en kazoj menciitaj en la dua paragrafo parto) religia instruado restas regula fako.

Fikso de ĝia amplekso interkonsente kun la eklezio.

Ebligo de privata religia instruado en lernejaj ĉambroj en plenumo de religiaj devoj.

Paragrafo 8: 1. La inspektado kaj estrado de la religia instruado en la popolaj lernejoj, mezaj kaj pli altaj lernejoj estas garantiataj a la eklezio.

2. La episkopo kaj liaj komisiitoj rajtas kritiki malkonvenaĵojn en la religia-morala vivo de katolikaj lernantoj kiel ankau malutilajn malkonvenajn influadojn en la lernejo precipe eventualajn lezojn de ilia konfesieco aŭ de religiaj sentoj en la instruado, ĉe la ŝtato instruoestraro, kiu zorgas pri konvena rebonigo.

Paragrafo 9. 1 — 2. Laŭleĝa samrajteco de privataj lernejoj de ordenoj kaj kongregacioj.

Preskaŭ samvortaj estas la kontraktoj kun la du evangelianaj Luther-aj eklezioj en Bavario kaj Pfalc-o.

Tuj post la ekscio de la faritaj kontraktoj aŭdiĝis ĉie protestoj. Grandaj instruistaj organizaĵoj en la tuta Germanlando ekvidis en tiuj kontraktoj gradon danĝeron por progresa evoluo de la germana lernejo. Oni opinias, ke per ili la lernejo transiras el la potenco de la ŝtato en la potencon de la eklezioj, ke la germana kulturidealo fariĝas viktimo de la eklezio, ke la kulturo faras malprogreson returnen je kelkaj jarcentoj. — Krizbatalo je la ŝtata lerneja estreco, je libereco de la kredo kaj de la konscienco.

Ĉu tiu ĉi kontraŭbatalo estas ĝusta? La atakantoj sin apogas sur la regnan konstitucion dirante, ke tiu estus renversata, se la kontraktoj ricevus oficialan leĝan karakteron. Sed ni legas en la konkordato: "Ankaŭ de la flanko de la regna registaro, al kiu estis komunikita laŭ interkonsento la projekto, protestoj laŭ la regna konstitucio ne estis farataj."

Ĉu en vero la konkordato kiel la aliaj kontraktoj kontraŭstaras la regnan konstitucion?

Paragrafo 135 de la konstitucio diras: "Ĉiuj loĝantoj de la regno ĝuas plenan liberecon de kredo kaj de konscienco." Laŭ la konkordato ĉiuj instruistoj en konfesiaj lernejoj perdus tiujn liberojn. Ili fariĝus servantoj de la eklezio.

Paragrafo 136: „. . . Neniu estas devigata malkaŝi sian kredon . . . Neniu povas esti devigata al eklezia ceremonio aŭ partopreni je religia kulto aŭ uzi religian ĵurformulon".

Oni opinias, ke tiu ĉi libereco ne plu ekzistus por konfesiaj geinstruistoj. Komparu paragrafon 5, 1. de la konkordato: "instruistoj, kiuj estas taŭgaj..."

Komencos verŝajne severa eklezia inspektado eksterlerneja. Tiuj ne ĉie eklezie agantaj geinstruistoj ne plu estos taŭgaj.

Paragrafo 142 de la r. k.: "La arto, la scienco kaj la instruado pri ili estas liberaj. La ŝtato garantias al ili protekton kaj partoprenas ilian akceladon."

Kie restas laŭ la konkordato la libera scienco, kie la rajto de la instruisto instrui progresajn sciaĵojn? La profesoroj de la universitatoj devas prelegi konfesie. La tuta publika instruado devas fariĝi konfesia.

Paragrafo 146 de r. k.: "La publika instruado formiĝas kiel organismo. Sur por ĉiuj komuna fundamenta lernejo konstruiĝas la meza kaj la alta lernejoj. Por la konstruo estas decida la diverseco de la profesioj, por la akcepto de infano en ian lernejon ĝiaj kapableco kaj emo, ne la ekonomia kaj socia situacio aŭ la konfesio de la gepatroj.

En komunumoj devas esti instalataj post petdeziro de edukrajtaj personoj popollernejoj de ilia konfesio aŭ ilia mondpercepto, ĝis tiu punkto, ke per tio enorda lerneja laboro, ankaŭ en la senco de alineo 1, ne estas ĝenata. La volo de la edukrajtantoj estas atentenda plejeble..."

La lerneja evoluo marŝas returnen en Germanlando. Pli rapide ol oni supozis, finiĝis la lasta atako de la katolika eklezio en la germanlanda kulturbatalo. La 15-an de januaro la bavara parlamento konsentis la kontraktojn preparitajn inter la registaro kaj la landeklezioj. Gravaĵo decidiĝis, sed pri tio konsciiĝis nur malgranda parto de la bavara popolo. Krom kelkaj eminentuloj el scienculaj rondo nur organizaĵoj de popolinstruistoj kuraĝis montri publike kontraŭan opinion. La instruistaro de la pli altaj lernejoj silentis, kaj la popolo tute ne komprenis. La vatikan-amika registaro sufiĉe klopodis plej rapide akceli sian planon. Ĝi sukcesis.

La instruistaro agas energie. La plimulto el la loĝantaro ne komprenas kulturbatalon, eĉ subtenas aktive aŭ per intiferenteco reakcion, ankaŭ tiun en la lernejo.

Eltiraĵo el du artikoloj de "Novaj Tempoj".




Schulhaus = lernejo

---

## Alvoko

Inter Bavario kaj la papo estas farita nova konkordato, kiu liveras lernejojn kaj partojn de la bavaraj universitatoj senkondiĉe en la ĉenojn de la eklezio; ankaŭ la protestanta eklezio aliĝis al la konkordato. El tio devenas la neceseco fari plialtigatan aktivecon por atentigi la amasojn pri la danĝero, kiu estas la eklezio por libereco de la spirito, precipe por libera edukado. En konsento kun pluraj kamaradoj, mi estas preta fari lumparoladon, montrante la eklezion en historio kaj estanteco kiel internacia potenco, foriganta liberecon. Pro tio, mi petas ĉiujn kamaradojn sendi materialon: fotografaĵoj, bildoj pri martiroj de Giordano Bruno ĝis Ferrer kaj la nuna tempo, pri kunlaborado de militaro kaj eklezio, pri efiko de la eklezio je infanoj, pri karikaturoj de ekleziaj aferoj ktp. Sendu ĉion kun mallongaj klarigoj, pro ordigo kaj prijuĝo de la materialo. La afero urĝas. Kun frataj salutoj.

Dr. med. Max Hodann,
Berlin-Friedenau, Kaiserallee 83.

# La liberpensa movado en Germanio

Jam antaŭ la granda milito ekzistis en Germanio atentinda liberpensa movado. Sed tiam la plejmulto de la liberpensuloj estis samtempe membroj de iu religia komunumo, malgraŭ la ekzisto de la leĝo permesanta la eksiĝon el la eklezio. Nur nemultaj tion faris. Precipe ŝtatoficistoj kaj instruistoj pro timo perdi oficojn restis membroj de la eklezio. Krom tio la procedo de la eksiĝo estis tre klopoda. Unue oni devis sciigi buŝe al la pastro de sia eklezia distrikto pri la deziro eksiĝi. Post certa tempo oni ree devis alparoli la pastron pri la afero kaj, fine, oni ricevis la eksiĝdokumenton. Notu, la eksiĝo devis esti pagata.

Kompreneble pro malagrabla procedo, elspezoj kaj risko esti persekutata nemultaj havis kuraĝon eksiĝi.

La amaso restis membroj de la eklezio, pagis ekleziajn impostojn, malgraŭ tio, ke interne oni rompis kun la religio.

Venis la milito, kaj oni povis konstati, ke la preĝejoj pleniĝis, almenaŭ komence de la milito. Tio daŭris nelonge; multaj komencis dubi pri dio, kaj la pastroj ofte devis prediki al maldensa anaro. La soldatoj estis ordonitaj partopreni en diservo. La skribanto de ĉi tiuj linioj por ne aŭdi la malspritan babilaĉon de la militpastro, populare nomata "ĉielleŭtenanto", faris praktikan laboron kaj prefere pecigis lignon dum la aliaj diservis.

Venis la revolucio kaj kun ĝi ankaŭ la spirita progreso. Centoj da miloj profitis la novan simpligitan leĝon pri eksiĝo, laŭ kiu oni iris al la familia registrejo kaj ricevis la nemultekostan eksiĝdokumenton.

En la instruejoj la pastroj ne havas plu influon. La infanoj de liberpensuloj ricevas moralan instruon. Bedaŭrinde estas, ke la disiĝo de la ŝtato kaj eklezio ne estas tute kompletigita, la ŝtato ankoraŭ zorgas pri la enkasigo de la ekleziaj impostoj.

Mi nun pritemos la liberpensajn organizaĵojn. La plej granda estas Komunumo de Proletariaj Liberpensuloj de Germanio, kiu enhavas preskaŭ 90 000 da membroj. Ĝia presorgano estas la monata gazeto "Atheist" radikala, proletara. La organizaĵo postulas ĉe membriĝo eksiĝon el la eklezio kaj apartenon al iu proletara partio aŭ sindikato.

La Germana Monista Ligo, ankaŭ radikala unuiĝo, konsistas ĉefe el intelektuloj kaj scienculoj kaj multaj laboristoj, 90% el kiuj estas membroj de socialistaj partioj. La presorgano estas "Monista Revuo", kiu enhavas sciencajn artikolojn. Laŭ la Hamburgaj Tezoj la Monista Ligo favoras la sciencan socialismon, batalas kontraŭ antisemitismo, staras por paco, favoras la movadon de Internacia Lingvo ktp. Laŭ mia scio la Monista Ligo estas la sola kiu havas en sia programo la internacian lingvon.

La diferenco inter Proletaraj liberpensuloj kaj Monistoj estas, ke la Monistoj ne postulas ĉe membriĝo eksiĝon el la eklezio, nek membrecon al iu proletara partio. Alie, ĝiaj multaj membroj, precipe instruistoj en Sud-germanaj ŝtatoj, kiuj ankoraŭ hodiaŭ ne povas eksiĝi, devus forlasi la ligon. Hodiaŭ la Ligo havas proksimume 6000 membrojn; ili estas ĉefe ateistoj, nur kelkaj emas al panteismo kaj aliaj liberpensaj mondkonceptoj.

La liberreligianoj kaj la Germanaj Liberpensuloj estas kvazaŭ la dekstra flugilo en la liberpensa mondo. Ili celas ĉefe la spiritajn bezonojn de la homo. Ili aliformigis malnovajn ekleziajn ceremoniojn, kaj havas en grandaj urboj pagatajn predikantojn.

La kunlaboro de la nomitaj organizaĵoj estas, sendube, afero tre bona. En urboj ili formas liberpensan federacion; tra la regno ili formas Liberpensan Laborkomunumon, kiu ĉiu dujare kongresas. Al tiu liberpensa federacio apartenas ankaŭ du kremaciaj unuiĝoj, nome: Unuiĝo de la Liberpensuloj por Kremacio (Berlin) kaj Nova Kremacia Kaso de Proletaraj Liberpensuloj (Leipzig).

En Germanio ekzistas multaj liberpensaj gazetoj; vidu la bibliografion en Liberpensulo numero 1.

Bedaŭrinde pro la indiferenteco de la amasoj la reakcio marŝas antaŭen. La artikolo en la hodiaŭa numero pri *la* konkordato tion bone pruvas. K. H.

# La liberpensa movado en Polio

Kiel la tuta socia kaj kultura vivo, ankaŭ la liberpensa movado en Polio post la milito iris reen, reakciiĝis, malpligrandiĝis. Antaŭmilitaj fervoruloj fariĝis neŭtralemaj indifferentaj, ili preskaŭ ne ekzistas. La fama Andr. Niemojewski fondinto de liberpensa movado kaj multjara redaktoro de "Mysl Niepodlegla". „Sendependa Penso" jam dum la milito kunfratiĝis kun reakciemaj ŝovinistaj elementoj kaj fine mortis kiel "bona" katoliko. Tamen restis kelkaj: la lingvisto Prof. Baŭdoin de Courtenaj, la profesoro de biologio Romuald Minkiewicz kaj la liberpensa kaj socialista aŭtoro Jan Hempel kun kelkaj nov*a*j amikoj kaj la reveninta el Ameriko J. Landaŭ. Tiuj fondis en la jaro 1920 novan "Societo de Polaj Liberpensuloj" legitimigis ĝin kaj post unujara klopodado komencis eĉ eldonadon de regula monata presorg*a*no "Mysl Wolna" (Libera Penso) aperanta ĝis nun.

Troviĝas nuntempe filioj de ĉi-tiu societo en preskaŭ ĉiuj plej grandaj urboj de Polio kaj eĉ en provinco. La societo eldonis krom la presorgano, kelkajn liberpensajn originalajn broŝurojn kiel "Tolerancio", "Egalrajtigo" ktp. de prof. Baŭdoin de Courtenaj, "Antikonfesiaj skizoj" de Landaŭ kaj "La Evangeliaj libroj" de J. Hempel.

En la jaro 1923 la liberreligia jurnalo "Wiara Tworcza" (Kredo kreanto) kunligiĝis kun "Libera Penso" kaj ĝia redaktoro, instruisto de la gimnazio, Lubecko eniris en la redakcia komisiono de "Libera Penso".

Sed la plej ĉefa tasko de polaj liberpensuloj estis kaj estos ĝis nun (vi ne imagu ke la tuja partiigo de l' eklezio for de la ŝtato —o ne tio estas por ni nur idealo) la akiro de legitimigo de tiel nomata "Senkonfesia komunumo". Kio ĝi estas? Tuj mi klarigos.

La carista leĝo ne permesis esti o f i c i a l e senkonfesiulo. Oni ne povis ne aparteni al iu el eklezioj, nek edziĝi senkonfesie nek liberigi infanon de evangeliaj kaj bibliaj superstiĉoj kaj legendoj. Fakto klarigebla en absoluta monarkio.

Sed nun la cara reĝimo estas renversita, ni ricevis plenan ne nur nacian, sed ankaŭ ŝtatan sendependecon. Sed jen ĉi-ŝtata sendependeco estas parte nia malfeliĉo. Nia registaro ne scipovas regadi. La parlamento voĉdonas la konstitucion, tre liberecan ŝajne, sed la ekzekutanta oficistaro, la leĝdonantoj, pli precizaj la ministroj ktp. ne volas fari leĝaron, aldonata al ĉi-konstitucio. Ili preferas la absolutistan, caristan, punan kaj civilan leĝaron. La carista punleĝaro permeas enkarcerigi ĉiun socialiston, ne parolante jam pri adeptoj de komunismo kiuj skribas, agas, kaj propagandas tute libere en same burĝaj respublikoj, franca, germana, ĉeĥoslovaka, angla ktp. Ni do havas en niaj malliberejoj ĉirkaŭ 4000 politikajn malliberulojn.

Ne pli agrabla sin sentas en ĉi-tiu leĝdona anomalio la liberpensuloj.

Kio en la antaŭe aŭstria aŭ germana parto de Polio estas permesata (senkonfesio en publika vivo) tio estas malpermesata en la antaŭe rusa parto de Polio. Kial? Ĉar la senmorta spirito de la Caro ĉi-tion postulas per sia absolutista leĝo, kio por niaj juĝistoj kaj advokatoj estas sanktaĵo. La fonto de ĉi-absurdeco, en neniu ŝtato renkontebla, estas la grandega influo de klerikalismo katolika kaj parte ankaŭ juda. Tute la parlamento voĉdonas en aferoj religiaj tiel, kiel tion diktas la grandaj ekleziuloj. Estas ĉagrenige, estas hontege, sed la afero estas tia, bedaŭrinde.

Por povi sekvi publike la senkonfesiecon restante sub la malnova leĝo samtempe, la liberpensuloj de la antaŭe rusa parto de Polio, estis devigitaj fondi societon religian de senkonfesiuloj. La legitimigo, se ĝi okazas, permesas al ili liberiĝon de ekleziaj edziĝoj, de instruado de Biblio en iliaj lernejoj ktp. Sed post

dujara klopodado la Ministerio por Internaj Aferoj" kun la Ministerio por Relig. Konfesioj kaj klerigado rifuzis ĝian laŭleĝigon. En la tuta lando la "Societo de Liberpensuloj" protestas kontraŭ ĉi tiu rifuzo, sed ĝis nun senrezulte.

Jen alia historio. Parto de militista instanco volis permesi ke senkonfesiuloj juru la fidelecon al patrio en senkonfesia formo; sed la klerikaluloj kontraŭstaras, la Parlamento malaprobas tion kaj fine la senatoroj ankaŭ.

Kontraŭ tio, la Societo protestis en "Publika Letero al la Prezidanto de la Respubliko". J. Z.

## La enspeza fabelo

Ĉiuj scias, ke miliarduloj estas homoj treege religiaj. En Ameriko ili fordonas grandegajn sumojn por subteno de servantoj al dio, preĝejoj por li, religiaj gazetoj en kiuj dio povas paroli (antaŭe sola vojo al li malfermita estis fulmotondro), kinemaj bildoj; tutan armeon de misiistoj, de dimanĉaj lernejoj kaj la faman Biblian Societon ili subtenas.

Unu el tiuj miliarduloj estas prezidanto de la Baptista Societo.

El statistika Jarlibro de USONO por la jaro 1922 oni trovas la ciferojn por la jaro 1916, el kio oni povas vidi kiom oni devas pagi jare en Ameriko nur por igi la homojn kredi ke la biblio estas la vero.

En 1916 en USONO estis 197 807 religiaj organizaĵoj de diversaj kristanaj sektoj kiuj registrigis sin (fakte estas pli). Laŭ ilia deklaro havaĵo de tiuj organizaĵoj estas 1 676 600 582 dolaroj. (Ĉi tiu sumo por eviti troan imposton). Krom tio estas tie 65 272 pastrejoj kun posedaĵoj je 219 000 000 dolaroj. La jara enspezo de tiuj organizaĵoj estis en la jaro 1916 nur 329 000 000 dolaroj. (Kiu produktis tiun riĉaĵon?)

En 1921 en USONO estis 233 999 preĝejoj kun ¼ miliono da pastroj. Dimanĉaj pri dio lernejoj 200 000.

Ŝafoj en ĉi tiuj lernejoj ĉirkaŭ 70 000 000. Vi vidas, do, ke estas tre granda kaj tre enspeziga ŝafaro.

Komprenebla estas la kialo ke senĉese aperas novaj kaj novaj kristanaj sektoj tie. Kial parto de ĉi sumoj ne iru en iliajn poŝojn ankaŭ, nur necese meti iomete da mono el propra kapitalo kiel fundamenton por la komenco.

Ankaŭ al kapitalistoj tiu dia afero estas profita. Nur 1 % el siaj kapitaloj por pastraro kaj "la mano de tiu kiu donas ne malriĉiĝos".

La laboristoj ŝvitu por doni grandajn profitojn al Rokfelroj, Morganoj, Fordoj kaj aliaj por ebligi al ili subteni la pastraron.

Kompreneble tre enspeza estas la fabelo pri Kristo. Neniu elspezo. Nur nerakonti fabelon antikvan... kaj miliardoj da dolaroj enspeziĝas en unu jaro. Nun kalkulu kiom la fabelo enspezis dum 1924 jaroj.

Kaj manpleno da liberpensuloj arogas iri kontraŭ tia enspeza fabelo . . .

Frenezuloj! T. Sujadinova.

## Queen Silver

(Kŭin Silver)

En la venonta numero ni donos elcerpaĵojn el gazeto, redaktata, eldonata kaj posedata de Queen Silver, Kalifornio.

Ŝi skribas: "Jen la kvara numero de gazeto "Queen Silver". Ĝia aĝo estas unujara kaj mi havos dekkvar jarojn en la venonta decembro. Ne ekzistas simila gazeto en la mondo.

Ĉu vi ŝatus scii kiel ĉi tiu gazeteto komencis vivi?

Jam de multaj jaroj mi faris paroladojn en Los Angeles; longajn paroladojn komence de mia oka jaro, kaj antaŭ tiu tempo paroladojn kiuj daŭris de dek ĝis dudek minutoj. Multaj ĵurnaloj kaj gazetoj sciigis homojn en aliaj urboj pri mia laboro. Multaj homoj, kiuj ne povis ĉeesti miajn paroladojn, skribis al mi petante presitajn kopiojn. Pro manko de mono por presigi ilin mi ne povis dissendi kopiojn.

Antaŭ proksimume unu jaro, tre malnova liberpensulo W. S. Bryan, skribis leteron, kiu estis presita en la "Truth Seeker" (Serĉanto de Vero), petante liberpensulojn donaci monon por ebligi al mi presigi miajn paroladojn.

Dum la proksima monato ĉirkaŭ sepdek dolaroj alvenis. Fremdulo "malproksime en sudo" sendis poŝtmandaton por kvindek dolaroj, dirante "uzu ĝin laŭ via plaĉo".

Tiuj sepdek dolaroj estis la fonda kaso. Per tiu kapitalo la gazeto de QUEEN SILVER ekvivis."

El gazeto "Queen Silver".

## Oomoto

Nova religio rekte el la ĉielo

Ĉi tiu religio aperis en la ekstrema oriento, en Japanujo, nomata de ĝiaj gvidantoj "Oomoto".

Mi citu el broŝuro de Oomotanoj: "Dio estas spirito enhavata en ĉio de la universo, kaj homo estas la reganto de la mondo. Kiam Ĉefdio sin aperigas en la homo, tiam li povas montri senliman aŭtoritaton."

"Vere Dio estas Kreanto de la kosmo. Li estas en origina stato, kaj havas nevideblan korpon, kiun ne povas vidi kaj priparoli kia ajn sanktulo.... Li ekzistas eterne sen komenco kaj sen fino."

Estas interese noti la daton de la naskiĝo de la nova religio, ĉar ĝi preskaŭ koincidas kun tiu de la Kristana. En la nokto de la unua tago de Januaro 1892 senabocoa virino 57 jara, Nao Deguĉi, subite iĝis posedata de Dio, kaj ŝi sentis ke ŝanĝo okazis al ŝi kiam Dio ekvivas en ŝi. De tiu tempo ŝi ne eliris el sia domo dum 27 jaroj krom kiam Dio ordonadis al ŝi. Ne estas menciite en kiu lingvo Dio parolis al ŝi.

"Ĉirkaŭ ŝia korpo oni povis vidi glorkronon (aŭreolon) pro kio ŝi aspektis des pli sankta." Antaŭe glorkronoj ĉirkaŭis nur kapojn de sanktuloj (sur bildoj). Ŝi mortis la 6-an de Novembro 1918 kaj iris en la ĉielon.

Tuj ŝia filo Onisaburo Deguĉi fariĝas herede la ĉefo de ĉi tiu religio, en li sidas Ĉefdio kaj li posedas senliman aŭtoritaton, kaj li estas multe pli scia ol la fondintoj de antaŭaj religioj, pro tio li vokas ke "ĉiuj vekiĝu kaj klopodu sindoneme mano en mano por efektivigi la grandan Di-entreprenon, la unuan kaj lastan, kaj la ĉieligon de la tutmondo". Estas klare, ke la movadoj de Budha, Kristo, Mahometo, Baha O'llah ktp. ne estas Di-entreprenoj.

Onisaburo Deguĉi ricevis sian nomon rekte de Dio mem.

La ĉefo verkas la Dian literaturon, nomata "La Rakonto el la spirita mondo" kaj "Sesdek ses volumoj el 120 volumoj, la tuto, estas jam pretaj; ne unu el la plej mirindaj, sed absolute la plej mirinda verko en la tuta mondo." (Memlaŭdo ne vokas aplaŭdon). La sesdek ses volumoj jam pretaj enhavas kvinoble tiom da vortoj kiom la Malnova kaj Nova Testamentoj, do la adeptoj de Oomoto ne havos multe da tempo por legi aliajn librojn.

En tiu literaturo oni legas, ke "depost kiam Ookunitokotaĉi-no-Mikoto, kiu estas la sola vera Dio, kaj kiu kreis ĉion de la universo per ĉiopova potenco... komencis dian faradon, kreinte kvin patrosonojn (a, o, u, e, i) kaj naŭ patrinsonojn, Li neniam ĝis nun ĉesas sian funkciadon de vortanimo eĉ nur unu sekundon. Se nun unu minuton Li ĉesus la funkciadon, tiam la universo subite disfalus; la suno, la luno, la tero kaj la steloj subite perdus la centron; fine la granda universo detruiĝus."

"Ĉiu homo ricevas sian vivon, por ke li povu fariĝi la administranto de la mondo. Sekve, en Oomoto sin trovas la instruo, ke kiu ajn homo povas regi venton, pluvon kaj fulmotondron per unu ordonkrio, kaj lia voĉo skuegas universon se li enhavas en si Dian karakteron." (Ne plu estos necese fabriki eksplodaĵojn por eksteremi malamik-

ojn, fariĝu Oomotano, voku al la elementoj, kaj pluvo dronigos, fulmo bruligos kaj vento detruos la kontraŭulojn. Terurega milito se Oomotanoj troviĝus en la du malamikaroj. Ankaŭ estas ĝuste tio kion militistoj bezonas, kaj senpaga.

La Dio de Oomotanoj lasas siajn sekvantojn perei kiel aliaj Dioj faras. Jen unu el okazoj: Foje la ĉefo, kiu estas Dio mem, iris en Manĉurion. Evidente li ne fidis al siaj fortoj senlimaj, ĉar "li varbis soldatojn por gardi lin kontraŭ kanibaloj kaj aliaj sovaĝuloj. La guberniestro de Manĉurio miskomprenis la farojn de generalo Luŝenkuei, la gardisto de la Oomoto Ĉefo, kaj kiam Luŝenkuei estis klopodanta por forigi la miskomprenon, subite okazis ĉe urbo Tung Liao, la 21-an de Junio, kruela tragedio, Luŝenkuei kaj multaj soldatoj estis mortpafitaj per artifika mano de la guberniestro. La Oomoto Ĉefo kaj kvin Japanoj estis arestitaj sed kiam ili estis pafotaj, Dia favoro subite savis ilin el la morto tute mirakle, apenaŭ la pafisto eklevis sian pafilon kontraŭ la Ĉefo, li (la pafisto) subite falis sur la teron sveninte... Eĉ la plej kruelaj Ĥinoj aplaŭdis mirplene, dirante: Tio devas esti la rezulto de Dia protekto."

"Kia mistera aranĝo de Dio, ke akvego atakis la urbon Tung Liao du fojojn en Julio kaj Aŭgusto tuj post kiam la Ĉefo forlasis tiun urbon. La superakvego detruis ĉion kaj tridek mil loĝantoj dronis." La loĝantaron punis Dio, ne tiujn kiuj faris la krimon. Maljusteco.

La Ĉefo klarigas en la Rakonto "Ŝajnas al mi, ke la anima asketismo, kiun mi plenumis sur la monto, progresis kun la rapideco pli granda ol tiu de vagonaro, aeroplano, aŭ fulmo. Tiamaniere mi ricevis la mirindan kapablon travidi ĉiujn okazaĵojn, kiam ajn kaj kie ajn ili okazos, kaj mi povis ektrovi la ŝlosilon por solvi la misterojn de Dio, kaj antaŭvidi la aferostatojn aperontajn en nia mondo eĉ post centoj da miloj da jaroj." Estas bedaŭrinde, ke li ne antaŭvidis la mortigon de generalo Luŝenkuei kaj evitis ĝin.

Mi povis elĉerpi nur kelkajn detalojn, loko ne permesas, ke mi citu la tutan mistikismon kaj strangaĵojn.

La Oomotanoj eldonis libron en Esperanto kies stilo estas Japana sed plene komprenebla. Gramatikaj kaj preseraroj malmultaj. Torĉo.

# Vidpunkto sur edukado de Edmond Holmes

(Inspektoro de ŝtataj lernejoj en Anglio)

La libro de Ed. Holmes "What is and might be" (kio estas kaj kio povus esti) multe interesis min, ĉar ĝi rememorigis al la kredoj, kiuj premegis mian tutan infanecon, kaj ĉar ĝi montras, ke tiuj kredoj regas super ĉio kaj venenas la vivmanieron kaj la edukon de la okcidento.

Ed. Holmes asertas, ke religiaj kredoj de ordinaraj homoj kreskis el penado klarigi naturajn fenomenojn.

La homoj estas dualismaj en pensado. Ili metas menson kontraŭ korpo, spiriton kontraŭ materialo, bonon kontraŭ malbono, kreinton kontraŭ kreito, dion kontraŭ diablo, ktp.

Inter ĉiuj du kuŝas profunda abismo.

La homoj volis klarigi la misteron de la vivo, kaj iu elpensis la legendon pri kreo de la mondo. Sed, ĉu la kreinto povus fari tian malbonan mondon, kian la legendisto trovis? Certe, ne. Do, li devis ankaŭ elpensi la grandan falon de homo. Tiel la mondo devidiĝis en du partoj, unue, la falinta naturo, tiu de la homo, ruinigita kaj malbenita, kaj la alia," la supernatura mondo, kie troviĝas la perfektecoj de dio.

La unua grava eraro estas la supozita malvirta naturo de la homo. Se la homo volus pliboniĝi per disvolvo de naturaj en li kaŝitaj virtoj, li tion neniel povas. La naturaj vojoj estas malbenitaj kaj malvirtaj, oni ne devas sekvi naturon, ĝi nur erarigos vin, sed estas necese marŝi sub dia gvidado laŭ mallarĝaj vojetoj.

Se homo ne devas fidi en sia propra naturo, do, devas esti iuj leĝoj por gvidi lin, kaj la profetoj donis multajn tiajn leĝojn, kiuj, certe, ne povis allogi homojn.

Nur tio estas alloga, kio estas postulata de la naturaj tendencoj. Sed, laŭ religia filozofio, naturaj tendencoj kondukas al pereo.

Alia religia, vere la ĉefa, virto estas blinda obeado. Tria religia virto estas la plenumo de ĉio laŭ la litero. Supraĵaj aferoj kiuj gravas, ne la spirito de la leĝo.

Ed. Holmes konsideras, ke la tuta okcidenta edukado estas venenigita pro:

1. La kredo en malvirta naturo de la homo,
2. insisto al blinda mekanika obeado,
3. zorgo pri supraĵaj aferoj kaj aspekto; kiel, rezultoj de ekzamenoj, anstataŭ la kreskado de animo.

Ĉi tiu konvencia tipo de edukado, postulanta obeemon, kiel ĉefan virton kaj, tenanta siajn viktimojn sub malvigliga premado per dogma instruo, limigas kaj deformas la kreskadon de la menso, haltigas ĝin kelkrilate, igas ĝin mekanika kie ĝi devus esti viva, ĝis, fine, ĝi detruas tiun internan harmonion, kiu estas necesa por virta vivo. Tia edukado malfortigas la volon, transmetante la fonton de ĝia agemo al la volo de alia persono, kaj tiel limigas la amplekson de ĝia kapablo agi, ĝis elekto inter nur obeo aŭ malobeo al serio de neinterrilatantaj ordonoj. Ĝi atrofias la moralan senton ne nur per tio, ke ĝi malpermesas al junulo pripensadi pli gravajn aferojn de la vivo, sed ankaŭ per tio, ke ĝi malpermesas al la lernanto difini por si mem la pravon kaj la malpravon en ĉiuj detaloj de konduto. Ĝi formaligas la vivon, ignorante la internan motivon, kaj senĉese postulante videblajn kaj mezureblajn rezultojn. Ĝi malaltigas la nivelon de homa spirito en ĝia serĉo por stimulilo.

Ĝi alvokas al memamaj deziroj kaj malnoblaj timoj; ĝi senspritigas la vivon, igante grava laŭliteran obeon kaj malgrava la animan flankon.

Nia sistemo daŭrigas kulturi la maljustan koncepton pri la homa naturo, kaj el tio venas la kredo, ke homa naturo estas neŝanĝebla; la sistemo plantas en la menson tute falsan ideon pri la realeco; ĝi enfiksas individuismon kaj konkuran egoismon en la homojn.

La sonĝo de sociaj reformistoj ne efektiviĝos ĝis kiam la tuta perspektivo de la vivo ne estos ŝanĝita.

La ĉefa atento de reformistoj devas esti koncentrita sur edukado.

Fine, Ed. Holmes pensas, ke la infanoj naskiĝas kun potenco al bono. Kiel en semo kuŝas ebleco por perfekta kresko, same en ĉiu infano la perfekteco, kiel celo, estas entenata. Ĉiujn malagrablajn emojn, kiel kurelecon, mensogon, egoismon, ktp., infano devas trairi por atingi sian plej altan kapablon.

Sed infano povas evolui nur, se ĝi havas liberecon; liberecon limigi mem siajn defektojn; liberecon de memregado anstataŭ la deviga obeo; liberecon en natura evoluo, anstataŭ la mekanika respondo al dogma gvidado.

En altaj niveloj de sia naturo la infano ne povas evolui, escepte per ekzercado de sia propra volo.

En infanoj kuŝas neimageblaj kapabloj. Ni ne povas eĉ koncepti al kia alta nivelo ili povus atingi, se ni nur donus al ili eblon por tio.

F-ino H. Langelaan, Londono.

# Al membroj kaj legantoj

**Dankon al la membroj, kiuj gratulis nin pro nia unua sendependa numero. Ni faros nian eblon por ke la enhavo de la estontaj numeroj estu egale bona.**

**Ĉiuj bone komprenas, ke nia Ligo devas iel akiri monon por la kompostado, papero, presado kaj dissendado de la gazeto. Ĝis nun la kotizo estas laŭplaĉa, sed, se ĉiuj membroj ne helpos al ni finance, estos necese fiksi kotizon. Ni ne volas, ke iu liberpensulo restu**

**ekster nia Ligo, pro tio ni ankoraŭ ne difinis kotizon, tamen estas la morala devo de ĉiu membro helpi mone laŭ sia kapablo. Nia gazeto estas la sola internacia liberpensula gazeto en la mondo kaj, ĉar ni volas propagandi inter la liberpensulaj organizaĵoj kaj aranĝi internacian kongreson tiel frue kiel eble, nia gazeto devas vivi. Faru vian eblon por florigi kaj la Ligon kaj la gazeton sendante monon al la reprezentantoj de la Ligo en via lando, kaj manuskriptojn al la gazeta komitato. Iliajn nomojn kaj adresojn vi trovos sur alia paĝo.** LA SEKRETARIO.

## El la Aldono al la filozofiaj pensoj de Diderot (1770)

Estis, dum la unuaj jarcentoj, sesdek Evangelioj preskaŭ egale kredataj. Oni forjetis kvindek ses pro motivo de infanaĵo kaj de absurdeco. Ĉu restas nenio de tio en tiuj, kiujn oni konservis?

Jen kion mi pensas pri la kristana dogmo, mi diros nur unu vorton pri ĝia moralo. Tio estas ke, por katoliko familipatro, konvinkita ke oni devas laŭvorte praktiki la maksimojn de l' Evangelio, se ne, puniĝi per la tiel nomita infero, konsiderinte la malfacilegecon atingi tiun gradon de perfekteco, kiun la homa malforteco ne ricevas, mi ne vidas alian decidon, ol kapti sian infanon ĉe unu piedo, kaj ĝin dispremi al la tero, aŭ ĝin sufoki naskiĝantan. Per tiu ago li savas ĝin de l' dangero de l' kondamno, kaj certigas al ĝi eternan feliĉecon; kaj mi asertas, ke tiu faro, ne nur estas krima, sed devas konsideriĝi kiel treege laŭdebla, ĉar ĝi estas apogata sur la motivo de la patra amo, kiu postulas, ke ĉiu patro faru por siaj idoj ĉiun bonon eblan.

Iu viro estis perfidita de siaj idoj, de sia edzino kaj de siaj amikoj; malfidelaj kunsocietanoj estis renversintaj lian riĉegon kaj droniĝintaj lin en la mizeron. Penetrita de malamo kaj de profunda malestimo al la homa speco, li forlasis la socion kaj rifuĝis sola en kavernon. Tie, kun la pugnoj apogataj sur la okuloj, kaj meditante venĝon proporcian je sia kolero, li diris: "La malvirtuloj! Kion mi faros por ilin puni pro iliaj maljustaĵoj, kaj ilin ĉiujn tiel malfeliĉigi, kiel ili meritas? Ho! se estus eble imagi . . . ilin obstinigi al la granda ĥimero, kiun ili konsiderus pli gravan, ol sia vivo, kaj pri kiu ili neniam povus konsenti! . . ." Tuj li sin ĵetas el la kaverno kriante: "Dio! Dio!" Sennombraj eĥoj ripetas ĉirkaŭ li: "Dio! Dio!" Tiu timinda nomo portiĝas de unu poluso al la alia kaj ĉie aŭdiĝas kun miro. Unue la homoj genufleksas, poste ili releviĝas, sin reciproke demandas, diskutas, maldolĉiĝas, sin anatemas, sin malamas, sin interbuĉas, kaj la fatala deziro de l' mizantropo estas plenumita. Ĉar tia estis en la pasinta tempo, kaj tia estos en la venonta tempo la historio de estaĵo ĉiam egale grava kaj nekomprenebla.

Trad. R. D.

El nia iama gazeto "Libera Penso".

## Korespondejo

*T. C., Glasgow.* Laŭdinda estas via persisto varbi membrojn. Dankon. Ni kvitancos ilin.

*A. K., Polujo.* Se iu sendos artikolon kun „ujo" por landnomoj ni presigos tiun sufikson. Ni lasas liberecon al ĉiu.

*Al Parizaj Liberpensuloj.* Skribu al 3 Fonthill Road, London N, ĉu vi povos entrepreni Ekspozicion ĉe Liberpensula Kongreso en Aŭgusto.

## Korespondado

Ĉiu linio kostas unu Respondkuponon, sendato kun anonco.

### Landreprezentantoj

Anglio: S-ino Sujadinova-Yelland, 3 Fonthill Road London N.

Aŭstralio: S-ro Victor Rutland, 316 Riley Street, Surry Hills, Sidney.

Aŭstrio: S-ro Otto Stöber, Humboldtstraße 46, Linz a. Donau.

Bulgario: S-ro Iv. Sarafov, Pleven [Progrimnazio].

Ĉeĥoslovakio: S-ro Theodor Kilian, Jiráskova 317, Dolni Kounice.

Germanio: vidu Estraro (unua paĝo)

Hungario: S-ro Hugai Ferenc, Gyöngyös.

Japanio: S-ro Raitaroo Munemura, Nagoja, P. O. Box 3.

Jugoslavio: S-ro Paskal Bogdanoviĉ, Komixa-Vis.

Litovio: S-ro Lindas Alseika, Biržai.

Nederlando: vidu Estraro. (unua paĝo)

Polio: S-ro J. Szpacenkopf, Willa Eugenja Ciechocinek.

Rusio: H. Frank, Leningrad Gubkom Esperantistov, ulica Pleĥanov 2.

Ukrainio: S-ro G. Tuisov, Kremenĉug-Pesĉana-Gora, Maksimovski 3

Usono: S-ro Karl Fröding, 419, 7 th. st., Rockford, Ill

La landreprezentantoj prizorgos la aferojn en sia lando. Ili estas ankaŭ rajtigataj alpreni kotizojn.

## Gazetoj ricevitaj

**Esperantaj:**

Germana Esperantisto
International Language
Bulgara Esperantisto
Novaj Tempoj
Bulteno, monata eldono de la Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato.
Svenska Arbetar-Esperantisten

**Liberpensaj:**

De Vrijdenker (holanda)
Der Freigeist (aŭstria)
Freier Gedanke (germ.)
Havliĉek (ĉeĥ.)
Freie Weltanschauung (aŭstria)
Der Freie Geist (germ.)
Der Pionier (germ.)
Der Kurier (germ.)
L'Action Antireligieuse (franca)

Ĵus aperis
**JARLIBRO 1925**
de la Esperanto-Instruistaro tutmonda
Enhavas pli ol 2000 adresojn el ĉiuj landoj
Necesa helpilo por la interrilato kun instruistoj kaj lernejoj en tutmondo
Prezo:
1 svis. fr. por bonvalutaj landoj
3 fr. fr. por mezvalutaj landoj
0,60 gmk. por malbonvalutaj landoj
Rabato:
16 proc. por 2 ekz-oj
25 proc. por 5 ekz-oj
33 proc. por 8 ekz-oj
Mendu kaj pagu al:
**M. Goldberg, Klemmstrato 14 Leipzig-Connewitz (Germanio)**

**Ĉia en-kaj eksterlanda Literaturo**
speziale: Liberpensa, socialista, komunista, kaj esperanta, estas liverata plej rapide [poŝtelspezoj ne estas kalkulataj]
de **Kurt Hubricht**
Leipzig-Neustadt, Mariannenstr. 22

**NOVAJ TEMPOJ**
Internacia pedagogia revuo
por la nova lernejo
Oficiala organo de TAGE
Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistoj
Demandojn kaj abonon sendu al:
**M. Goldberg, Klemmstr. 14 p., Leipzig - Connewitz (Germanio).**

Eldonejo: Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, Leipzig-Neustadt (Germanio). — Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)

1-a Jaro, Numero 3 | Dumonata | Majo—Junio 1925

# Liberpensulo

Oficiala Gazeto de la Internacia Ligo de Liberpensuloj

Estraro de Internacia Ligo de Liberpensuloj: Prezidanto: *C. F. Everts*, Alb. Cuyp-Str. 169, *Amsterdam* (Holando). Vicprezidanto: *Gustav Weigel, Bodenbach-Peiperz 14* (Ĉekoslovakio). Sekretario: *Kurt Hubricht* (Adreso: vidu apude). Kunsidanto: *M. Bartzsch*, Lochmannstrasse 4, *Leipzig-Stötteritz* (Germanio). Landreprezentantoj: Adresojn vidu sur lasta paĝo.

Sekretariejo: Kurt Hubricht Mariannenstrasse 22, I. Leipzig-Neustadt (Germ.) Poŝtĉeka numero: 43808 Leipzig

Por membroj senpage. La kotizo por la Ligo estas laŭ plaĉo, sed minimume gmk. 1.50 aŭ sama valoro. Manuskriptojn bonvolu sendi al la gazetkomitato. Adreso: S-ino *T. Sufadinova*, 3 Fonthill Road, *London N 4* (Anglio).
Represo de artikoloj permesata nur se oni citas la nomon de nia gazeto. Sendu du pruvekzemplerojn.

## PIONIROJ DE LIBERA PENSO

Tiu ĉi numero estas la laboro de knabino kaj knabo. La ĉefa artikolo "Pioniroj de Liberpenso" estis parolado farita de Queen Silver (Kuin Silver) en Memorial Hall, Los Angeles, Kalifornio, nur kun notoj en mano la 29an de Aprilo 1923, kiam ŝi estis 12 jara. La traduko Esperanten estas farita de nia 19 jara membro Robert Wood, Londono, kies bildo troviĝas sur alia paĝo. Bedaŭrinde, loko ne permesis, ke ni presu la tutan interesan materialon de ŝia gazeto n-o 4, sed de tempo al tempo ni presos pluajn artikolojn de ŝi. Tradukoj permesataj kondiĉe, ke ŝia gazeto "Queen Silver" estu menciata kaj ke du numeroj estu sendataj al ŝi. Vidu anoncon por adreso. *Red.*

* * *



Queen Silver

Entreprenante tiun ĉi temon, "La pioniroj de Libera Penso", mi volas trakti ĝin kiel eble plej larĝe kaj science. Libereco de penso estas ja tre grava por la ekonomia, socia kaj politika evoluo de la homo. Sen tuta libereco por la menso la homo estas nur mizera sklavo kaj hipokrita timulo, kiu flataĉas kaj servute sinklinas. Sen libereco por esprimi la pensojn de la menso, parole aŭ skribe, ĉia socia progreso iĝas neebla. La tuta libereco, kiun ni nun ĝuas estas ŝuldata al la pioniroj de libera penso kaj libera vivo, kiuj oferis siajn vivojn por ebligi tiun liberecon. La tuta libereco, kiun viaj infanoj ĝuos estonte, estos nur pro tio, ke vi konservis la liberecon de la estinteco, aldonis al ĝi kaj transdonis ĝin al ili.

Estas tre antikva sentenco, kiu diras, ke la homo estimas la privilegion de libereco nur kiam tiu libereco estas prenita for de li. Mi volas diri al vi ion pri la akra luktado farita de la pioniroj de libera penso en la estinteco. Mi opinias, ke, se vi scius kiel forte ili devis batali por atingi la liberecon kiun ni nun ĝuas, vi batalus pli forte por tenadi ĝin. La sociaj fortoj kontraŭ libera penso neniam dormas. Ili ĉiam baraktas por denove sklavigi la menson, ĉiam batalas kaj faras leĝojn por kateni la cerbojn de la homa raso. Se ni volas esti homoj, ne simioj, ni devas pensi; kaj, se ni volas esti liberaj amerikanoj, ni devas neniam permesi al iu preni for de ni iom de la libereco, kiun ni ĝuas. Se ni deziras vidi la evoluon de la homo, ni devas zorgi pri tio, ke ĉiujare la mondo ricevu iom plu da libereco, kaj ke en ĉiu jarcento efektiviĝu nova emancipo de la homa cerbo el la katenoj, kiuj ligas ĝin al la nescia estinteco.

Mi ne konas la nomon de la unua liberpensulo en la mondo. Mi scias, tamen, ke li estis la unua, kiu *ne timis tion, kion li ne povis kompreni…* Dum liaj amikoj kuris for de la tomboj de siaj mortintaj kamaradoj, li, sendube, iris al tiuj tomboj kaj manĝis la nutraĵon, kiun liaj superstiĉaj kunuloj metis tien por la mortintaj spiritoj. Tiu unua liberpensulo estis kuraĝa homo, ne timulo. Li estis nescia, sed li posedis la ĝermon de scio. Li ne respektis ion aŭ iun, ne timis la ĝeneralajn opiniojn, kaj ne timis ion, kion li ne povis vidi.

Se liaj kunuloj aŭskultus al li, civilizado progresus je kelkaj centmiloj da jaroj.

Mi ne scias kiel tiu unua liberpensulo mortis, sed mi estas certa, ke liaj kunuloj mortigis lin, kaj mi supozas, ke ili rostis lian karnon por tagmanĝo laŭ la vera kanibala stilo. Mi kredas tion, ĉar la historio diras al mi, ke dum nedifinita tempo — dum centoj da miloj de jaroj post tiu okazo — la nesciaj homoj tuj mortigis ĉiun, kiu montris pli grandan inteligenton ol ili mem posedis.

La homo similas al omaro aŭ krabo. Kiam fiŝkaptisto prenas sitelon da tiuj markrustuloj, ne necesas, ke li kovru ĝin por ke ili ne liberiĝu. Tuj kiam unu grimpas al la supro de la sitelo kaj, ŝajne, atingos liberecon, ĉiuj aliaj kraboj kaj omaroj ekprenas ĝiajn krurojn kaj tiras ĝin al la fundo de la sitelo. Tiel ili ĉiuj restas por la fiŝkaptisto. Ili reciproke sin tenas for de libero, kaj, fine, ili ĉiuj estas boligitaj vivaj, ĉar ili ne havis sufiĉe da intelekto por helpi unu la alian. Ĉu vi ne vidis homojn, kiuj agis kiel tiuj kraboj? Kiam viro, aŭ virino, aŭ infano, faras pluan paŝon al libera mensa disvolvo — ĉu ne estas multaj aliaj viroj, virinoj, kaj infanoj, kiuj atendas, rigardas kaj penas per ĉiu rimedo malaltigi tiun, kiu paŝis alten? Ja, tion faras William J. Bryan[1]), kaj la pastroj faras ĝin ĉiam. La omaraj ecoj, hereditaj el iliaj markrustulaj praŭloj, kiuj vivis antaŭ centmilionoj da jaroj, instigas ilin penadi tiri siajn kunulojn en la marĉon de superstiĉo, el kiu ili mem ne volas liberiĝi.

La unua pastro estis la unua homo, kiu estis tro maldiligenta por kolekti lignon por sia fajro kaj tro tima por kapti sian viandon. Pro tio li elpensis planon por paraziti sur la timoj kaj superstiĉoj de siaj kunuloj. Li kapitaligis ilian nescion, kaj ili nutris lin, vestis lin per feloj, kaj fosis truon en la tero por li. Eĉ nun, se knabo ne havas energion por labori kaj ne kapablas lerni metion, liaj gepatroj solvas la problemon de lia estonta kariero, sendante lin al lernejo de teologio. Ĉar li taŭgas por nenio, oni faras lin predikanto. La unua pastro, sendube, manĝis la plej molajn pecojn de la unua liberpensulo, ĉar pastroj ĉiam, de tiam ĝis nun, parazitis sur la homoj. La antikvaj pastroj subpremis ĉian scion, kiu povis liberigi la homojn, kaj aliflanke, ili monopolis la tutan scion, kiu povis teni ilin kiel sklavojn.

Oni ne komencis forskui la regadon de la pastraro ĝis kiam scio fariĝis ĝenerala inter la homoj.

La fondintoj de moderna scienco estas la veraj pioniroj de libera penso en tio kio koncernas nian tempon. En la antikva socio la ordinaraj homoj ne bezonis grandan scion. Se ili povis zorgi pri siaj ŝafoj, paŝti siajn brutojn, mortigi siajn malamikojn kaj porti oferaĵojn al la pastroj, jen sufiĉe. Kun la progreso de la socio la homo devis scii pli. Li devis sufiĉe disvolvi sian cerban materion por konstrui al si domon, havigi vestaĵojn por ŝirmi sin kontraŭ dezerta varmego kaj vintra malvarmo. Li devis lerni kiel konstrui urbojn kaj vivi en ili. Li devis elpensi pli bonajn metodojn por ekstermi siajn malamikojn. La neceso por tiuj aferoj evoluigis lian menson, kaj helpis civilizi lin. Ĉar certaj rasoj ne kapablis plenumi tion, ili estis mortigitaj — viŝitaj for de la tero.

Kun la progreso de civilizado la ordinaraj homoj devis scii pli kaj pli por vivi. La batalo por ekzisto iĝis tiel akra, ke la homoj devis pli kaj pli disvolvi siajn mensojn por vivi. Tiu ĝenerala pliiĝo de scio estis pereiga al la pastroj kaj politikaj despotoj. Ili ne povis tute subpremi scion, ĉar, se ili farus tion, la homoj estus tro nesciaj eĉ por esti bonaj sklavoj. Ili tial uzis ĉian rimedon por igi la homojn timi posedi scion. Kio estis vera en pasinteco estas vera hodiaŭ. La homoj devas scii sufiĉe por estri farmbienojn kaj maŝinojn, sed ili devas ne scii sufiĉe por senti la deziron posedi tiujn aferojn. Ili devas scii sufiĉe por teksi belajn silkojn, kaj punton, kaj aliajn belajn ŝtofojn, ili devas ne scii sufiĉe por deziri porti ilin. Ili devas scii sufiĉe por konstrui belajn domojn, sed ne sufiĉe por malpermesi al aliaj vivi en ili.

Pro tiu ĉi ĝenerala vastiĝo de scio iĝis tre malfacile al la reĝoj kaj pastroj savi sian pozicion en la socio, kaj ili uzis la plej kruelajn kaj terurajn metodojn, kaj por tenadi sian povon. Ili ŝanĝis siajn metodojn, ĉar cirkonstancoj ŝanĝiĝis, sed ili neniam ĉesis malfaciligi la sorton de pensuloj kiel eble plej multe. Ili neniam ĉesis persekuti la intelektulojn de la mondo, kvankam iliaj *metodoj* multe ŝanĝiĝis dum la lastaj tricent jaroj.

En Grekio, longe antaŭ la epoko de Kristanismo, estis tre multaj dioj, bandaĉo da pastroj kaj multaj luksaj temploj. La grekoj faris multajn penojn por emancipi siajn mensojn el superstiĉo, sed oni tiom timis publikan opinion, ke neniu kuraĝis libere kaj tute sin esprimi. Sed la grekoj ne havis Inkvizicion, ne havis metodojn por torturi herezulojn. Ili nur malagrabligis la vivon kaj malfaciligis la ekziston de la vera liberpensulo. Estis tiom da dioj en Grekio kaj tiom da Virgulinaj Naskoj, ke foje oni proponis leĝon, ke ĉiu knabino, kiu akuzas dion je patreco de sia infano krimas. Se iu homo ne ŝatis certan dion, li rajtis adori alian. Kondiĉe, ke li adoru *iun* dion, oni konsideris lin bona civitano. Estas same en moderna Ameriko. Se vi apartenas al iu eklezio, ne gravas se ĝi estas tre malgranda, aŭ se vi adoras ian dion nigran, blankan, bonan aŭ malbonan, kruelan aŭ bonkoran, vi do estas tute respektinda. Sed, se vi ne kaŭras kaj fleksas la genuon antaŭ iu speco de fantomo, vi estas tre, tre malbona.

La Sofistoj eble estis la unua grupo de homoj kies ideoj similis tiujn de modernaj liberpensuloj. Ili instruis, ke ne estas iu dio, ke nenio estas absolute vera aŭ absolute malvera, ke pravo kaj malpravo estas fiktivaj terminoj, elpensitaj de socio, kaj ke pravo estas la volo de la plimulto, aŭ de la reĝo, dum malpravo estas malpravo nur, ĉar leĝo ne devigas nin rigardi ĝin kiel pravon. "Povo estas rajto" estas la sumo de iliaj ideoj. Neniu, ili diris, estas pli bona aŭ malbona ol iu alia. La malplimulto estas malprava hodiaŭ, sed morgaŭ, se ĝi iĝos la plimulto, ĝi estos prava. Sed eĉ ili, malgraŭ ilia kuraĝo, konsilis al siaj sekvantoj esti ruzaj kaj hipokritaj, por ke ili ne faru malamikecon. Aneksagoras estis la unua vera ateisto pri kiu ni scias. Oni juĝis kaj kondamnis lin, kaj li apenaŭ evitis morton. Li estis savita de Perikleso, kiu opiniis same kiel li.

La sola greka virino, kiu meritas esti priskribita de historiisto estis ankaŭ sampensa, Aspazio, amiko de ĉiu saĝulo de sia tempo, kaj edzino de Perikleso ĉiel krom laŭleĝo, ankaŭ estis juĝita ĉar ŝi kalumniis la diojn de sia lando. La elokvento de Perikleso savis ŝin. Tamen la pastroj fine triumfis kaj restarigis fidon kaj malprosperon en Grekio. La epoko de Perikleso estas nomata de la historiistoj la Ora Epoko ĉe Grekio, ĉar dum lia regado grekaj kulturo kaj civilizo atingis ĝian plej altan punkton. La epoko de Perikleso estis ankaŭ la Epoko de Ateismo en Grekio. Kiam restariĝis superstiĉo, greka civilizo komencis ruiniĝi. Ili jam atingis iom da libero, sed perdis ĉiom. Hodiaŭ Grekio estas ruiniĝinta produkto de du mil jaroj da Superstiĉo, Nescio, Malnobleco kaj Fanatikismo.

Estas alia virino de antikvaj tempoj, kies nomo devus ne esti forgesata de ĉiu, kiu estimas scion. Ŝia nomo estis Hipatia, kaj dum kvardek jaroj ŝi instruis la veron, jam eltrovita en tiu tempo. Mi volas paroli al vi pri ŝi, sed antaŭ tio, mi devas diri al vi pri la granda kolegio en kiu ŝi instruis.

Kelkaj centoj da jaroj antaŭ la epoko de kristanismo iu egipta reĝo, Ptolemi Soter, fondis kolegion kaj bibliotekon en la urbo Aleksandrio. Preskaŭ ĉiuj el la dinastio de reĝoj, nomata Ptolemi, interesis sin pri la progresigo de scienco. Ili aldonadis al tiu ĉi biblioteko de tempo al tempo ĝis nelonge antaŭ ol ĝi estis detruita de bandaĉo el kristanoj en la jaro 391; en ĝi troviĝis sepcent mil, mane skribitaj, volumoj. Ĉiu studento aŭ klerulo, kiu venis al Egiptio, estis petata ke li skribu sian scion, por ke ĝi estu konservata por ĉiam. Ĉiu fremdulo, kiu portis en Egiption manuskripton el iu alia lando, devis pruntedoni ĝin al la biblioteko, dum kopio estis farita por konservado. Ĉe Aleksandrio estis kolektitaj ĉiuj konataj verkoj de ĉiuj aŭtoroj kaj filozofoj de la antikva mondo. Julio Cezaro akcidente detruis parton de tiu biblioteko. Lia sekvanto, Antonio, donacis al Kleopatra la grandan kolekton de Pergamos, por anstataŭi la detruitajn verkojn.

Kune kun tiu ĉi biblioteko, kiu troviĝis en du grandaj konstruaĵoj, estis sub-

1) Biblia misiisto en Ameriko, fundamentalisto.

tenata granda universitato. Tie loĝis dek mil studentoj. Iu, kiu sentis, ke li havas ion por komuniki, aŭ kiu volis instrui, iris al unu el la grandaj kortoj kaj aŭ sidis, aŭ staris kun siaj studentoj ĉirkaŭe tiel longe kiel ili deziris aŭskulti. Lernado estis senpaga. Iu ajn rajtis instrui kaj iuj ajn rajtis veni por studi. Malriĉaj studentoj estis nutrataj je publika kosto. Iu povis, se li deziris, dormi nokte sur la planko. Alivorte, la aleksandria kolegio estis granda libera forumo. Se vi povas imagi al vi la straton Los Angeles dudekkvinoble pligrandigata, se vi povas bildi ĝin al vi sen kristanoj aŭ aliaj religiuloj, se vi povas imagi bibliotekon kun tri kvaronoj da miliono de libroj atingeblaj senpage de la publiko kaj, se vi povas bildi al vi kiaj estus la aferoj, se ni estus permesataj absolutan liberecon por paroli, — tiam vi havas bonan ideon pri kia estis la universitato kaj biblioteko de antikva Aleksandrio. En la moderna mondo ne ekzistas lernejo simila al tiu.

En la jaro 391 bandaĉo da fanatikuloj, antaŭ nelonge lavita en la sango de Jesuo, gvidata de sanktigitaj banditoj kaj monaĥoj, detruis la plej grandan flankon de la biblioteko kaj pli ol duonon de la netakseblej manuskriptoj, kiuj estis en la instituto. La kristana imperiestro Teodosio instigis tiun vandalaĵon kaj Teofilo, kristana episkopo de Aleksandrio, direktis ĝin. Teofilo diris: "Se tiuj ĉi libroj *malkonsentas* kun la biblio, ili estas herezaj, kaj devas esti bruligataj. Se ili ***konsentas*** kun la biblio, ili estas neutilaj, kaj devas esti bruligataj." Tial li bruligis ilin. Li estis vera kristano, ĉar li plenumis la ordonon de dio al Adamo "De la arbo de scio ci ne manĝu." Sed la kolegio ankoraŭ restis, kaj eble triono de la libroj en la alia konstruaĵo estis konservitaj.

En tiu ĉi kolegio en tiu tempo vivis kaj instruadis Hipatia, la plej granda filozofino pri kiu la historio rakontas. Ŝi estis la filino de la granda Kleon, astronomo kaj matematikisto. Estas dirite, ke ŝi montris neordinaran genion dum infaneco, kaj pro tio ŝia patro tre zorge edukis ŝin. Dum ŝi estis ankoraŭ infano, ŝi ellernis diversajn antikvajn lingvojn, kaj, kiam ankoraŭ juna knabino, okupis lokon kiel instruisto en la lernejo.

En tiu tempo oni izolis virinojn, kaj oni diras, ke la beleco kaj juneco de Hipatia tiom impresis la virojn, kiuj kutime ne vidis virinojn en publikaj lokoj, ke Hipatia portadis dikan vualon, por ke ŝia vizaĝo ne altiru la atenton de siaj studentoj. Ŝiaj paroladoj allogis ĉiun klerulon de la urbo al la lernejo kiel ankaŭ la ordinarajn studentojn. Homoj venis el ĉiuj partoj de la romana mondo por aŭskulti al ŝia saĝeco kaj elokvento. Oni tiel alte estimis ŝin, ke la juĝistoj de la urbo alportis al ŝi siajn malfacilajn procesojn. Teofilo, sankta patro, episkopo, sanktulo, forte malamis ŝin, sed li sentis, ke ŝi estis tro potenca por ke li ŝin ataku. La kristanoj ankoraŭ ne estis sufiĉe fortaj por trudi siajn dogmojn al la registaro de Aleksandrio, ĉar tiu urbo estis la lasta fortikaĵo de Scienco kaj Racio. Sed kiam lia nevo Cirilo iĝis episkopo, venis la fino de libereco. Malpura, — li neniam sin banis, — plena de fanatikismo kaj sankta fervoro, li sin donis por fari Aleksandrion sankta, kristana kaj nescia. Kelkaj historiistoj diras, ke li ĵaluziĝis pri Hipatia, ĉar la homoj iris amase al ŝiaj paroladoj anstataŭ iri al lia preĝejo. Li predikis al monaĥoj kaj malplenaj seĝoj dum miloj ĉeestis la paroladojn de Hipatia. Kiom ajn tio estas vera, cirilo kaj liaj frenezaj monaĥoj kaptis Hipation dum ŝi rajdis tra la stratoj, ŝiris la vestojn for de ŝia korpo, trenis ŝin tra la urbo per ŝnurego, kaj tiris ŝin al la preĝejo de Cirilo. Ili kondukis ŝin internen ĝis la



R. Wood.

piedo de ilia kristana altaro, kaj per manoj, kaj dentoj, kaj tranĉiloj, tiuj kristanaj sovaĝuloj disŝiris ŝian korpon. Pecoj da ŝia karno estis disdonataj inter la homaĉoj kiel memoraĵoj. Cirilo, do iĝis supera reganto. Scienco estis timigita per minacoj kaj detruita. Cirilo fariĝis *Sanktulo*, kaj superstiĉo regadis dum pli ol mil jaroj sen kontraŭstaro flanke de la kristana mondo. Kristanismo instruas, ke Hipatia, la virino, kiu instruis Veron dum kvardek jaroj, iris en la inferon kaj, ke Cirilo, la sankta episkopo, kiu mortigis ŝin, iris en la ĉielon.

La sekvanta provo revivigi klerecon, sciencon kaj refortigi racion okazis en Hispanio dum la regado de la mahometanaj maŭroj. Mahometanismo ne multe malhelpis ĝiajn sekvantojn. Nur dum kelkaj centoj da jaroj ekzistis fanatikismo. Post tio, la mahometanaj regantoj kuraĝigis la studadon de Scienco. Preskaŭ la tuta reganta klaso de maŭroj en Hispanio estis ateistoj, agnostikoj aŭ panteistoj. Ili kreis belegan civilizon en Hispanio. Ili konstruis treege belajn urbojn, faris kanalojn por irigacio, mirindajn ĝardenojn, ankaŭ konstruis la grandan universitaton ĉe Kordobo. Laŭdiro, pli ol duono da miliono de libroj estis amasigitaj, kaj estis loko por loĝado de dekdu mil studentoj. Grandparte oni sekvis la Aleksandrian metodon de instruado. En tiu tempo la kristana mondo estis nekredeble nescia. La reĝoj de Francio, Anglio kaj Aŭstrio vestis sin per veluraj roboj, sed ili ne portis ĉemizojn. Pasis kvarcent jaroj ĝis franca monarho posedis bankuvon.

La maŭroj havis purajn stratojn kaj sistemon por konduki akvon. Dum kvincent jaroj post tiu tempo la kristanoj de Parizo kaj Londono fosis putojn kaj ĵetis sian malpuraĵon sur la stratojn aŭ sur siajn kortojn. Ĝis antaŭ ducent jaroj porkoj, apartenantaj al la ordeno de la Monaĥoj de Sankta Antonio, estis permesitaj kuri libere sur la stratoj de Parizo. Centojn da jaroj antaŭe la maŭroj bruligis sian rubon, elpensis tukojn kaj arĝentvazojn por siaj tabloj kaj faris por si tolajn subvestojn. Ili estis nekredantoj, sed ili naĝis ĉiutage en publikaj aŭ privataj naĝejoj. La francoj kaj angloj malofte, se iam, naĝis. Ili dormis en molaj litoj, sed dum centoj da jaroj poste iliaj Sinjoraj Kristanaj najbaroj dormis sur aŭ sub siaj tabloj. Antaŭ mil jaroj kuŝis sur iliaj plankoj tapiŝoj, sed en Anglio, la plej progresinta kristana lando, en la tempo de Reĝino Elizabeto la haloj de grandaj kasteloj estis kovritaj per pajlo, kaj oni ĵetis restaĵojn de la manĝtablo sur la plankon. Kiam la planko malpuriĝis, freŝa pajlo estis sternita sur la malfreŝan.

En la fino de la dekkvina jarcento Kristana armeo sub Ferdinando kaj Isabelo elpelis la maŭrojn el Hispanio. Ili detruis la kolegion kaj bruligis la grandan bibliotekon en Kordobo. Ankoraŭ unu fojon Scienco estis estingita. Denove Racio estis detronigita kaj la supera povo donita al superstiĉo. Por kompletigi la laboron, Ferdinando kaj Isabelo starigis la unuan Inkvizicion, kaj dum la sekvantaj dek jaroj Torkemada, Granda Inkviziitoro de Hispanio, torturis aŭ bruligis ĉe fosto cent milojn da vivaj homoj el la plej inteligenta klaso en Hispanio. Li mem donis tiujn ciferojn. Superstiĉo regis en Hispanio kvar cent jarojn, kaj hodiaŭ tiu lando estas la plej nescia, degradita kaj religia en Eŭropo.

La reviviĝo de klereco en Eŭropo okazis en stranga maniero. La kristanoj timis esplori ion science. Ili timis ĉiujn, tiel nomataj, sciencojn. La unua signo de kreskanta cerba evoluo en kristanaj landoj estis la farado de belegaj glavoj, kirasoj el ŝtalo por homoj, konstruado de preĝejoj kaj pentrado de bildoj reprezentantaj sanktulojn, por meti en ilin. Tamen, la fortoj de evoluo funkciis, kaj kelkaj homoj komencis serioze esplori la kaŭzojn de aferoj. La pli multo el ili konfesis sian adeptecon al la eklezio por savi sian vivon. La komenciĝo de modernaj sciencaj eltrovoj en kristanaj landoj estas ŝuldata plej parte al Ĝordano Bruno. Li estis itala monaĥo, kiu pasigis sian tutan

vivon, penante revivigi la sciencon de la antikvuloj kaj aldoni al ĝi. Liaj studoj igis lin nei la aŭtoritaton de la eklezio en aferoj de racio kaj malkredi al dia revelacio, la senmorteco de la animo, ĉielo, infero kaj purgatorio. Se li ne estis ateisto, li preskaŭ estis. Li verkis libere kaj cirkuligis siajn verkojn inter eĉ la pastroj kaj kardinaloj de Romo. Li estis tiel honesta, ke li kredis, ke ĉiu alia homo ankaŭ estas honesta. Li kredis, ke li povis konvinki la papon, la kardinalojn, la pastrojn, kaj eĉ la inkvizitorojn, ke li estas prava kaj ili malpravaj. Li kredis, ke ili ĝojus konfesi siajn erarojn kaj rekonstruus socion kaj liberigus homajn mensojn. Ili lin malliberigis, kondamnis lin je herezo kaj bruligis lin ĉe fosto. Aliaj martiroj mortis, esperante, ke de la fosto ili iros en la ĉielon. Bruno estis pli kuraĝa ol iu el tiuj, ĉar li mortis sciante, ke tiu ĉi estas la sola vivo. Hodiaŭ, se la papo rigardus el la fenestroj de la Vatikano en iu certa direkto, li vidus monumenton al Bruno starigitan de romanaj civitanoj post kiam la revolucio de 1848 prenis la regadon de la urbo for de la eklezio.

Al modernaj sciencistoj kaj esploristoj la mondo ŝuldas ĝian nunan liberecon de penso. Sciencistoj, kiuj ne rekte atakis religiajn kredojn, fosis sub ĝiajn fundamentojn. Dum ĉiu homo kredis, ke tiu ĉi tero estas la sola planedo, kaj ke la tuta sistemo de suno kaj steloj estas nur de dua graveco, la homoj povis sufiĉe facile akcepti la ideon, ke dio kreis ĝin, kaj ofte sin intermetas en ĝiajn aferojn. Kiam Koperniko pruvis, ke la suno, ne la tero, estas la centro de nia suna sistemo, dio estis forpuŝita iomete plu. Kiam astronomoj pruvis per potencaj teleskopoj, ke la steloj kaj sunoj, kaj planedoj estis nur ŝajne nemultenombraj, tiam dio komencis perdiĝi tute. Kiam astronomo direktas sian teleskopon al astro, kiu estas tiom malproksima, ke la radioj de ĝia lumo moviĝis dum pli ol du mil jaroj por atingi nian teron, tiam estas necese pli kaj pli forpuŝi la ĉielon. La fruaj kristanoj diris, ke estis tri mejloj, rekte supre, ĝis ĉielo. Neniu teleskopo iam povis trovi ĝian lokon, tamen. Astronomio multe skuas la kristanojn, kiuj ĉiam kredis, ke ilia dio faris la sunon, lunon "kaj ankaŭ stelojn", ĉion en unu tago.

Kiam Galileo pruvis, ke la tero estas ronda, li reeltrovis veron, konata de la antikvaj egiptoj mil okcent jarojn antaŭe. Li tiel montris, ke Jesuo ne povis stari sur monto kaj superrigardi la tutan teron; li pruvis, ke la mondo ne havas kvar angulojn, kaj ke kvar anĝeloj ne subtenis la ĉielon per siaj ŝultroj, ĉe tiuj kvar anguloj. Li pruvis, kvankam li, kredeble, ne havis ideon, ke li tion faris, ke la dio, kiu inspiris la biblion forgesis kiel li faris la teron antaŭ ol li komencis fari raporton pri la afero. Li montris, ke kometoj ne estas pruvoj de dia kolero kaj forigis multajn aliajn fundamentajn ŝtonojn de kredo.

Sinjoro Isaac Newton pretendis akcepti la religion de sia lando. Li ne esprimis ian dubon pri ĝi. Sed kiam li eltrovis la leĝon de gravitado, kaj pruvis ĝian universalan aplikadon, Newton forigis la bezonon por iu dio. Li lasis al dio nenion por fari, rilate al la regulado de la universo. Ni nun povas elkalkuli la altecon de la tajdoj por iu ajn parto de la mondo je iu dezirata tempo. Ne estas necese, ke estu iu dio kiu reguligu la tajdajn ondojn. Scienco analizis ĉion ĝis ĝiaj elementaj partoj. Ĝi apartigis kaj poste kunmetis mineralojn. Ĝi fotografis la atomon. Kaj ĝi ne trovis ian pruvon, ke io dia ekzistas. Ĝi ne povas trovi iun specon de dio ie, escepte en la imago de piaj homoj. Ĝi povas pesi la plej pezan mineralon aŭ la plej malpezan gason, sed ĝi ne povas trovi, ke estas la plej malgranda diferenco en la pezo de homa korpo antaŭ morto kaj poste. Oni ne povas pruvi, ke li havas animon. Se pri io sciencistoj ne povas pruvi la ekziston, ili ne kredas, ke ĝi ekzistas. Ili ne akceptas ion pro fido; ili akceptas neniun revelacion, kaj ne timas aferojn, kiujn ili ne povas kompreni. Ili estas la veraj liberpensuloj, sed multaj el ili timas paroli tro laŭte aŭ tro malkaŝe pro timo, ke ili perdos la renton, kiun ili ricevas. Moderna socio ne povas bruligi, aŭ torturi, aŭ malliberigi pensulojn. Ĝi nur malsatigas kaj ĝenas ilin ĝis kiam ili ellaciĝas kaj estas pretaj lasi la batalon. Nur la fortaj kaj kuraĝaj pensuloj povas postvivi.

Kiam Charles Darwin komencis sian sciencan esploradon, li estis ekleziano. Nelonge antaŭ ol li mortis, li deklaris sin ateisto. Darwin ne deziris polemiki kun iu. Li skribis kion li lernis, kaj lasis ĝin al ĉiu por akcepti aŭ malakcepti laŭplaĉe. Haeckel, Huxley, kaj aliaj, kiu venis poste demonstris, ke lia teorio de Evoluado ne estas teorio, sed konstatita fakto. Tiu teorio pruvis al pensemaj homoj, ke la tuta rakonto pri la kreado estas mito, la falo de la homo estas ĉarlatanaĵo, kaj la plano de savo estas ridinda rakonto.

La homo, kiu devenis de simio ne povus esti farita laŭ la figuro de iu dio; pro evoluado la homa patrino de Jesuo estis nur posteulo de simio, pro tio, se Jesuo estis dio, dio mem devenis, je la flanko de la patrino almenaŭ, de la pli malaltaj bestoj. Kun la plano de savo venkita de Darwin, kio restis? Oni ne plu bezonis ĉielon aŭ inferon. Ne restas io pro kio necesas savi la homojn; pastroj kaj predikistoj ne plu estis bezonataj. Jen kelkaj kialoj pro kiuj preskaŭ ĉiu eklezio akre batalas kontraŭ la instruo de evoluado en la lernejoj nuntempe. Ili bone komprenas, ke la instruo de scienca vero malebligas fidon al ĉia revelacio. Kiam la homoj perdos fidon al dioj, ili nature perdos fidon al pastroj, kaj la pastroj perdos siajn luksajn salajrojn kaj devos labori. Neniu pastro iam amis pensulon.

Mi povus daŭrigi kaj montri al vi, se mi havus la tempon, kiel ĉiu nova invento, kaj ĉiu nova elpensaĵo helpis fari religion nenecesa. Ĉiu ero de progreso faras paŝon antaŭen al pli granda libereco de penso. Sed mi volas paroli al vi pri alia klaso de pioniroj de libera penso. Mi volas paroli al vi pri la grandaj agitantoj. Vi scias kio estas agitanto. Li estas persono, kiu agitas speciale, li estas persono, kiu agitas la cerbojn de la homoj kaj pensigas ilin. La agitanto prenas la laboron de la sciencistoj kaj portas ĝin al la homoj en formo kiun ili povas kompreni. Darwin, ekzemple, estis sciencisto; Haekel estis filozofo de scienco kaj agitanto, sed Ingersoll, Paine, kaj Voltaire estis agitantoj.

Ekzistis multaj aliaj agitantoj krom tiuj tri. Estis multaj, kiuj verkis librojn, kaj faris paroladojn, multaj, kiuj kuraĝe iris kontraŭ publika opinio kaj financa malfacilo por diri la veron kaj vivi laŭ siaj kredoj. Sed mi havas spacon por mencii nur la tri plej eminentajn agitantojn.

Robert Ingersoll oferis sian politikan ambicion por diri la veron pri la biblio. Se li estus kristano, li iĝus prezidento de Usono. La Republika partio de Ilinois proponis, ke li estu ĝia kandidato por guberniestro de tiu ŝtato kondiĉe, ke li ne parolos pri religio dum siaj propagandaj paroladoj. Li rifuzis, dirante, ke li ne permesos al iu limigi lian liberecon de parolo. Li estis agnostiko, ne ateisto. Li faris pli ol iu alia homo en Ameriko por popularigi liberecon de penso. Preskaŭ li ŝajnigis ĝin respektinda. Li vekis la homojn. Li ne estis tro scienca, por ke ordinara persono lin komprenu, kaj li estis tiel elokventa, ke, kiu aŭdis lin tiu estis konvinkita malgraŭ sia volo.

Thomas Paine batalis por politika libereco, ankaŭ por libereco de la penso. Li batalis en Eŭropo kaj en Ameriko. La Epoko de Racio, kiun li verkis, faris pli da liberpensuloj ol iu verko iam eldonita. Iu, kiu povas legi tiun verkon kaj ankoraŭ kredi al la biblio havas ian malsanon ĉe la kapo. Paine mortis antaŭ ol Darwin naskiĝis. Li ne povis profiti el modernaj sciencaj eltrovoj. Tio eble klarigas, kial li ĉiam kredis al iu speco de dio. Li ne povis, tamen, akcepti ian revelacion, aŭ kredi, ke lia dio iam havis filon.

Mi rezervis por la fino la plej eminentan agitanton de ĉiuj tempoj — Voltaire. Li naskiĝis en 1694. Dum mil jaroj la eklezio estis reganta en Francio. La lando apartenis al la pastroj kaj nobeloj, kaj la vulgaruloj estis servutuloj sur la tero. Ludoviko 14a, nomata de liaj sekvantoj la Granda Monarĥo, estis reginta dum kvindek unu jaroj. Li loĝis en belega palaco, ĉirkaŭita per ĉiaspeca riĉaĵo. Liaj regatoj vivis en malklereco, malpureco kaj superstiĉo. Oni neniam purigis la stratojn de Parizo, kaj ne estis kloaka aŭ akva sistemo. Eĉ en la granda palaco ne ekzistis io simila al bankuvo. Eklipsoj, kometoj kaj pestoj estis forpelataj per sonorigado de preĝejaj sonoriloj; malsano estis konsiderata vizitado de dio, kiun provis kuraci aŭ malebligi nur malpiulo. Tio ĉi okazis dum la zenito de la "Ora Epoko de la Eklezio", kaj neniu kontraŭis ĝian regadon.

En tiu ĉi superstiĉa mondo naskiĝis Voltaire. Lia patro estis pia ekleziano kaj komercisto, ne speciale grava. Lia patrino estis unu el la plej rimarkindaj virinoj de tiu tempo. Lia edukado, oni diras, estis gvidata de amiko de lia patrino, la Abato Chateauneuf, viro, kiu vivis per enspezo de la eklezio, kaj malkaŝe paradis, ke li malkredas al ĝiaj instruoj. Kiel baptopatro de Voltaire, la abato solene promesis "fidele instrui al la infano la principojn de religio, la leĝojn kaj kutimojn de la katolika eklezio." Li tiel bone plenumus sian promeson, ke lia instruato neniam havis ian fidon al iu religio. Li instruis al li, kiam nur trijara, ripeti por amuzo de amikoj de sia patrino kelkajn strofojn mokantaj Moseon. Kun tiu ĉi instruado la patrino de Voltaire plene konsentis.

La knabo, kvankam korpe malforta, montris mirige brilan menson. Li verkis poemojn kaj teatraĵojn dum li estis nur knabo. Li estis nur dudekjara, kiam oni malliberigis lin en la Bastillo por unu jaro laŭ ordono de la reĝo. Li antaŭe ridindigis en poemo la edzinon de la reĝo. Dum lia frua vireco kaj meza aĝo li verkis tre multajn teatraĵojn, la plej multo el kiuj sukcesis kiam oni prezentis ilin. En ĉio kion li verkis, iu, aŭ iu klaso de homoj, aŭ iu ekzistanta institucio estis la celo de lia mokado. Voltaire ridis je la kortego; li ridis je la eklezio, kaj li ĉiam igis la homojn ankaŭ ridi je ili. Li ĉiam verkis, pensante pri la cenzuristo. Li estis la plej granda majstro de ironio kiun la mondo iam konis. Preskaŭ ĉiu teatraĵo kaj paragrafo de prozo, kiel ankaŭ ĉiu poemo, entenis en siaj versoj kaŝitan baton por iu. Mi konis modernajn radikalojn, kiuj estis ofenditaj de la fortaj pikoj de Voltaire. Kiam li laŭdis pastron, li igis lin ridinda por ĉiam. Kiam li konfesis fidon al iu populara superstiĉo aŭ dogmo, li tion faris tiamaniere, ke ĉiu alia perdis sian fidon. Li rapide iĝis tiel ofenda, ke la reĝo forigis lin el la lando.

Voltaire vivis dum iom da tempo ĉe la kortego de Frederiko la Granda de Prusio. Li penis instrui al tiu princo, eviti militon kaj vivi pace kun siaj najbaroj. Li, mem, malŝatis militon, ridindigis la soldatojn de sia kaj aliaj reĝoj, ridindigis naciismon — kaj provizis nutrajon al la armeo de la reĝo je granda profito por si. Li bezonis monon, ĉar li ĉiam provis eviti iun aŭ alian registaron. Li loĝis la pli multon de siaj lastaj jaroj en Ferney, Francio, proksime al la svisa landlimo. Foje Francio iĝis tro nekomforta por li, kaj li ofte kuris el la landlima urbo en Ĝenevon, kie li subtenis alian loĝejon, aŭ al tria hejmo, kelkajn mejlojn for, sur germana tero. La aŭtoritatuloj de Ĝenevo tuj ordonis lin aresti pro la krimo de aranĝo de privataj teatraĵoj en sia domo.

Li bezonis grandajn sumojn da mono por daŭrigi la diversajn propagandojn, kiuj interesis lin. Li elspezis dekojn da miloj de dolaroj por liberigi la familion de Jean Calas kaj helpi aliajn viktimojn de religia persekuto. La tutan vivon li militis por forigi la torturon de la kondamnitoj. Ne ĝis 1780 ke oni fine forigis torturon en francio. Li provizis hejmojn por mil ducent horloĝistoj, ekzilitaj el Ĝenevo de la fanatikismo de tiea protestanta komunumo. Li batalis kontraŭ ĉiu formo de sklaveco. Li publikigis kaj fordonis nekalkuleblajn pamfletojn. Kiam li estis preskaŭ sesdekjara, je aĝo kiam la pli multo de homoj estas pretaj eksiĝi, li komencis la plej gravan parton de la laboro de sia vivo. Li nepre intencis direkti ĉiujn siajn fortojn al la detruo de la eklezio. Li konstante parolis pri ĝi en siaj leteroj kiel "la Monstro". Anstataŭ "fidele via" ĉe la fino de letero, li ĉiun fojon skribis "E' crasez l' Infame" — *Dispremu la Monstron.* Li komencis labori pri sia "Filozofia Vortaro", ĉiu paĝo de kiu estas plena de faktoj kaj argumentoj kontraŭ superstiĉo kaj la eklezio, kaj por racio kaj scienco. En tiu ĉi, kiel en siaj antaŭaj verkoj, li tre efike uzis la armilojn ironio kaj mokado. Li vivis sufiĉe longe por vidi sian verkon produkti rezultojn.

Kiam Voltaire estis okdekdujara, li reiris al Parizo. La dekreto de ekzilo kontraŭ li ankoraŭ efikis. Li iris malkaŝe kaj sen timo, li ne provis akiri la permeson de la reĝo, sciante, ke la registaro ne kuraĝos ĝeni lin. Li iris tien por prezenti teatraĵon, kiun li antaŭ nelonge finis. La registaro ne kuraĝis aresti lin, ĉar tuta Parizo konsideris Voltaire personon eĉ pli granda ol la reĝo. Li ne nur sukcese prezentis sian teatraĵon, sed en kunveno de la franca Akademio, en kiu li kaj Benjamin Franklin, la eminenta amerika sciencisto kaj pionira liberpensulo, estis la honoraj gastoj, Voltaire persvadis la akademion entrepreni la taskon kompili la unuan enciklopedion. Oni donis unu literon al ĉiu membro. Voltaire entreprenis la literon "A," ĉar, kiel li klarigis, tiu litero necesigas la plej grandan laboron. Lia sola bedaŭro je la tempo de sia morto estis, ke lia laboro restis ne finita. Li deziris vivi pli longe, por doni la lastan fortan baton al religio.

Voltaire mortis en Majo, 1778. Kvankam li estis la heroo de Parizo, kaj eble pro tio, la eklezio ne permesis enterigi lin. Li mortis ne farinte pacon nek kun la eklezio, nek kun la dio. Kiam pastro sin trudis al la lito de Voltaire, la maljuna agitanto sin levis en la lito kaj puŝis lin kaj diris "Iru for". Ĉar la eklezio posedis monopolon de ĉiuj enterigejoj en la lando, la amikoj de Voltaire devis sekrete preni lian korpon al malgranda urbo cent dek mejlojn for de Parizo por certigi enterigon. La eklezio estris morton kiel ankaŭ la vivon. La pastro, kiu permesis la enterigon, kvankam li ne sciis kies estis la korpo, estis forkomuniigita.

Dekunu jaroj post la morto de Voltaire, la granda franca revolucio eksplodis, kaj la Bastillo estis detruita de la kolerigitaj homoj. Al ili la Bastillo estis simbolo de epokoj de subpremo. Ĝi estis speciala malliberejo en kiun oni metis malamikojn de la reĝo. Preskaŭ ĉiu intelekta homo en Francio iam estis interne de ĝi. Voltaire, kiel mi jam diris, loĝis tie kiel gasto de la reĝo dum preskaŭ unu jaro. Kelkaj malliberuloj estis tiel longe tenitaj tie, ke ili eĉ forgesis siajn nomojn. Ĉio, por kio la Bastillo simbolis, falis en kelkaj monatoj. La 1an de junio 1791 Ludoviko XVI, reĝo nur laŭ nomo, estis devigata subskribi dekreton, aprobitan de la nova Nacia Kunsidantaro, kiu ordonis, ke oni solene portu la Korpon de Voltaire al Parizo, por tie ripozi en la Panteono. Dum la procesio pasis ĉiun vilaĝon, diras Victor Hugo, urbestroj kaj aliaj oficistoj, kaj soldatoj alvenis por marŝi parton de la vojo. Sur la vojo, je cent dek mejloj, floroj estis disĵetitaj. Muzikistaroj ludis la Marsellaise. La franca popolo sentis, ke ĝi gajnis sian liberecon, kaj pro tio honoris Voltaire'on.

La urbestro de Parizo, la granda delegitaro de urbaj oficistoj kaj aliaj organizitaj korporacioj, renkontis la procesion ĉe la pordegoj de Parizo kaj eskortis ĝin al la loko de la falinta Bastillo. Tie, kie staris la turo en kiu Voltaire estis enfermita, oni faris pilon el la ŝtonoj de la ruinigita malliberejo. Sur tiu kruda altaro dum unu nokto kaj unu tago restis la korpo de Voltaire, poeto, pensulo, filozofo kaj humanisto. Li estis la plej eminenta agitan.o, kiun la mondo iam konis. Li helpis pli ol iu alia por renversi la malnovan ordon de socio. La homoj sciis tion kaj solenis lian korpon. Nelonge post tio ili dehakis la kapon de sia reĝo kaj ĵetis lian korpon en kaŭstikan kalkon.

La reĝo sciigis kaj komprenis kion li faris por prepari la mensojn de la homoj por forskui siajn katenojn. Kiam la familio Bourbon estis restarigita sur la trono de Francio en 1814, la ostoj de Voltaire kaj Rousseau estis elprenitaj el la Panteono, laŭ ordono de la reĝo, ŝutitaj en puton sur la rando de Parizo kaj detruitaj per kalko. En tiu malica, bagatela maniero la reĝo venĝis per ĉio restanta de la plej eminenta pensulo, kiun Francio iam produktis. Sed spite reĝojn kaj pastrojn, la pensoj de Voltaire ankoraŭ vivas. Lia potenco estas limigata nur pro nescio de la homoj.

Mi havas nek la tempon nek la forton por paroli al vi hodiaŭ pri la multaj aliaj homoj, kiuj batalis por libereco de penso. Mi ne havis tempon por paroli al vi pri Rousseau, la franca ateista verkisto, aŭ pri Victor Hugo, aŭ pri Charles Bradlaugh, la viro, kiu estis elektita kvin fojojn al la brita parlamento, kaj kvar fojojn oni rifuzis al li lian lokon tie pro tio, ke li estis ateisto. Centoj da eminentaj viroj kaj virinoj oferis la tuton, aŭ parton, de siaj vivoj al la lukto por emancipo de la homa menso. Miloj kaj dekoj da miloj faris la saman batalon, kaj hodiaŭ la mondo eĉ ne konas iliajn nomojn.

Estas unu punkto al kiu mi devas atentigi vin, tamen, kaj eble ĝi estas pli grava ol ĉiuj aliaj. Ĉiu lando, pri kiu la historio rakontas al ni, ĝuis dum iu parto de

sia historio multe da libereco de penso. Grekio havis sian epokon da libereco, ankaŭ Romo. Egiptio havis sian epokon de scienco, kaj eĉ Hispanio iam ĝuis periodon de intelekta libereco kaj gloro. Nuntempe, oni supozas, ke Usono staras ĉe la supro de ĝia scienca epoko. Nu, rimarku tiun ĉi fakton. Ĉiu nacio, kiun mi menciis, havis sian liberecon *kaj perdis ĝin*. Ili perdis ĝin, ĉar tiu intelekta libereco, tiu disvolvo de la menso, estis monopolo de malgranda parto de la homoj en tiuj nacioj. Malgranda aro de la homoj akiris por si intelektan liberecon, dum la granda plimulto ruliĝis en superstiĉo, nescio kaj fanatikismo. Ĉiun fojon la nescia, stulta, bruta plimulto triumfis super la intelektuloj de sia lando kaj detruis ilian sciencon kaj ilian liberecon.

En Ameriko hodiaŭ estas granda malplimulto, kiu estas intelekte libera. Ankaŭ estas granda plimulto nescia, superstiĉa kaj fanatika. En preskaŭ ĉiu ŝtato en Usono la homoj religiaj, fanatikaj kaj nesciaj, penas per leĝa forto subpremi la instruon de scienca vero, malpermesi instruon pri la sciencaj doktrinoj de evoluado, kaj devigi la instruon de religio, mitologio, kaj fe-rakontoj en la lernejoj. Grandaj organizaĵoj ekzistas nur por financi la aprobon de tiaj leĝoj, kaj aliaj organizaĵoj ekzistas por devigi religian instruon al infanoj, kaj por devigi al iliaj pliaĝuloj festi dimanĉon laŭ la kristana maniero. Militiro por revivigi religion kaj mitologion bone progresas. Milionoj da dolaroj estas donitaj por tiu celo de grandaj kapitalistoj. Kelkaj ŝtatoj jam aprobis tiajn leĝojn. La prezidanto de Usono solene anoncas, ke "Neniu nacio povas vivi sen dio", kaj la vic-prezidanto verkas por la jurnaloj deklaron, ke "li kredus, ke Jonaso glutis la balenon, se li trovus tion en la biblio." La fortoj de superstiĉo estas bone organizitaj, kaj senlima kvanto da mono apogas ilin. Ni havas malpli da libereco de penso nuntempe ol antaŭ kelkaj jaroj. En tiu ĉi lando, kiel en Grekio, kaj Romo, kaj Hispanio, kaj Egiptio en la estinteco, la fanatika, nescia, superstiĉa plimulto nun penas preni for de la pensuloj de la nacio ilian liberecon.

Nia sola espero estas eduki tiun specon de homoj. Ni devas doni sciencon al la vulgaruloj. Ni devas alporti filozofion al la laboristoj. Ni devas eltiri la farĉaĵon el iliaj kapoj kaj enmeti iom da racio anstataŭ se ni tion ne faros, ili tute malpermesos al ni uzi niajn cerbojn.

## Pri la bavara Konkordato

Tre estimata redakcio!

En via N-o 2 vi skribis, ke nur kelkaj eminentuloj sciencaj kaj popolinstruistoj kontraŭbatalis la bavaran konkordaton. Tio estas ne la tuta protesto. Ni liberpensuloj, unue, en granda kunveno publike protestis kaj, due, demandis skribe kaj parole, ke, — se kaj dum ia religia societo ricevos monrimedojn de la ŝtato, la liberpensuloj ricevu proporcie laŭ la nombro de siaj membroj. Konforme al la paragrafo 137 de la konstitucio de Weimar (Vejmar) „Sub religiaj societoj estas komprenataj organizaĵoj, kiuj estas kunligitaj en komunan kulton pro ia mondkoncepto." La bavara parlamento respondis, ke tia demando estos atentata de la registaro.

Kun saluto libera

*D-ro. Theilhaber (München).*

## *Kongreso de Liberpensuloj*

*La XIXa Internacia Kongreso de Liberpensuloj sub la aŭspicioj de la "Fédération Internationale des Sociétés de Libre Pensée" okazos 15-16-17-18 Aŭgusto en la Salle Danton, Hotel de Societes Savantes, Rue Serpente, Paris. La Kongreso estos malfermata la 15an de Aŭgusto je 14.30. Dimanĉon 16a okazos diskuto pri internacia lingvo kiam S-ro E. E. Yelland (Londono) en la nomo de la Internacia Ligo de Liberpensuloj faros paroladon pri Esperanto. Do, estas dezirinde, ke multaj samideanoj ĉeestu por subteni la paroladonton. Nia samideano Profesoro Th. Hartwig de Brunn (Ĉekoslovakujo) parolos pri "La Bavara Konkordato" la 17an de Aŭgusto. Por sukcesigi la akcepton de Esperanto ni pruvu al la ĉeestantoj, ke la lingvo vivas. Kotizo 20 Fr. Frankoj. Pluaj detaloj de Dr. M. Terwagne, rue dé l'Ecuyer, 25, Bruxelles aŭ de E. E. Yelland, 3, Fonthill Road, Finsbury Park, London N. 4.*

*Samideanoj en Parizo estas petataj aranĝi ekspozicion ĉe ĉi tiu kongreso kaj uzi sian influon.* *E. E. Y.*

### Pagu

vian kotizaĵon. Pro la malbona financa situacio de la ligo ni baldaŭ estas devigataj rezigni je nia gazeto. Granda parto da membroj ĝis nun ne pagis. Insiste ni petas, sendi tuj monon, aŭ vi estas helpanto de la kontraŭuloj, kiuj certe triumfus se nia gazeto malaperus. Do pagu per via landreprezentanto aŭ rekte al la sekretariejo. Germanoj pagu al **Kurt Hubricht, Leipzig-Neustadt,** poŝtĉekkonto Leipzig 43808.

*Ni bonvenigas en niajn vicojn nian amikon JAN ZAWADA energia batalanto por LIBERA PENSO kaj ESPERANTO, reveninta el malliberejo en Polio, kaj deziras al li sanon kaj forton en ĉi tiu dorna vivo.*

### MANUSKRIPTOJ

Ni bezonas manuskriptojn por la venontaj numeroj, do sendu artikolojn kaj tradukojn rekte al S-ino T. Sujadinova Yelland, 3, Fonthill Road, Finsbury Park, London N. 4.

### Landreprezentantoj

Anglio: S-ino Sujadinova-Yelland, 3 Fonthill Road London N.
Aŭstralio: S-ro Victor Rutland, 316 Riley Street, Surry Hills, Sidney.
Aŭstrio: S-ro Otto Stöber, Humboldtstraße 46, Linz a. Donau.
Bulgario: S-ro Iv. Sarafov, Pleven [Progrimnazio].
Ĉeĥoslovakio: S-ro Theodor Kilian, Jiráskova 317, Dolni Kounice.
Germanio: vidu Estraro (unua paĝo)
Hungario: S-ro Hugai Ferenc, Gyöngyös.
Japanio: S-ro Raitaroo Munemura, Nagoja, P. O. Box 3.
Jugoslavio: S-ro Paskal Bogdanoviĉ, Komixa-Vis.
Litovio: S-ro Lindas Alseika, Biržai.
Nederlando: vidu Estraro. (unua paĝo)
Polio: S-ro J. Szpacenkopf, Willa Eugenja Ciechocinek.
Rusio: H. Frank, Leningrad Gubkom Esperantistov, ulica Pleĥanov 2.
Ukrainio: S-ro G. Tuisov, Kremenĉug-Pesĉana-Gora, Maksimovski 3
Usono: S-ro Karl Fröding, 419, 7 th. st., Rockford, Ill

La landreprezentantoj prizorgos la aferojn en sia lando. Ili estas ankaŭ rajtigataj alpreni kotizojn.

**Ĉia en-kaj eksterlanda Literaturo**

speziale: Liberpensa, socialista, komunista, kaj esperanta, estas liverata plej rapide [poŝtelspezoj ne estas kalkulataj] de **Kurt Hubricht**
Leipzig-Neustadt, Mariannenstr. 22

Ĉiu Esperantisto devas legi

**Kion vualas la Biblio?**

nun presita broŝure.
Prezo: 15 pfenigoj, Angle 2 d., France 1 frc. kaj aliaj landoj samvalore.
Havebla ĉe:
**Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, Leipzig-Neustadt.**

**GAZETO "QUEEN SILVER"**

Kiu scias anglan lingvon devas vidi specimenon de supra gazeto, eldonata de 14 jara knabino, unu el plej interesaj kaj instruaj liberpensaj gazetoj.
Sendu 1/4 Dolaro por specimeno al:
**QUEEN SILVER, R 4, BOX 567, INGLEWOOD, KALIFORNIO.**
Germanoj mendu ĉe:
**KURT HUBRICHT, MARIANNENSTRASSE 22, LEIPZIG-NEUSTADT.**

Eldonejo: Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, Leipzig-Neustadt (Germanio). — Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio).

1-a Jaro, Numero 4 Dumonata Julio—Aŭgusto 1925

# Liberpensulo

Oficiala Gazeto de la Internacia Ligo de Liberpensuloj

Estraro de Internacia Ligo de Liberpensuloj: Prezidanto: *C. F. Everts*, Alb. Cuyp-Str. 169, *Amsterdam* (Holando). Vicprezidanto: *Gustav Weigel, Bodenbach-Peiperz 14* (Ĉekoslovakio). Sekretario: *Kurt Hubricht* (Adreso: vidu apude). Kunsidanto: *M. Bartzsch*, Lochmannstrasse 4, *Leipzig-Stötteritz* (Germanio). Landreprezentantoj: Adresojn vidu sur lasta paĝo.

Sekretariejo: Kurt Hubricht Mariannenstrasse 22, I. Leipzig-Neustadt (Germ.) Poŝtĉeka numero: 43808 Leipzig

Por membroj senpage. La kotizo por la Ligo estas laŭ plaĉo, sed minimume gmk. 1.50 aŭ sama valoro. Manuskriptojn bonvolu sendi al la gazetkomitato. Adreso: S-ino *T. Sujadinova*, 3 Fonthill Road, *London N 4* (Anglio). Represo de artikoloj permesata nur se oni citas la nomon de nia gazeto. Sendu du pruvekzemplerojn.

## JOSEPH Mc CABE


### (JOSEF MAK KEJB) UNU EL PLEJ ENERGIAJ BATALANTOJ POR LIBERPENSO EN ANGLIO

Iama monaĥo, rektoro de romkatolika kolegio, estas nun unu el la plej famaj liberpensuloj, tutmonde konata pro siaj verkoj kaj tradukoj. Post la forlaso de la romkatolika eklezio en la jaro 1896, Joseph Mc Cabe senlace batalis kontraŭ religiaj superstiĉoj. Li verkis centon da plej kleraj libroj; li tradukis liberpensajn verkojn el multaj lingvoj, kaj faris milon da kontraŭreligiaj prelegoj en Britio, Usono kaj Aŭstralio.

Lia unua verko, "Dekdu Jaroj en Monaĥejo", estas treege interesa priskribo de la interna vivo de britaj kaj belgaj monaĥejoj, kaj bona malkaŝo de la romkatolikismo. Dum kelkaj jaroj, jam estinte monaĥo de la Franciskana fratularo, Mc Cabe ekdubis pri la vereco de tio, kion oni instruis al li. En deziro enketi plu, li komencis studi la filozofion ĉe la Universitato de Louvajn, en Belgio. Li tiel sukcesis, ke post unu jaro de studado li ricevis la katedron de profesoro de filozofio ĉe la granda Franciskana monaĥejo en Londono.

Dum lia vivo en Belgio Mc Cabe havis okazon studi tieajn monaĥejojn, kaj trovis la monaĥojn eĉ pli frivolaj kaj drinkemaj ol en Anglio. En ambaŭ landoj li trovis, ke frivoleco, klaĉado kaj intrigo estas parto de monaĥeja vivo. Naŭzita de tia speco de vivo, li plezure akceptis oficon kiel rektoro de Kolegio St. Bernardine, en la urbo Buckingham en Britio.

En tiu periodo de preparado de estontaj pastroj Patro Antonio (tia estis lia monaĥa nomo) pli kaj pli dubis pri la vereco de sia kredo. Fine, en 1896, li sentis ke li devas definitive forlasi la eklezion. Tute senmona, li havis malfacilan ekziston



J. Mc CABE
antaŭe Franciskana monaĥo Patro Antonio

dum certa tempo. Sed fine lia menskapablo triumfis, kaj li trovis eldoniston por siaj verkoj. Li tradukis verkojn de Profesoro Haeckel, la fama germana monisto, kiuj vendiĝis po miliono. Liaj biografioj de Goethe, Talleyrand, Bernard Shaw ktp. estis multe admirataj de la literatura mondo; liaj verkoj pri astronomio, fiziko, evoluado de la homo kaj aliaj sciencaj verkoj estas ĉie legataj.

Fine, sed ne plej malgrave, liaj kontraŭreligiaj verkoj kiel "La Papoj kaj ilia Eklezio", "La influo de Kristanismo sur Homa Civilizo" ktp. estas bonegaj bataliloj por liberpensuloj en anglalingvaj landoj. Ne kontenta je sia verka laboro, Joseph Mc Cabe konstante faras paroladojn por liberpenso. Nur antaŭ kelkaj jaroj li vojaĝis Aŭstralion por batali tie dum tri monatoj per plumo kaj lango kontraŭ la tiea kreskanta povo de la romkatolika eklezio. Efektive, ni britaj liberpensuloj rajtas fieri pri nia klera kaj laborema samideano!

*K. R. Sturmer.*

Jen kelkaj titoloj el 65 verkoj de J. Mc Cabe (makkejb).

"The Bible in Europe" — analizo de la pretendo ke kristanismo civilizis Eŭropon, 224 pĝ.

„The Religion of Woman" — analizo de la pretendo ke kristanismo helpis al la virino.

"The Bankruptcy of Religion" — sumigo de ĉiuj akuzoj kontraŭ ĉia religio, 208 pĝ.

"The Twilight of the Gods" — mia plej lasta diskuto pri la kondamno kontraŭ ĉia religio de moderna kulturo, 128 pĝ.

"The Church and the People" — kiu refutas la pretendon ke religio faris ion por la homoj, 96 pĝ.

Eldonistoj: *Watts & Co. Johnson's Court,* London E. C. 4.

# La XIX. Kongreso de la Internacia Federacio de Liberpensaj Societoj

La Kongreso okazis en Parizo 15.—18. Aŭgusto 1925. D-ro Terwagne (Bruxelles) prezidis. 150 ĉeestantoj el 20 nacioj (oficiale) sed laŭ nia kalkulo ne pli ol 12.

La bezono de internacia lingvo estis forte sentata. Multaj kongresanoj tute ne komprenis ion ĉar la francoj faris la francan lingvon la lingvo de la kongreso. Naciaj delegitoj legis tradukojn de siaj paroladoj en franca lingvo plej ofte tre-ege malbone parolataj; kaj germanoj, perdinta paciencon sidi kaj nenion kompreni, petis ke almenaŭ ĉiu germano parolu ankaŭ germane. Kelkaj angloj opiniante ke estas malŝparo de tempo sidi kaj nekompreni, tute forlasis la kongreson. La restintaj angloj petis, ke almenaŭ la rezolucioj estu tradukitaj anglen, kaj oni tradukis nur ,du. Angla delegito private rimarkis al unu komitatano, ke la angloj estas tre ĝenataj pro nekompreno kaj ke la paroladoj devus esti tradukotoj anglen. "Ho, la angloj devas paroli france" respondis la komitatano. "Ĉu vi francoj membroj de la kongreso parolas angle?"

Ha ne, respondis franco, ni francoj ne parolas angle, sed la angloj devu paroli france."

Nekomprenante la paroladojn, la angloj ne estis kompetentaj voĉdoni kaj forlasis la kongreson tiel ŝaĝaj kiel ili venis, krom s-ro Mc. Cabe, kiu faris bonegan raporton pri situacio en Anglio, kaj edziĝo de socialdemokrato Macdonald kun la eklezio. Mc. Cabe (Mak Kejb) estis la plej perfekta parolanto de franca lingvo el la alilandanoj.

La programo de la kongreso estis pli granda ol la tempo permesis; kelkaj raportoj de delegitoj ne povis esti faritaj. inter ili la raporto pri nia Ligo, nia gazeto, la letero de Queen Silver ne estis legita, krom mallonga raporto pri ŝi.

Post malferma parolado de d-ro Terwagne, kiu esprimis deziron pri Unuigitaj Ŝtatoj de la mondo, la sekretariino Pardon faris sian raporton pri la laboro kaj granda sukceso de la Federacio.

Reprezentanto de la franca federacio raportis pri la laboro de francoj kies 7,400 membroj postulas forigon de Ambasadorejo ĉe la Vatikano.

Post la raporto de itala delegito pri la tiraneco de Mussolini super la konscienco la publiko, la kongreso voĉdonis unuanime: Malhonoron al la faŝista reĝimo. La pola delegito raportis kun indigno pri la teruraĵoj de blankuloj en Polujo kaj pri la persekutoj, kiujn faras la katolikoj kontraŭ iu ajn konscio nekatolika. La Kongreso kondamnis la reĝimon kiel abomenan kaj sendis telegramon kontraŭ ekzekuto de Bowin kaj proteston kontraŭ maljusta juĝo de laboristoj Hibner, Kniewski kaj Rutkowski.

D-ro Bartosek (Ĉekoslovakio) parolis pri "La persekuto de la religia malplimulto en Aŭstrio," kaj pledis batali por la rajto de homoj vivi ekster ĉiu religio.

Dum debato pri "Religio kaj lernejoj" oni decidis insisti pri instruo de moralo laika en la lernejoj anstataŭ la religio. Holanda delegito raportis pri netoleremo de ilia pastraro. En Belgujo la pastraro ĉiopova enkondukis religian instruon en ĉiujn lernejojn.

Belgaj socialistoj defendis sian koalicion en parlamento kun katolikoj, sed la kongreso tamen malaprobis ilian sintenadon kiel liberpensulojn.

Laŭ propono de s-ro Horace Thivet pri Moralo Laika Internacia oni konsentis studi la principojn de moraloj estontaj.

Speciale interese estis raporto de d-ro Bartosek pri la pozitiva laboro de la Libera Penso en Ĉekoslovakio kaj pri la bona organizacio de laikaj orfejoj en tiu lando.

Oni parolis ankaŭ pri: la militoj kontraŭ Rifoj kondamnanta ĝin; la neceso ke ĉiuj proletariaj organizacioj aliĝu al la federacio; la laikaj festoj, kaj aliaj aferoj. Tiom da aferoj restis por la lasta tago, ke oni maĉis ĉiujn.

Oni kondamnis militojn kaj postulis, ke konscia rifuzo militservi estu ankaŭ rajto de Liberpensulo.

D-ro Hartwig, membro de nia ligo, raportis tre interese pri la grava Konkordato de Bavario.

Aliaj oratoroj parolis pri nova kalendaro; Alkoholo; Voĉdonrajto al virinoj. Pri monumento Ferrer, kiun la germanoj dum milito deprenis, kaj kiun la belga registaro post multa klopodo de Liberpensuloj remetis sur la lokon forigintе ĉiujn surskribojn kaj lasis ĝin, do anonima, raportis s-ro Robyn.

La kongreso akceptis la jenon kiel fundamenton de la Federacio.

*"La Libera Penso batalas kontraŭ ĉiuj fortoj, kiuj penas teni ĉiujn privilegiojn por si kaj kiuj estas kontraŭ evoluo de sociala kulturo bazanta sin sur scienca socialismo kaj sur moralo racia.*

*Ĝi aprobas ĉiujn batalojn, inkluzive la revolucian klasbatalon, kiuj emas al la progreso kaj al la egaleco de rajtoj ekonomiaj kaj sociaj de ĉiuj homoj."*

## Pri internacia Lingvo

Jam estas tagmezo de lasta tago de Kongreso (Mardo).

Ankoraŭ kelkaj programeroj ne estas tuŝitaj. Inter ili

### Lingvo internacia

kiu estis sur la programo por dimanĉo. La sekretariinon oni jam ne vidas; la Prezidanto adiaŭas, ĉar li devas trafi vagonaron, kaj transdonas la Prezidantecon al d-ro Bartosek; multaj komitatanoj jam estas for; la Prezidanto demandas ĉu oni daŭrigu; oni decidas daŭrigi post lunĉo, je 3,30 ptm.

Tuj nia delegito de nia Ligo enkondukis la paroladon mallonge pri Esperanto en angla kaj Esperanta lingvoj. La parolado, origine verkita angle de nia delegito, devis esti tradukita francen kion faris nia samideano s-ro Dubois pere de Esperanto. La parolado donis faktojn pri la sukcesoj de Esperanto en diversaj sferoj, kaj citis la Katolikan Esperantistan Kongreson samtempe okazanta en Parizo. Subite aperas homoj, kiuj tute ne partoprenis en la Kongreso stariĝas kaj komencas fari proponojn pri diversaj internaciaj lingvoj, ĉiuj laŭdantaj la sian. Vidante tiun konkuron de lingvoj, la Vizprezidanto leviĝis kaj proponis kiel internacian — la lingvon pri kiu oni dum la tuta kongreso ne kverelis, nome la francan. Estis decidite ne plu debati ĉi tiun temon. Kvankam preskaŭ ĉiuj en la kongreso opiniis, ke Esperanto estos adoptota; sed neniu povis debati, ĉar la proponantoj de lingvoj eluzis la mallongan tempon je la dispono por la problemo,

*E. E. Jelland.*

# La Troglodítoj kontraŭ Darvin

## Proceso en Simiurbo

La grandioza ekspozicio en Wembley, Londono, la plej mirinda el ĉiuj epokoj, paliĝas antaŭ la famo de Dayton (Dejton, Usono, nun moke nomata Simiurbo.

Kiu ne legis pri la proceso kontraŭ J. T. Scopes (Skops), Instruisto, okazinta en Simiurbo. Ne aŭdita krimo meze de kampo de la Troglodítoj!

S-ro J. T. Skops, instruisto, instruis al lernantoj en publika lernejo biologion, dum kiu li diras vortojn ne laŭ la biblio. Nur fajrero falis, kaj la brulo estas granda — la tuta terglobo troviĝas en granda ekscito.

En Simiurbo mem, predikistoj ĉiuspecaj, kaj nigraj kaj blankaj, forgesinte siajn kverelojn, tondradis samtone sur la stratoj kontraŭ adeptoj de simioj. Unuj deklaras, ke ili parkere scias la biblion; unu el ili, ke li scias kiel komunikiĝi kun Dio, kio kostas nur 40 dolarojn. Tra la tuta urbo la muroj afiŝitaj de kristanaj troglodítoj krias: "Ĉu ni pagas impostojn por fordoni niajn infanojn al diablo?" "Ĉu infero aŭ lernejo?" . . . Diversspecaj reprezentantoj de Dio freneze predikas tage kaj nokte sur la monto (por esti similaj al Jesuo) defendante la biblion. Virinoj junaj promenas tra la stratoj kun larĝaj rubandoj trans la brusto kun surskribo "Vi ne faros min simio". Evidente ili preferas esti promenantaj ripoj de Adamo kaj esti faritaj el materialo el kiu estas fabrikataj la ostaj butonoj sur iliaj bluzoj. Ĉie la troglodítoj, kiuj laŭte bruas. Al Evolucianoj ne estas permesate paroladi publike. Kŭin Silver (Kalifornio) skribis al mi, ke "la granda milito ne kaŭzis tian eksciton ĉe Usonanoj, kiel ĉi tiu proceso." El la tuta Ameriko "saĝaj" kristanoj

alfluis al Simiurbo, tiom ke la granda placo, sur kiu oni konstruis specialan estradon por juĝi Darwin, ne povis enteni ĉiujn trogloditojn, soifaj por vidi Darvinon kondamnota. La scivolemuloj devis gluiĝi al fenestraj bretoj de ĉirkaŭaj domoj, al arboj, bariloj. La proceso komencis laŭ troglodita moroj per preĝoj. La Darvinanoj, kiuj havas aliajn kutimojn, protestis, ke juĝejo ne estas preĝejo. Sed la trogloditoj ne respektas la kutimojn de nunepokanoj kaj daŭrigis dum ĉiuj postaj tagoj de la proceso preĝi en la juĝejo.

La ĉefa atakanto estis William Jennings Bryan (Viljam Ĝennings Brajan), dufoje kandidato por la Usona prezidanteco, sed kiu ambaŭfoje malsukcesis elektiĝi; la sama, kiu kaŭzis, ke la aŭtoritatoj malpermesis al 12 jara knabino Kŭin Silver paroladi publike ĉe subĉielaj kunvenoj, kiun rajton ĝuas ĉiuj religiaj predikistoj, en Kalifornio; la sama, kiun ŝi invitis letere kaj pere de gazetoj veni kaj debati kun ŝi publike pri Evoluo, kion li rifuzis fari. Certe li ne sciis ion pri aŭ legis Darvinon.

La juĝantaro konsistis el: 6 baptistoj, 4 metodistoj kaj la ceteraj el aliaj kristanaj sektoj. Neniu el ili legis nek Darvinon, nek liajn disĉiplojn. Fakte unu el ili ne scis legi aŭ skribi.

La defendanto de Skops postulis, ke oni pruvu science ĉu la homo devenis de speco de simioj aŭ ke la mondo estis kreita en ses tagoj. La juĝantaro tute rifuzis diskuti la aferon el tiu vidpunkto, kaj juĝis Skops por rompo de la leĝo laŭ kiu estas malpermesata la instruo de Evoluo en publikaj lernejoj. Profesoro Daroo rimarkis, ke logike oni devus malpermesi la instruon de Koperniko, ke la suno troviĝas en la centro de la suna sistemo kaj ne la tero. Je tio la juĝisto respondis, ke la registaro havas rajton instrui en siaj lernejoj kion ĝi deziras. Do, se la registaro ne deziras havi iun aferon kun globforma tero, la instruisto devas instrui, ke la tero estas plata kaj kvarangula kiel tion volas la biblio.

Unu profesoro demandis, se la instruisto devas diri al la infanoj, ke estas nur 6000 jaroj post la kreo de la mondo, kiel do, la kaliforniaj arboj estas pli aĝaj ol tio. Ankaŭ, se dio kreis la sunon je la kvara tago, kiamaniere povis esti tagiĝoj kaj vesperiĝoj en la tri unuaj tagoj laŭ kiuj oni povas kalkuli la tagojn. Tago havas 24 horojn, kaj ne estis suno por kalkuli la tagojn.

Protestoj kontraŭ la kulpigo de Skops alvenis el ĉiuj partoj de Ameriko de famaj sciencistoj. Dro. Rabe, profesoro de Kolumbia universtitato, proponas ke la universitatoj de Usono konsideru la atestojn de lernejoj en la Ŝtato Tenesi kiel ne validajn. Li ankaŭ pensas, ke malpermeso instrui la teorion de Evoluo estas ofendo al civilizo kaj atenco sur la sendependeco de la scienco.

La fama sciencisto kaj elpensinto Edison en sia letero de protesto postulas, ke oni lin metu sur la benko de krimuloj, se Darvinismo estas krimo.

La ĉefa troglodito V.G. Brajan estis la malbona spirito kiu inspiris tiun leĝon en Tenesi. Li gajnis la proceson, Skops, alie Darvin perdis. La juĝisto monpunis Skops je 2 00 dolaroj, sed la proceso ankoraŭ ne estas finita, ĉar Skops tuj donis avizon de apelacio al plej alta instanco; do, ni aŭdos pli pri tiu leĝo estonte. Brajan, ebria pro sia venko, preparis projekton laŭ kiu la teorio de Evoluo de Darvin devus esti malpermesata esti instruata en ĉiuj lernejoj de Usono . . kiam Dio, ŝajne pensante, ke tio estas ja troe permesi ankaŭ tiun frenezaĵon, vokis lin subite rekte en sian paradizon. Jam ne estas V.G. Brajan inter ni. Neniu ploros . . . Nenia perdo . . . La monumenton neputreman starigis al li la knabino Kŭin Silver, dediĉinte al li broŝuron "From Monkey to Bryan" (De Simio ĝis Brajan). En ĝi ŝi eternigas por estontaj generacioj la genezon de la ĉefa troglodito de la 20a jarcento. En miloj da ekzempleroj ĉi tiu broŝuro estis disdonata sur la stratoj de Dejton dum la proceso.

Al tiuj, kiuj ŝatus havi tiun broŝuron en angla lingvo, mi sendos ekzempleron por naciaj poŝtmarkoj sufiĉaj por afranki du alilandajn leterojn. En tiu broŝuro estas portretoj de tiu fama troglodito sur ĉiuj ŝtupoj de lia evoluo. *T. Sujadinova-Yelland.*

# Religia Socialismo

Ĉu povas esti religia socialismo? Ne multon oni bezonas por pruvi, ke "religia socialismo estas sensencaĵo. Socialismo celas la homan feliĉon sur la tero. La religio diras ke ĉia sorto, bona kaj malbona, estas sendita de Dio. Nenia ribelo kontraŭ la mizera stato, kaj obeemo al la estraro. Mizerulo havos pli bonan vivon poste en alia mondo. Al religiuloj ne necese estas plibonigi la ĉi tiean ekonomian staton. Male la socialistaj movadoj. Ili volas havigi per evoluo aŭ revolucio pli bonan vivstaton ĉi tie sur la tero.

La diferenco inter religio kaj socialismo estas en tio; ke la religio celas plibonigi la homojn, kaj tiamaniere plibonigi la sociajn aferojn. La socialismo male penas plibonigi la ekonomian staton, tiam ankaŭ la homoj pliboniĝos. La saman ideon D-ro Adler el Vieno prezentas tiel: "Al pordo, kiu devas esti fermota, la kristanismo pendigas tian surskribon: Oni estas petataj fermi la pordon." La socialismo uzas aŭtomatan pordfermilon. Malgraŭ tio, oni volas miksi religion kun socialismo.

En la programo de la social-demokrata partio staras: Religio estas afero privata. Tiu frazo, ŝajne, ne taŭgas por la granda parto de socialistaj gvidantoj. Mi rimarkis, ke, jam antaŭ la granda milito, socialistoj iom malamike rigardis la nombron de la liberpensularo kreskanta. Hodiaŭ ili ne malkaŝas sian simpation por la eklezio. Jen kelkaj pruvoj:

James Brown, membro de la angla laborista partio (antaŭe ministo), en 1924 fariĝis Sinjoro ĉefa Komisaro de la skota eklezio.

La germana eksministro Sollmann diris en 1923 "Mi pensas ke Germanio povas esti savata el sia mizero nur, se la grandaj spiritaj potencoj, kristanismo kaj socialismo, iros kune sur la sama vojo. "Komparu tion kun la vortoj de Bebel" Kristanismo kaj socialismo estas kontraŭaj unu al la alia, kiel fajro al akvo." En Deventer (Holando) socialista urbkonsilanto voĉdonas por malpermeso de blasfemo. Ĉie hodiaŭ oni cedas al la eklezio. Pastroj skribas en gazetoj por popolo, pastroj fondas unuiĝojn de religiaj socialistoj.

Ĉu en tio ne estas kaŝita intenco kurbigi returnen la socialistan movadon. En 1905 dum la konferenco en Jena Bebel diris: "La eklezio bone sciis akomodi sin al la sociaj sistemoj kaj ekonomiaj ordoj kiuj aperis kaj malaperis en daŭro de jarmiloj. Kaj mi diras al vi, ke se iam venos la Lasta Decida Paŝo kaj la Centrum (germana katolika partio) estos devigata diri: nun ni ne povas kontraŭstari al la socialismo, "tiam mi vetas mil kontraŭ unu, ke la predikantoj de la kristana amo por la proksimulo, kiuj antaŭe pledis por la feŭda ordo, nun — por la burĝa, pledos tiam por socialismo. Kaj ili pruvos al vi tute klare kaj precize ke kompare kun ili vi estas fuŝistoj, ke la nova testamento en diversaj punktoj absolute estas por la komunismo; do, ne estas ia diferenco inter katolikismo kaj socialismo."

Pro la nuna amikeco de socialismo kaj eklezio oni preskaŭ povas pravigi la starigon de liberpensulaj partioj. En Triebes (Germanio) oni provis efektivigi tiun intencon. En Holando ekzistas jam societo kun devizo: "Liberpensuloj al la parlamento." Ili partoprenas jam kiel memstara partio dum balotoj. En Svedio ekzistas jam "Liberpensula Popola Partio." Al enketo, sendita okaze de balotado por regna prezidanto de la liberpensuloj al la diversaj partioj, respondis la dekstraj partioj por eklezio, la social-demokratoj tute ne respondis, la komunistoj respondis flanke de la liberpensuloj. Laŭ la lasta decido de la germanaj komunistoj oficisto ne rajtas aparteni al iu eklezio, tion oni postulas ankaŭ de la membroj.

La fundamento de socialismo estas la libera penso. Tial, unue, la spirita liberiĝo, poste la ekonomia. Religia socialisto estas reakcia progresulo. La liberpensuloj estas la antaŭgvardio de la socialismo. *K. H.*

# La sankta Monprofito

En unu bavara gazeto oni legas jenan anoncon: Ĉar ne ĉiuj kristanoj povas iri al Romo dum la Sankta Jaro, mi estas komisiita de roma firmo akcepti mendojn por aĵoj kiel rozarioj, krucoj, oraj koroj, sanktigotaj en la preĝejo de Sankta Petro. Per aĉeto de tie sanktigitaj objektoj, ĉiu katoliko ricevos diajn favorojn. Por ke

ne estu falsaĵoj, al ĉiu sanktigita artiklo estos ligata oficiala sigelo. La aĵoj devas esti pagataj antaŭ ilia sanktigo, alie la absolvoj ne estos efikaj. Mendojn akceptas por Bavario: Schneck, Furstenfeldbruck...
"Mondo volas esti trompata", diras la latin proverbo.

# Tri grandaj leĝoj

*QUEEN SILVER*

Ĉiuj objektoj, kia ajn estu la amplekso aŭ pezo, estas tirataj al la centro de la tero. Ni nomas tiun ĉi tiradon la Forto de Gravitado, kaj la klarigon de Newton pri tiu ĉi fenomeno — la Leĝo de Gravitado.

Ĉar tiu ĉi principo estas aplikebla kaj al organika kaj neorganika materio, kaj al ĉiu suno kaj planedo, ni diras, ke la Leĝo de Gravitado estas natura kaj universala. Nia scio pri ĝia apliko estos modifebla pro postaj sciencaj eltrovoj, sed neniu iam nuligos tiun leĝon. Ĝi estas parto de la neskribita leĝo pri la suna sistemo. Ĝi estas parto de la universo. Ĝi estis unue formulita de Sir Isaak Newton.

La dua granda leĝo de la universo estas la Leĝo de Evoluado. Tiu ankaŭ estas universala leĝo. Ĉiu atomo da materio, ĉiu formo de vivo, ĉiu socia kaj politika sistemo, eĉ ĉiu penso en la cerbo de ĉiu vivaĵo, ne nur estas mem la produkto de evoluado, sed ĉe ĝi estas jam procedo de plua evoluo en ion alian. Evoluo estas la leĝo de eterna ŝanĝiĝo. Ĝi tenas en si la ŝlosilon al la tri grandaj problemoj, kiuj agitis la cerbojn de homoj en ĉiu epoko:

Kiu mi estas?
De kie mi venas?
Kien mi iras?

Studante la Leĝon de Evoluo, une klare difinita de Charles Darwin, la homoj eltrovis la respondon al siaj "Kial"'oj.

La tria granda universala leĝo eltrovita de scienculoj estas la Leĝo de Relativeco. Nenio estas absoluta. Nenio staras sola. Ĉia materio, ĉiu antaŭeniro kaj reakcio, ĉiuj manifestacioj de forto, eĉ tempo kaj spaco, devas esti konsiderata relative al ĉio alia. Ĉio moviĝadas, tamen pri objektoj en rilato al aliaj objektoj, oni diras ke ili estas senmovaj, parolante relative.

Ni kuras sur la tero; sed la tero, kiu ŝajnas al ni staranta senmove, efektive, moviĝas je grandega rapideco. Studu la Leĝon de Relativeco kaj vidu kiel ĝi rilatas al via ĉiutaga vivo. Ĝi estas simpla kaj facila por kompreni, se vi ignorus la matematikajn formulojn de Einstein kaj aliaj sciencistoj.

Priatentu, kiel ĉio kion vi faras rilatas al io alia, al io kion vi faris, al io farita de iu alia, al io, eble, kio okazis antaŭ tre longa tempo.

Vi sentas malsaton, ĉar vi scias la senton, kiun oni havas post bona manĝo. Se vi neniam estus varma, vi neniam scius kio estas, senti malvarmon. Se vi neniam estis malfeliĉa, vi havas neniun rimedon por pruvi, ke vi nun estas malfeliĉa. Se vi neniam estus laca, vi ne ripozus. Se oni neniam portus vestaĵojn, neniu scius kio estas nudeco. Vi estas varma, ĉar vi ne estas malvarma, kaj al eskimo via "malvarmo" povas esti premanta varmo. Maljusto estas maljusta nur ĉar ĝi ne estas justo. Infano estas ĉiam bona, se ĝi ne estas malbona.

La Leĝo de Relativeco montras al ni, ke nenio en la universo estas fiksita. Ĉiu normo estas relativa. Ĉiu mezurilo kaj pezilo dependas de iuj aliaj faktoroj. Ne ekzistas mezurilo per kiu oni povas mezuri la socion. Oni neniam povos konstrui pesilon kiu montrus absolute la ĝustan pezon.

Gravitado kuntenas la universon. Evoluado devigas ĉiun atomon en tiu universo ŝanĝiĝi, moviĝi kaj evolui en ion pli bonan. Relativeco faras la vivon interesa, kaj inda, por ĉiu vivaĵo sur la tero.

Ĝi estas la balancbaro de la universo.

# En la regno de dio

**Britio.** La populariĝo de la scienco de senfadena telefonio donis al pastroj novan vójon por trudi sian religion. Ĉiudimanĉe ili dissendas diservon. Estas aŭskultantoj, kiuj protestas, ke oni uzu iliajn kotizojn por rekompenco al propagandistoj de kristanismo. La Radia Kompanio ĉiel provas praviĝi tiun dissendon. Sed por tiuj, kiuj forŝiriĝis de kristanismo, estas netolereble aŭskulti al la ege malsprita parolado de la diaj apostoloj.

Kia ja estos la intelekta stato de homoj, kiuj eterne faras la saman enuigan babiladon?

Se la Radia Stacio estas uzata por religiaj prelegoj, estas juste, ke ĉiu opinio havu rajton sin esprimi. Sed ne, ne estas permesate diri, ke kristanismo malhelpas evoluon de la moralo kaj de la socio. Eĉ de vidpunkto religia la aranĝo estas maljusta, ĉar nur kristanoj povas paradi siajn stultajn banalaĵojn. Al nekristano oni permesas paroli kondiĉe, ke li ne tuŝu kristanismon.

---

Alia aspekto de radio. Angla pastro verkas pri ĝi en paroĥa gazeto. Li aŭdis, ke "la radiaj aŭskultiloj difektas la aŭdadon, kaj, eble, baldaŭ la kuracistoj ricevos grandan nombron da pacientoj kun difektitaj oreloj". Vi vidas, ke la oreloj de lia ŝafaro iĝis gravaj por li. "Vi ne povas adori nur per aŭskultado. Vi bezonas la spiritan atmosferon, tion oni ne povas dissendi per Radio", li daŭrigas.

Se la homoj kutimiĝos aŭskulti al religio ĉe si, kion faros la pastraro, ĝia nombro ja falos.

Jen la vera kialo de la pastra zorgado pri oreloj de aliaj.

---

Oftaj estas ĉe la piaj homoj la memestimo kaj impertinento. Ĉe elekto de pastro A. kiel sekretario de Baptista unuiĝo, la elektito kvazaŭ ne volis akcepti la oficon, kaj diris: "La fakto, ke la konsilantoj tute unuanime elektis viron kia mi, konvinkas min, ke dio subtenas la alvokon". Do, vi vidas, ke dio paŭzas de sia administrado de la universo por decidi, ke Sinjoro A. estas la sola viro, kiu kapablas agi kiel sekretario de la Baptista unuiĝo. Oni permesu al ni tute humile sugesti, ke jen estas ŝajne la klarigo de okazintaj tertremoj kaj superakvegoj. Se la ĉiopova Dio, anstataŭ sin okupi pri la funkciado de la universo, kuras por serĉi sekretariojn por la Baptista unuiĝo, kaj predikistojn por kapeletoj, oni ne miru, se aferoj ne tute glate iras. Oni devas memorigi al la Sinjoro, ke la plej gravaj aferoj bezonas atenton unue.

*El "Freethinker" kompilis Batalhakileto.*

# Noa kaj la malsano ĉe hufo kaj buŝo

*QUEEN SILVER*

Antaŭ kelkaj miloj da jaroj, laŭ la biblio, viro nomata Noa estis ordonita konstrui dom-boaton kaj meti ĝin en kompletan muzeon de natura scienco. Du rakontoj pri tio transdoniĝis al ni: unu diras, ke ĉia vivaĵo estis metita po paro en la arkeon, dum, laŭ la dŭa diro, sep estis la nombro. Ĉar ambaŭ rakontoj estas en la biblio, vi devas kredi al ambaŭ, kvankam du kaj sep estas ŝajne konfliktaj. Alie, vi iros en la lokon, kie oni neniam ĉesas fluigi la brog-vaporon. Tamen, maljuna Noa havigis paron aŭ sep — da ĉiu vivaĵo. Iu kristano diras, ke li malgrandigis la elefanton ĝis la amplekso de pulo, kaj aliajn bestojn laŭ sama proporcio, por loki ilin en la arkeon. Kolektinte specimenojn de ĉiuj mambestoj, li kaptis specimenojn el ĉiuj insektoj, ĉirkaŭ ses cent mil specojn da ili, kaj metis ilin en deponejon. La redaktoro bedaŭras, ke kinofotografisto ne fotografis Noa'n dum li kolektis la pulojn, pedikojn, cimojn, serpentojn, moskitojn kaj tabanmonstrojn. Noa ne havis mikroskopon, sed li havis tre bonan vidon. Poste li faris kompletan kolekton de ĝermoj de ĉiuj malsanoj konataj al homo kaj ĉe besto. Li volis konservi ilin por la posteuloj. Li faris kompletan kolekton de difterio, variolo, tuberkulozo, antrakso k. t. p. Ĵus kiam Noa konkludis, ke lia laboro estis finita, tuj kiam ekpluvis, dio diris:

"Atendu minuton, Noa. Vi ne havas ĝermojn de la malsano ĉe hufo kaj buŝo" (ĉe bestoj).

Nu, je tiu tempo Noa estis laca. Kvankam li povis vidi ĉion, videbla nun nur per moderna miskroskopo, lia vidado komencis iĝi tiel malforta, ke li ne povis vidi ion pli etan ol tio videbla per mikroskopo. Ankaŭ, Noa jam senpacienciĝis. Li iris en la arkeon kaj pelis tute-sanan bovinon en la pluvon. Poste li pelis bovinon, jam malsana ĉe hufoj kaj buŝo, metis ĝin en la arkeon, fermis la pordon kaj riglis la fenestron.

Jen kial, se oni kredu al la biblia rakonto, Kalifornio perdis milionojn da dolaroj kaj multajn milojn da brutoj dum la lasta printempo. Jen kial oni severe kvarantenis; kaj la vojoj al la montoj kaj al Arizona estis fermitaj por ĉia trafiko, kaj kial niaj parkoj estis fermitaj.

Kalifornio povas danki Noa'n, ke li konservis la malsanon, kaj danki dion, por tio, ke li diris, ke li konservu specimenon de ĉia vivaĵo. Kalifornio nuntempe sentas tiel dankema, ke ĝi serioze konsideras starigon de la leĝo por devigi, en ĉiuj publikaj lernejoj, legadon el la biblio.

Kaj tamen, kelkaj homoj arogas diri, ke "homo distingiĝas de malaltaj bestoj pro sia kapablo rezoni."

## Liberpensuloj kaj militservo

La suba elĉerpaĵo el la 8a bulteno de Internacio de Militkontraŭuloj pruvas, ke nereligiaj militrifuzantoj ne ĝuas la samajn rajtojn kiel la religiuloj, ankaŭ ĝi montras kiel la liberpensuloj devas batali por siaj rajtoj.

"En Svedio ekzistas leĝo ebliganta alternativan servon por religiaj rifuzantoj, kiel en Danujo.

*Al nereligiaj rifuzantoj ne estas permesata alternativa civila servo. Oni malliberigas ilin.* Leĝprojekto por ebligi civilan servon ankaŭ al nereligiaj rifuzantoj estis prezentita al la lasta Rijkstag, sed oni malakceptis ĝin, same kiel la projekton pri drasta malgrandigo de la armeo. Nuntempe Svedujo havas Social-demokratan registaron, kiu nun preparas projekton por malgrandigo de la armeo. *Ĝi ricevos subtenon de "Liberpensula Popola Partio".* *K. H.*

## Esperanto kaj la Tria Tutpola Kongreso de Liberpensuloj en Varsovio

La 3a Kongreso de la Asocio de Polaj Liberpensuloj salutas kore la aperon de memstara organo de internacia liberpensularo "La Liberpensulo" kaj la Internacian Ligon de Liberpensuloj; al ĝi la kongreso deziras efikoplenan sukceson en ĝia laboro. Samtempe la kongreso konsilas al ĉiuj polaj liberpensuloj scipovantaj la lingvon Esperanto, aboni al "La Liberpensulo", kaj al kiu ne scias la lingvon komenci studi ĝin, kaj tiamaniere helpi persone kunligi liberpensulojn de ĉiu lando. Kune laborante, ni pli rapide atingos nian celon.

### Imitinda.

*Freier Gedanke* (Libera penso) oficiala gazeto de la Ligo de Proletariaj Liberpensuloj en Ĉeĥoslovakio intencas doni angulon por Esperanto en sia por junulara aldono.

## Bibliografio de Internacia Liberpensula Gazetaro.

(Daŭrigo; Vidu N 1).

### Anglio

*The Literary Guide* (La gvidanto tra Literaturo Racia Revuo. Fondita 1885. Angla. Monata. Eldonata de Watts & Co. Johnson's Court. Flet Street. London E. C. 4

*The Monthly Record* of the Sout Place Ethical Society. Monata. Redaktoro S-ro C. J. Pllard. „Shanklin". The Avenue. Chingford. London E. 4

*The ethical Societies chronicle.* (Kroniko de Etikaj Societoj) Fondita 1923. Redaktoro R. Dimsdale Stocker. 55, Prince of Wales Mansions. Battersea Park, London. S.W. 11.

### Aŭstrio

*Der Freidenker* (La Liberpensulo). 1895 Germana. Monata. Eldonata: Freidenkerbund. Oesterreichs. Redaktoro Dr. Robert Endres. Wien VII. Hermanngasse 2.

*Freie Weltanschauung* (Libera Observo de la mondo). 1922. Monata. Germana. Eldonejo: Freidenker Verein. Salzburg. Arbeiterheim. (Vidu en Liberpensulo n-o1 Freundschaft-amikeco).

*Der Bücherfreund.* (La Libroamanto). Literatura Revuo por naturscienco, ateismo kaj socialismo. 1923. Germana. Monata. Adreso: Rudolf Cerny. Wien XVI/2 Liebhardsg. 46.

### Belgio

*La Raison* (La Racio, la Prudento). 1925 Franca. Adreso: 17, Rue de La Fourche. Bruxelles.

### Francio

*L'Action Antireligieuse* (Kontraŭreligia ago-do) 1925. Franca. Monata. Oficiala organo de Fédération Nationale des Libres Penseurs de France et des Colonies. Eldonata de Andre Lorulot. Conflans-Honorine (Seine-et-Oise).

### Usono

*Queen Silber Magazine* (Revuo de *Kuin Silver*) Kvaronjara. Fondita 1923. Redaktorino Qween Silver R4, Box 567 Inglewood, California.

**Estonte ni publikigos regule la komunikojn de la „Internacio de Proletariaj Liberpensuloj."**

## Recenzoj

*Jarlibro 1925*, eldonita de: Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE). 88 paĝoj. 2200 adresoj. Prezo: Bonvalutaj landoj: 1 sv. franko. mezvalutaj: 3 fr. fr. malbonvalutaj: —.60 gmk. Eldonejo: Novaj Tempoj, Leipzig-Co., Klemmstr. 14. Germanio. La adresaro estas tre utila al geinstruistoj de la tuta mondo. Bona propagandilo inter instruistaro.

*Kontraŭ Dio!* Ateista Krestomatieto. 28 paĝoj kaj kovrilo. Broŝuro. Prezo 0.60 sv. fr. Eldonita de SAT, Colmstr. 1, Leipzig-Stött. Germanio. Bone presita, kun bildoj. La enhavo konsistas el 14 artikoloj kaj 4 poezioj tre interesaj. Ĉiu liberpensulo ja legu ĝin.

*Nova Revuo Internacia anarkiista.* La esperantistaj anarkiistoj, anarkisindikalistoj kaj aliaj antiaŭtoritatuloj fondintaj "Tutmondan Ligon de Esperantistaj Senŝtatanoj" (Adr.: J. M. Esperanto, 9 Rue Louis Blanc, Paris), eldonas en Berlin revuon "Libera Laboristo" (Adr.: Eldona Komisiono, Artur Bolle, Berlin N 58, Tresckowstr. 58) tute en Esperanto. — Nro. 1 sur 16 paĝoj, 4°, enhavas inter aliaj gravaj artikoloj: "Raporto pri la IIa kongreso de Int. Lab. Asocio en Amsterdam", "La moderna anarkiismo", "La batalo pro la ĉiutaga pano" de Rudolf Rocker kun antaŭparolo: "Pri la klasbatalo", "Anarkiismo, sindikalismo kaj antimilitarismo en Aŭstrio" de Pierre Ramus, "La ruĝa reakcio" (El bulteno de l' Unuigita komitato por la helpo al enkarcerigitaj revoluciuloj en Ruslando). L' antimilitarisma fako enhavas tradukon de "La reformacio" el "Vivu la milito" de Bruno Vogel kaj "Metamorfozo".

### Internacio de l' Instru-Laboristoj

## Internacia enketo pri rilatoj inter lernejo kaj eklezio

Vi bonvolu respondi tiun enketon plej detale, koncerne vian landon. La respondoj kaj nomoj de la respondintoj aperos en la ĝenerala raporto,[1]) eldonata de l' Internacio de l' Instru-laboristoj pri tiu temo. Fratan dankon. Respondojn sendu al: M. Boubou, 96, rue Saint-Marceau, Orleans (Loiret) Francio.

1. Ĉu estas en via lando tuta diseco inter eklezio kaj ŝtato? Klarigu! . . .
2. Ĉu la diversgradaj pastroj estas pagataj de ŝtato (distrikto aŭ urbo)?
   a) kiom da pastroj diversgradaj?
   b) kiom da mono ŝtato elspezas por ilin pagi?
   c) kioma estas la tuta enspeza buĝeto de ŝtato?
3. Ĉu religiemaj lernejoj (konfesiaj, privataj) estas subvenciataj de ŝtato?
   a) kiom pagas ŝtato (distrikto, urbo) por religiema lernejaro?
   b) kiom pagas ŝtato (distrikto, urbo) por nereligia lernejaro?
   c) kiom pagas ŝtato por armeo (tera, mara kaj aera)?
4. Komparu la religieman lernejaron unuagradan kun la nereligia (publika)?
   a) pri nombro de lernejoj, de geinstruistoj, de lernantoj.
   b) pri nombro de porinstruistaj lernejoj (ĉu estas privataj el ili?)
   c) ĉu por ambaŭ lernejaro samaj diplomoj estas postulataj?
5. Ĉu pastroj kaj religiistinoj rajtas instrui en lernejoj?
6. Ĉu estas kontrakto (konkordato) inter eklezio kaj ŝtato pri lernejo?

[1]) La raportoj aperos en gazetoj "Novaj Tempoj" kaj "Liberpensulo".

7. Skribu historion de via lernejaro rilate al eklezia influo.
— de 50 jaroj — ĉefe de la milito — datoj, faktoj, dokumentoj —

8. Ĉu estas en via lando instruo de religio en ĉiuj popollernejoj?

a) ĉu la instruisto mem instruas religion? — aŭ la pastro? — aŭ kiu?

b) ĉu la instruisto estas instruita pri religio en pedagogia lernejo?

c) ĉu li povas rifuzi instrui religion?

d) ĉu la religiemaj lernantoj estas kunigataj en apartaj lernĉambroj?

e) ĉu tiakaze la senkonfesiaj klasoj pli sukcesas?

f) ĉu lernejo estas inspektata de religiistaj aŭtoritatuloj?

g) ĉu pastro povas eniri lernejon post lernotempo por instrui katekismon...

h) ĉu lernejon pastro povas uzi por religiaj festoj, manifestacioj?

9. Ĉu en la vilaĝoj la instruisto estas ĝenata de l' agado de la pastro?

a) ĉu estas leĝe toleretaj dum lerntempo forpermesoj al knaboj — diservantoj (akolitoj) pretekste de meso, geedziĝo, enterigo.

b) ĉu en via lando la instruisto vilaĝe iras meson por kanti, ludi orgenon, kantigi infanojn...?

c) ĉu ŝtato protektas instruiston kontraŭ klaĉagado de pastro aŭ de klerikalularo...

10. Kiel rilatas la tuta instruistaro de via lando pri l' influo eklezia?

a) ĉu la instruistoj emas sin liberigi?

b) kian agadon entreprenas por tio la instruistaj asocioj, sindikatoj?

c) ĉu estas necese eliĝi el Eklezio por ne pagi la eklezio-imposton?

d) ĉu la instruistoj multaj eliĝas el eklezio?

e) ĉu ili postulas plenan neŭtralecon de la lernejo, monopolon de la publika instruado, sin montras decidemaj liberpensantoj?

11. Citu lastajn leĝojn, dekretojn, cirkulerojn (de ŝtato, ministro de instruado, aŭ de internaj, aŭ de kultaj aferoj) pri lernejo kaj religio — citu datojn kaj opinion de l' instruistaro —

12. *Bibliografio.* Citu la fontojn (se eble oficialajn) de ĉiuj viaj dokumentoj: oficiala ŝtatgazeto, ministraj raportoj, edukistaj aŭ liberpensaj gazetoj ... Citu la literaturajn verkojn en kiuj estas kritikata la klerikaligo de la publika lernejo. Sendu gazetojn pri tiu temo kaj simbolajn bildojn, karikaturojn pri l' influo de l' eklezio sur la lernejon.

## Landreprezentantoj

Anglio: S-ino Sujadinova-Yelland, 3 Fonthill Road London N.
Aŭstralio: S-ro Victor Rutland, 316 Riley Street, Surry Hills, Sidney.
Aŭstrio: S-ro Otto Stöber, Humboldtstraße 46, Linz a. Donau.
Bulgario: S-ro Iv. Sarafov, Pleven [Progrimnazio].
Ĉeĥoslovakio: S-ro Theodor Kilian, Jiráskova 317, Dolni Kounice.
Germanio: vidu Estraro (unua paĝo)
Hungario: S-ro Hugai Ferenc, Gyöngyös.
Japanio: Joski H. Ishiguro, Koojimachi P. O. Box 1, Tokio.
Jugoslavio: S-ro Paskal Bogdanoviĉ, Komixa-Vis.
Nederlando: vidu Estraro. (unua paĝo)
Polio: Jan Zawada, ul. Kröla Lesczerynskiego 36 m. 2
Rusio: H. Frank, Leningrad Gubkom Esperantistov, 3-aja Sovetskaja n-o 2 I, kv. 25.
Ukrainio: S-ro G. Tuisov, Kremenĉug-Pesĉana-Gora, Maksimovski 3
Usono: S-ro Karl Fröding, 419, 7 th. st., Rockford, Ill

La landreprezentantoj prizorgos la aferojn en sia lando. Ili estas ankaŭ rajtigataj alpreni kotizojn.

## MANUSKRIPTOJ

Ni bezonas manuskriptojn por la venontaj numeroj, do sendu artikolojn kaj tradukojn rekte al S-ino T. Sujadinova Yelland, 3, Fonthill Road, Finsbury Park, London N. 4.

## Pagu

vian kotizajon. Pro la malbona financa situacio de la ligo ni baldaŭ estas devigataj rezigni je nia gazeto. Granda parto da membroj ĝis nun ne pagis. Insiste ni petas, sendi tuj monon, aŭ vi estas helpanto de la kontraŭuloj, kiuj certe triumfus se nia gazeto malaperus. Do pagu per via landreprezentanto aŭ rekte al la sekretariejo. Germanoj pagu al **Kurt Hubricht, Leipzig-Neustadt,** poŝtĉekkonto Leipzig 43 808.

**GAZETO "QUEEN SILVER"**

Kiu scias anglan lingvon devas vidi specimenon de supra gazeto, eldonata de 14 jara knabino, unu el plej interesaj kaj instruaj liberpensaj gazetoj.

Sendu 1/4 Dolaro por specimeno al:

**QUEEN SILVER, R 4, BOX 567, INGLEWOOD, KALIFORNIO.**

Germanoj mendu ĉe:

**KURT HUBRICHT, MARIANNENSTRASSE 22, LEIPZIG-NEUSTADT.**

Jus aperis

**JARLIBRO 1925**

de la Esperantisto-Instruistaro tutmonda

Enhavas pli ol 2000 adresojn el ĉiuj landoj

Necesa helpilo por la interrilato kun instruistoj kaj lernejoj en tutmondo

Prezo:
1 svis. fr. por bonvalutaj landoj
3 fr. fr. por mezvalutaj landoj
0,60 gmk. por malbonvalutaj landoj

Rabato:
16 proc. por 2 ekz-oj
25 proc. por 5 ekz-oj
33 proc. por 8 ekz-oj

Mendu kaj pagu al:
**M. Goldberg, Klemmstrato 14 Leipzig-Connewitz (Germanio)**

Ĉiu Esperantisto devas legi

**Kion vualas la Biblio?**

nun presita broŝure.

Prezo: 15 pfenigoj, Angle 2 d., France 1 frc. kaj aliaj landoj samvalore.

Havebla ĉe:
**Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, Leipzig-Neustadt.**

**Ĉia en- kaj eksterlanda Literaturo**

speziale: Liberpensa, socialista, komunista, kaj esperanta, estas liverata plej rapide [poŝtelspezoj ne estas kalkulataj] de **Kurt Hubricht**
Leipzig-Neustadt, Mariannenstr. 22

**NOVAJ TEMPOJ**

Internacia pedagogia revuo por la nova lernejo

Oficiala organo de TAGE

Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistoj

Demandojn kaj abonon sendu al:

**M. Goldberg, Klemmstr. 14 p., Leipzig-Connewitz (Germanio).**

Ĉiu liberpensula organizaĵo kaj ĉiu liberpensulo, uzu la servojn de nia "Internacia Ligo de Liberpensuloj".

Ĉiujn liberpensajn gazetojn mendu ĉe ni. Tiamaniere vi ŝparas monon por poŝtelspezoj kaj vi subtenas nian movadon.

Eldonejo: Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, Leipzig-Neustadt (Germanio). — Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio).

1a-Jaro, Numero 5 Dumonata Sept.—Dec. 1295

# Liberpensulo

Oficiala Gazeto de la Internacia Ligo de Liberpensuloj

Estraro de Internacia Ligo de Liberpensuloj: Prezidanto: *C. F. Everts*, Alb. Cuyp-Str. 169, *Amsterdam* (Holando). Vicprezidanto: *Gustav Weigel, Bodenbach-Peiperz 14* (Ĉekoslovakio). Sekretario: *Kurt Hubricht* (Adreso: vidu apude). Kunsidanto: *M. Bartzsch*, Lochmannstrasse 4, *Leipzig-Stötteritz* (Germanio). Landreprezentantoj: Adresojn vidu sur lasta paĝo.

Sekretariejo: Kurt Hubricht
Mariannenstrasse 22, I.
Leipzig-Neustadt (Germ.)
Poŝtĉeka
numero: 43808 Leipzig

Por membroj senpage. La kotizo por la Ligo estas laŭ plaĉo, sed minimume gmk. 2.— aŭ sama valoro. Manuskriptojn bonvolu sendi al la gazetkomitato. Adreso: S-ino *T. Sufadinova*, 3 Fonthill Road, *London N 4* (Anglio).
Represo de artikoloj permesata nur se oni citas la nomon de nia gazeto. Sendu du pruvekzemplerojn.

## NIA MOVADO

KARAJ AMIKOJ!

Estas nun nia devo doni al niaj membroj raporton pri la stato de nia Ligo, pri niaj sukcesoj kaj malsukcesoj. Kiam ni eldonis la unuan kajeron de LIBERPENSULO, ni estis plenaj je esperoj. Ni pensis sukcesi ĉe la Internacio de Proletariaj Liberpensuloj kaj ĉe la Fédération Internationale des Sociétés de Libre Pensée. Bedaŭrinde, niaj deziroj ne efektiviĝis. La sorto de la helplingva problemo en ĉi tiuj estintaj kongresoj montras al ni, ke en tiu afero la kreduloj estas pli progresemaj ol niaj liberpensaj amikoj. En Parizo iu aŭtoro de novebakita lingvo *Mondo* rekomendis sian artefaritan lingvon al kongreso, kvankam ne ekzistas eĉ unu homo kiu ĝin parolas, kaj la aŭtoro konfesis, ke li mem ne havis tempon por lerni paroli ĝin. Niaj spertoj ĉe tiuj kongresoj sugestas al ni, ke ni devas iri laŭ novaj vojoj por venki la liberpensulojn. Ni ne bezonas rezoluciojn por Esperanto, se ili ne estas praktikataj.

Malgraŭ tio, ni povas konstati, ke nia movado kreskas, kaj ke ni gajnas pli da influo ĉe la liberpensuloj. Nia Liberpensulo estas bone recenzata en kelkaj liberpensaj gazetoj, kiuj represas artikolojn el ĝi. Ni faris ankaŭ servojn al diversaj organizaĵoj. Kelkaj liberpensuloj-gvidantoj aliĝis al ni. Estas ankaŭ ĝojiga fakto, ke en kelkaj redaktejoj de liberpensaj gazetoj troviĝas esperantistoj.

Estas esperantistoj, kiuj diras, ke ni ne bezonas fakan gazeton. Ili eraras. Ni salutas la aperon de la gazetoj "Libera Laboristo", "Vegetarano", "Laborista Sporto" kaj aliaj fakaj gazetoj. Same kiel ili, ni, liberpensuloj, havas rajton kaj devas aŭdigi nian voĉon.

Per tia gazeto ni povas pruvi al internacia liberpensularo la uzeblecon de nia lingvo kaj povas meti ĝin je servo de Libera Penso.

Kvankam ne ĉiuj aspiroj estas plenumitaj, ni povas diri, ke nia morala stato estas kontentiga. Nia ekonomia stato estas ankoraŭ malbona. Tamen, ni esperas, ke en la venonta jaro tiu manko malaperos. Estas plezure al ni sciigi, ke ni ricevis de la administrintoj de la antaŭmilita liberpensula societo *Libera Penso*, S-ro Dauphin-Parizo, kaj Deshays-Marseille, la sumon de 393 fr. fr. Dankon al tiuj samideanoj.

Pro senlaboreco, aŭ aliaj kaŭzoj, kelkaj membroj ne povis pagi siajn kotizojn. Malgraŭ tio, ni daŭrigas sendi al ili la gazeton, en espero, ke ili pagos poste iom. Al la membroj, kiuj malavare sendis al ni monon, ni kore dankas. Nia gazeto estu utila kaj al ĉiu profita: vidu la noton "*Atentu*" en nuna numero.

En la venonta jaro ni raportos pri la kaso kaj membraro.

Pri mokoj kaj plendoj ni ne raportos, krom la plendo, kelkfoje en Polio oni ne ricevis la gazeton, kvankam regule sendita.

Niaj kapoj estas plenaj je projektoj kaj planoj. Inter aliaj lumas al ni la ideo aranĝi nian propran internacian kongreson.

Nia kampo estas la tuta mondo, ne la malvasta limo de iu lando.

Liberpensulo traflugu la terglobon kaj tiru la samcelanojn al nia Ligo, — parto de la barikado kontraŭ la marŝanta reakcio.

*K. H.*

## La Pola Konkordato

Kion pensi pri iu ajn Konkordato, ni ja scias. Ĝi estas restaĵo de la tempoj, kiam la tuta ŝtata povo apartenis al la papo, kiam ĉiu reĝo estis nur vasalo de la anstataŭanto de Kristo.

La fino de la 17a, la 18a kaj fine la 19a jarcento liberigis la civilajn ŝtatojn de sub la suverenco de la Roma potenco. Tamen la aŭtoritato de papo ne konsentas esti tute rompita; ĝi ĉiam penas fari interkonsenton kun ĉiu ŝtato por kiom eble efike regi la kredantojn. La reakciaj ŝtatoj tre volonte akceptas tiun ĉi helpon regi siajn subulojn; dividas la oficojn kun eklezio — kaj jen aperas Konkordato aŭ, alivorte, interkonsento inter la ŝtato kaj la papa povo, rilate al ilia politiko kaj sinteno en kvazaŭ-religiaj, tio estas ekleziaj kaj pri-kredaj demandoj.

Ju pli la ŝtato estas reakcia des pli la Konkordato estas favora al la politiko de pastraro.

En la jaro 1855 estis Konkordato inter Aŭstrio kaj Romo, transdonanta al la eklezio preskaŭ la tutan kulturan vivon de ĉi tiu lando, kiu en la jaro 1874 estis nuligita.

Ankaŭ en la jaroj 1821 en Germanio kaj 1847 en Rusio la Papo sukcesis aranĝi konkordatojn, sed ne tre favorajn al Romo pro ne sama kredo de la registaroj en tiuj landoj.

Post la milito la Pontifika politiko sin ĵetis al la plej reakciaj landoj por eltiri por si plej bonan parton. La unua konkordato estis la post-revolucia kun la Katolika Bavario en la jaro 1925; la dua Konkordato estis en Polio en la sama jaro. Pri la unua la legantoj de "Liberpensulo" jam scias; pri la dua ili plejparte nur aŭdis. Ni, do, cidos el ĝi la plej karakterajn ĉapitrojn kun aldono de necesaj klarigoj. Do:

"En la nomo de Plej Sankta kaj Nedividebla Triunuo.

Ĝia sankta Moŝto Papo Pio la XI kaj la Prezidanto de pola Respubliko Stanislaw Wojciechowski,

Dezirante difini la pozicion de katolika eklezio en Polio kaj fiksi la principojn laŭ kiuj dece kaj daŭre la eklezio gvidos la aferojn sur la tero de Respubliko,

Decidis fari Konkordaton."

Tiucele ili nomis siajn delegitojn (Kardinalo Petro Gaspari flanke de la Papo, kaj la Ambasadoro pola en Romo Wladyslaw Skrzynski kune kun prof. Stanislaw Grabski, ministro de religiaj kredoj kaj publika klerigado), kiuj, post interŝanĝo de rajtigiloj, interkonsentis:

Paragrafo I.

"La Katolika Eklezio ĝuas en Respubliko Pola tutan liberecon. La ŝtato garantias al la Eklezio liberan uzon de ĝia spirita povo kaj de ĝia leĝaro, same ankaŭ liberan administradon kaj mastrumadon de ĝiaj aferoj, ĝia havaĵo, en akordo kun Diaj leĝoj *kaj la kanonika juro.*"

Sed la kanonika (mezepoka eklezia) juro postulas plenan submetiĝon de ŝtata povo al povo roma, ĝi postulas edukon de ĉiuj katolikoj nepre en katolikaj lernejoj kaj nur de katolikaj instruistoj. Se, do, oni volas doni al eklezio tutan liberecon laŭ kanonika juro, oni devas forigi ĉiujn modernajn konstituciojn kun ilia libereco de kredo aŭ nekredo. Sed kia domaĝo al la papo, se fidela pola ministro tion subskribas. La reakcio povas ja fariĝi pli forta kaj, laŭ la konkordato § I kaj laŭ la kanonika juro, ili povas enkonduki eĉ inkvizicion = ĉio estas ebla...

Paragrafo II

"La episkopoj, la klerikuloj kaj la fideluloj povas libere kaj senpere interkomunikiĝi kun la Sankta Pontifiko. En plenumo de siaj funkcioj la episkopoj povas libere kaj senpere interkomunikiĝi kun sia pastraro kaj fidelularo kaj publikigi siajn postulojn, ordonojn kaj pastrajn leterojn."

Ankaŭ kontraŭ la ŝtato ili dank' al tio povas agi libere; kaj, ke ili estas pretaj tiel agi, konfesas tute libere la pastro W. Tworkoaski en sia broŝuro "Ĉu apartiĝi de Romo", en kiu li skribas: "Se ekestos ia konflikto inter Polio kaj Romo la klerikuloj iros kontraŭ la pola ŝtato." Sed dume la pola ŝtato povas trankviliĝi, ĉar la frateco inter la reganta burĝaro kaj la pastraro estas tre intima, pro komuna antikonstitucia kaj antiproletaria agado. Ĉiu ŝtato povas nun libere interkomunikiĝi kun Romo. Sed kun la IIIa Internacio neniu rajtas interrilati, nek aboni gazetojn, nek paroli iun vorton favoran al Sovetlando; tio estas punata kiel "ŝtatperfido" per 4—8 jaroj de malliberejo. La episkopoj povas libere sen cenzuro eldoni ĉion, kio ajn plaĉas al ili; sed la radikaloj, la plej simplaj, ne komunistoj kiel ekzemple la redaktoro de naci-radikala semajnorgano "Walka" (La Batalo) Wienawa-Dlugoszenski, estas severe persekutataj, iliaj gazetoj konfiskataj, la redaktejoj fermataj. Samtempe nia konstitucio diras, ke "ĉiuj civitanoj estas egalaj antaŭ la leĝo." — Kia mensogo!!!

Paragrafo IV

"La ŝtato devas helpi la efektivigon de eklezia decidoj kaj sekretoj... en ĉiuj okazoj antaŭviditaj per la deviga leĝo."

Kiu leĝo — la ŝtata aŭ kanonika? La rajton de interpretado de la konkordato havas ja la papo...

Paragrafo V

"La pastroj ĝuos dum la plenumo de sia ofico *specialan leĝan protekton*... ili ne povos esti devigataj militservi."

Paragrafo VII

— — "La Sankta Pontifiko *konsentas*, ke la pastraro armea apartenu en aferoj dum milita servo al la militista povo."

Kaj rekompence por tiu nôblanima *konsento*, —

en Paragrafo VIII

"La pastroj faros ĉiudimanĉe kaj la 3an de majo (nacia festo) liturgian preĝon por la bonstato de la Pola Respubliko kaj ĝia Prezidanto" (laŭvorte!).

Paragrafo XI

"La elektado de ĉefepiskopoj kaj episkopoj estas la rajto de la Sankta Pontifiko. Ĝia Sankteca Moŝto konsentas havi aprobon de la Prezidanto de la Respubliko... por scii, ĉu li ne havas ion el vidpunkto politika kontraŭ tiu elekto."

Ĉiupaŝe la roma supereco super la "sendependa" ŝtato!

Paragrafo XII

La elektitaj episkopoj kaj ĉefepiskopoj faros antaŭ la Prezidanto ĵuron de fideleco, en kiu inter alie ili diras "Mi ĵuras kaj promesas... ne partopreni en iu ajn unuiĝo, nek ĉeesti en iuj interkonsentoj, kiuj povus kaŭzi domaĝon al Pola Ŝtato aŭ al la publika ordo."

Sed ĉar la interpretado de konkordato apartenas al la papo, la eklezio decidas kio estas favora aŭ malfavora al la ŝtato. La pastraro laŭ tio povas partopreni en la *sekretaj* kleriko-faŝistaj organizaĵoj de la t. n. P. P. P. (Preparo de Polaj Patriotoj), kies membro mortigis la unuan Prezidanton de Polio — Narntowicz. — Tio estas *favora* al la ŝtato...

Dume oni fermas dekojn da sindikatoj kaj klerigaj organizaĵoj laboristaj.

Paragrafo XIII

"En ĉiuj publikaj lernejoj, krom la altlernejoj, la instruado de religio estas deviga... kompetenta ekleziularo inspektos la enhavon de la religia instruo kaj zorgos pri la moraleco de instruistoj."

La posedantaj klasoj, kiuj formas 90 % de studantaro en la universitatoj ne volas esti stultigataj per la pastraro. Nur la simpla popolo en popollernejoj kaj ankaŭ la mezburĝa gejunularo en la mezlernejoj estas edukataj laŭ kateĥismo kaj fantazia juda historio!

La fordono de la instruistaro al la kontrolo de pastraro estas grandega honto; kaj la pola geinstruistaro devas batali kontraŭ tio per tuta sia energio.

Paragrafo XIV

"La eklezia terposedaĵo ne estas objekto de jura akto, kaj pro tio la juro ne povas havi rajton gvidi ĝian destinon, *sen konsento de eklezia povo*."

Paragrafo XV

Ne estos impostataj, inter alie, "la monaĥejoj kaj monaĥinejoj, kiuj ĵuras malriĉecon, same la havaĵoj kaj juraj titoloj, kies enspezoj estas destinitaj al religia kulto."

Ĉi tiun multsignifan tekston oni povas apliki al la tuta havaĵo de eklezio!

Paragrafo XX

"Se la estraro de Respubliko havas iun plendon kontraŭ pastro *pro lia agado, kiu povas esti danĝera al la ŝtato*, la kompetenta ministro antaŭmetos la supre-nomitan plendon al la ordinanto (episkopo aŭ ĉefepiskopo), kiu kune kun la ministro *en la daŭro de tri monatoj* faros la necesajn esplorojn. En okazo de diverseco de opinio inter la ordinanto kaj la ministro la Sankta Pontifiko transdonos la aferon al *du* ekleziuloj, de li elektitaj, kiuj, kun *du* delegitoj de la Prezidanto de Respubliko, devas fari la finan decidon."

Kiaj ceremonioj kun la ŝtatkontraŭuloj en eklezia vestaĵo!

Kun aliaj "egalrajtaj" civitanoj oni ne ceremonias tiamaniere kaj ne donas al ili trimonatan tempon por forkuri.

Oni agas jene:

Jen laboristo protestas pro malalta salajro; alvokas aliajn kunsuferantojn al striko. La, de sekreta polico pagata, fabrikeja spiono denuncas lin tuj kiel "komuniston", "bolŝevikon". Oni arrestas lin pro "kontraŭŝtata agado"; la provokatoro ĵetas en lian ĉambron komunistan flugfolion aŭ gazeton; oni ĵetas lin en malliberejon, kie la kuraĝulo atendas dum unu, du aŭ eĉ tri jaroj por esti juĝata. Poste la juĝisto kondamnas lin je pluaj kvar jaroj pro aparteno al organizo, kies celo estas renverso de la socia kaj ŝtata ordo" la fama § 102 de carista punkodo! — kaj jen — tute laŭleĝe (??) la laboristo sidas entute kvin, ses aŭ sep jarojn, ĉar laŭ la sama carista proced-kodo oni ne enkalkulas la jarojn de atendo en la malliberejo. Tia estas, tute fidela priskribo, de la ŝtatordo en nia kvazaŭ "demokrata respubliko".

Paragrafo XXII

"En okazo de krima ago de pastro, la esplorjuĝisto sciigos ĉiujn detalojn pri tio al la episkopejo. En okazo de malliberigo ili estu tenataj en *apartaj* ĉambroj; en okazo de kondamno ili estu enfermataj en iu monaĥejo speciala por tio."

Paragrafo XXIV

"En okazo de parceligo de terhavaĵoj t. e., tiuj, kiujn la registaroj rusa, aŭstra kaj germana forprenis iam de la eklezio kaj kiuj nun fariĝis propraĵo de Pola Ŝtato, la eklezio ricevos: la episkopejo — 180 hektarojn(!), la pastra seminaro 180 hektarojn(!), la paroĥejo 15—30 laŭ la speco de grundo." Rilate al la tre aktuala nun en Polio agrara reformo:

"Por plibonigi la ekonomian kaj socian situacion de agrara parto de popolo kaj por atingi tiamaniere kristanan pacon en la lando, la Sankta Pontifiko konsentas, ke la Pola Respubliko elaĉetu de la eklezia havaĵo tiun parton de plugebla tero (do ne arbaroj!) kiu restas post la rezervo de 15—30 hektaroj por la paroĥejo, 180 hektaroj ĉe la Kapitolo (ĉefepiskopejo),

180 hektaroj ĉe la Episkopo, 180 hektaroj ĉe Pastra Seminario.

Krom tio la ekleziuloj povas *mem* elekti la parcelotan terpecon.

180 hektaroj sufiĉas por unu sekvanto de malriĉa Kristo, kiu ne havis lokon kie kuŝigi kapon sian.

Fine venas la salajro de ekleziuloj, kiun *la* ŝtato pagas el la impostoj sur la tuta loĝantaro (do de greko-ortodoksoj, protestantoj, judoj kaj nekredantoj), laŭ statistiko de ŝtataj oficistoj, jene:

La kardinaloj 2,500 punktoj plus 800 zlotoj aldonataj monate (1 punkto egalas 0,41 zlotoj) do kune 1825 zlotoj monate. Sperta laboristo ricevas hodiaŭ 180 ĝis 200 zlotojn monate.

Ĉefepiskopoj 2000 punktojn plus 600 zlotoj aldone
Episkopoj . . 1 700 punktojn plus 600 zlotoj aldone
Prepostoj . . . 270 punktojn ktp.

La relativa malgrandeco de Preposta salajro estas pro tio, ke la simplaj pastroj kaj Prepostoj ricevas krom tio pagojn por ĉiu eklezia ceremonio kiel: infanbaptado, edziĝo, enterigo, specialaj mesoj ktp., ĉar la ŝtato ne estas apartigita de la eklezio, ĉiuj estas leĝe devigataj bapti la infanojn, edziĝi en preĝejoj kaj esti enterigataj per pastroj. Dume nia voĉdonita, sed ĝis nun morta, konstitucio diras: "Oni garantias al ĉiu civitano kredan kaj konsciencan liberecon". *J. Z.*

P. S. Al ĉiu interesato mi volonte donos pli detalajn sciigojn. Adreso ĉe la sekretario.

## La Internacio de Proletaj Liberpensuloj


De 5. ĝis 8. de oktobro 1924 okazis en Vieno la unua kongreso de la Proletariaj Liberpensuloj. Ĉeestis delegitoj el Francio, Germanio, Rusio, Aŭstrio, Italio, Polio kaj Ĉekoslovakio; en tute 60. Estis decidite fondi Liberpensulan Internacion, en kiu enirus ĉiuj organizaĵoj bazitaj sur scienca socialismo. Speciale elektita komitato turnis sin al la Brusela Internacio kun propono akcepti la Vienan programon aŭ aranĝi komunan kunlaboradon.

La estraro de Brusela Internacio gratulis ilin pro ilia deziro kunlabori, sed bedaŭris, ke ĝi ne estas kompetenta akcepti aŭ ne la proponon.

Tiam la Proletaria Komitato invitis 34 proletariajn organizaĵojn al Teplitz (Ĉekoslovakio) dum Pentekosto 1925 kun la celo fondi Internacion. Ĉeestis rusoj (150000), germanoj (150000), aŭstroj (100000), poloj (50000), svisoj (20000), ĉekoslovakoj (30000). Kiel prezidanto de la Internacio estis elektita Prof. Hartwig, Brünn (Ĉekoslovakio); ĝenerala sekretario Frantzl, Vieno (Aŭstrio); Landsekretarioj: Mierczinski (Polio), Wolf (Germanio), Rostowzeff (Rusio), Fritsch (Francio), Beran (Ĉekoslovakio). Sidejo estas Vieno. Plue oni decidis eldoni internacian gazeton en franca, germana kaj ĉeka lingvoj. Ĝis nun ĝi ne aperis. La kotizo estas du germanaj pfenigoj po membro.

Dum la Pariza Kongreso en aŭgusto 1925 oni rezoluciis, ke ĉiuj liberpensaj organizaĵoj, ankaŭ tiuj kiuj staras por la klasbatalo estu akceptataj en la Federacio en Bruselo.

La Internacio de Proletariaj Liberpensuloj estas unuiĝo de ĉiuj socialistaj liberpensulaj societoj, kiuj celas plirapidigi la finon de la klasbatalo kaj liberigi la Penson el eklezia kaj aliaj mistikaj ideologioj.



ALFRED REHTZ

La Internacio denove kongresos dum 13. ĝis 15. de decembro 1925 en Leipzig. Ni deziras al ĝi grandan sukceson. *K. H.*

## ALFRED REHTZ

Alfred Rehtz estas poeto de la Libera Penso en Germanio. Liaj poemoj spiras la mondperceptón de la Naturo laŭ scienco de Darwin kaj Haeckel. Liaj unuaj poeziaĵoj estis dediĉitaj al Haeckel, kiuj laŭdis lin.

Rehtz estas instruisto, poligloto, interpretisto, idealisto, pacifisto, poeto kaj, komprenehle jam delonge Esperantisto. Nun li ankaŭ aliĝis al nia ligo de Liberpensuloj, kaj ni esperas en la venonta jaro ĝui liajn originalajn verkojn en Esperanto.

Antaŭ nelonge aperis lia verketo en germana lingvo "Der grüne Stern" (La Verda Stelo), belega versaro.

El la eldonejo: Verlag Die Wölfe, Leipzig-Plagwitz estas haveblaj liaj verkoj liberpensaj:

"Der arme liebe Gott" (La malfeliĉa kara Dio) — versoj.

"Sterne, Menschen und Dinge", (Steloj, Homoj kaj Aĵoj). — versoj.

Havebla ĉe Kurt Hubricht, Leipzig:

"Der grüne Stern" (La verda Stelo) — versoj.

Li verkis ankaŭ multajn pacifistajn poeziaĵojn.

Liberpensuloj, sciantaj germane, nepre havigu al vi la lastan verkon, pri kiu germanaj liberpensaj gazetoj donas bonegan recenzon. Ĝi estas bonega propagandilo por Esperanto inter tiuj, kiuj scias germane, eĉ en alilando.

Ni esperas, ke venontan jaron la Liberpensa mondo legos internacie sian talentan poeton. *K. H.*

## Potpurio en regno de Dio

Gazetoj raportis, ke mirakloj okazas en Rusio ĉirkaŭ la tombo de Lenin. Ni tute kredas, ke se oni havas certan malsanon kaj sufiĉe da kredo, tuŝo al la tombo de ateisto Lenin estas tute same efika kiel kredo en la povo de Jesuo. Tute ne gravas en kio oni kredas, ĉu en oblatoj (disketoj el nefermentita pano) Jesuo, Lenin, magnetaj zonoj aŭ malvarmaj terpomoj en la poŝo. La ĉefa afero estas forta kredo kaj la taŭga malsano. Se ni povus elvolvi sufiĉan kredon, en taŭgaj kondiĉoj, ni povus kuraci la malsanon eĉ per numero de Liberpensulo. Ni tute ne dubas ke kredo kuracas, ne gravas en kio oni kredas.

Oni ŝovas antaŭ niaj okuloj en jurnaloj jenajn esprimojn: la Protestanto-ateisto, la Kristano-agnostiko, la Kristanoj - anarkistoj, Kristanoj - komunistoj, Kristanoj-socialistoj, la Kristana Intelekta Kooperacia Eklezio kaj fine la kristana movado Nova Penso. Tiel ludante kun vortoj, la kristanoj profanas ĉiujn ateistajn vortojn... Sub tiuj nomoj la kristanoj transiros al posteuloj kun piedoj en ambaŭ kampoj, sed kun la kapo en neniu.

F-ino Owen, spiritista mediumo, diris al publiko en granda Memorial Hall, Londono, ke ŝi havis mesaĝon de kelkaj famaj homoj el spirita mondo, interalie de Charles Darwin. Li suferas riproĉon de konscienco, ĉar li forgesis doni lokon al Dio en siaj verkoj. Jen ĉio estas klara. Oni ne povis konverti lin kiam li estis viva, kaj la korpo ne povas paroli por sin defendi.

La moralo de kristanoj estas treege malalta, malgraŭ profesiaj kaj ne profesiaj pastroj, gardistoj de moralo. Ni sugestas,

ke la plej bona vojo, ĝustigi la aferojn estas, meti la profesiajn kristanojn je duonsalajro ĝis kiam la publikaj moroj pliboniĝos. Ni serioze rekomendas pagon laŭ rezulto.

Pastroj nun diras, ke nekredemo ekzistas ĉar oni estas nescia pri kristanismo. Kion la granda nigra armeo de pastroj do estis faranta dum tiom da jarcentoj? Ni ne volas kredi, ke ili havigis al si monon per falsaj pretendoj.

Schopenhauer diris, ke organizita filantropio estas konfeso, ke Dio ne povas varti siajn infanojn.

Anglikana episkopo de la katedralo Sankta Paŭlo, Londono, diris, ke li "tremas pri la ideo, kio okazus al la eklezio de ĉi tiu lando, se ĝi ne havus misiistojn en la britaj kolonioj kaj Azio."

Evidente, li ne havas iun esperon, konverti civilizitajn popolojn. Sole la necivilizitaj popoloj estas konverteblaj. Kristanoj scias, ke la intelekte malfortaj popoloj estas emaj al religio kaj superstiĉo.

Teorie ne devus esti malfacile al ĉiopova Dio, trovi manĝon al malsatuloj, ripari falantajn kupolojn de katedraloj aŭ kuraci kapdolorojn. Sed kiam venas okazo por tion pruvi en fakto, tiam la kristanoj ĵetas al la vento siajn teoriojn kaj agas, kiel ateistoj agas. Ili tute ne atendas, ke la Ĉiopovulo riparu kupolojn aŭ forigu kapdolorojn, ili kuras al apoteko kaj sendas homojn por ripari dian domon, sammaniere kiel estas riparataj drinkejoj. Kie estas scio, tie la religio estas senpova. Dio helpas pli, ke homo scias malmulte; kaj homoj kredas tie pli fervore, kie la nescio estas plej profunda. En teorio ĉiuj estas kristanoj, en praktiko la kristanoj estas ateistoj; tio estas, ili agas kvazaŭ Dio ne ekzistas aŭ almenaŭ kvazaŭ li ne taŭgas en aferoj. Ĉu ili povus agi alimaniere? Laŭ tio, kion ni vidis ĝis nun en la vivo, ni ne trovas ion, kion Dio faris, aŭ faras.

Ĉie ni vidas ateismon praktikata, tio estas, sana prudento aplikata al aferoj de vivo. Do, kristanoj helpas efektivigi la praktikan ateismon, nomata Socialismo, Komunismo, Anarĥiismo, Kooperativismo ktp.

El la Enketa Komisiono pri enspezo kaj elspezo de anglikana eklezio ni ĉerpas la jenajn faktojn. Hodiaŭ ekzistas 13412 paroĥoj en Anglio kun enspezo de 5490649 funtoj sterlingaj (26574741 dolaroj). Tiuj estas estrataj de 12870 vikarioj aŭ paroĥestroj, iuj havas du paroĥojn. Estas 4000 paroĥoj donantaj puran enspezon de 300 funtoj kaj malpli; 6400 kun enspezo inter 500 kaj 300 funtoj: 1700 kun enspezo inter 500 kaj 700; kaj 1100 kun pli ol 700 funtoj. Estas 4400 helppastroj, kiuj ricevas ĉiujare 946137 funtojn, donanta mezan enspezon da 225½ funtoj. El la episkopoj ok ricevas enspezojn po 5000 funtoj. Kaj tio nur por unu religia organizaĵo en la lando. Multe pli ol 15000 homoj, ne farantaj utilan aŭ produktan laboron, suĉas el la komunumo multe pli ol kvin kaj duono milionoj da funtoj. Ĉu oni povas forgesi, ke kristanoj ekzistas?



# Malhonoraj faroj

Malbonaj faroj de niaj kontraŭuloj en la pasinteco estas pli malpli konataj. Se oni diskutas pri tio kun kredanto, oni ricevas respondon, ke hodiaŭ ne okazas similaj aferoj. Tio ne estas vero. Ankaŭ en nuna tempo okazas malamikaj agoj de la kredantoj kontraŭ homoj liberpensaj. Nia devo estas sciigi al la liberpensa mondo tiajn malbonaĵojn, por ke ĉiu havu pruvojn el nia tempo por argumento.

Estonte ni publikigos, se eble kun bildoj, aliajn tiajn agojn de eklezianoj. Ni petas kunlaboron de ĉiuj niaj amikoj en tiu celo.

Certe ne estas danĝero hodiaŭ, ke liberpensulo veturu kun ŝarĝo da ligno en la ĉielon (aŭtodafeo). La kristana amo esprimas sin alimaniere hodiaŭ. En la bildo ĉi supre estas tombo de nekredanto Josef Mair, mortinta en aprilo 1922 en Schwaz (Ŝvaz), loko en la "Nigra Lando" — Tirolio. Tuj post la enterigo de s-ro Mair komenciĝis malrespektaj agoj. Oni forigis la emblemon de la Libera Penso, disŝiris la florojn, makulis la tombon per koto, aŭ difektis ĝin alimaniere. Por ke oni denove ne forportu la memortabulon kun liberpensa emblemo, oni metis ĉenon al la tombo. Liberpensuloj de Salzburg sciigas pri ĉi tiuj agoj de kristanoj en sia gazeto, kaj vendas foton sur poŝtkarto de tiu tombo.

*K. H.*

# Eĥo de Liberpensula Kongreso en Parizo

En nia raporto pri la supra kongreso ni ne menciis pri la ekspozicioj. Nur nia ligo ekspozis sur ĉiuj haveblaj muroj Liberpensajn gazetojn en diversaj lingvoj. En internacia lingvo estis nur nia *Liberpensulo*. La Fédération Espérantiste Ouvrière (Federacio Esperantista de Laboristoj) de Parizo aranĝis belegan ekspozicion de Esperantaj gazetoj kaj libroj. Ĉiutage kelkaj membroj de la Federacio deĵoris; ili disdonadis propagandilojn kaj faris grandan laboron. Ilin ni kore dankas pro ilia agado kaj entuziasmo. La kvanto de Liberpensaj gazetoj en germana lingvo mirigis eĉ germanojn.

Unu muro, ornamita per diverskoloraj bildoj de rusa "Bezboĵnik", estis vera bilda galerio. Baldaŭ Bezboĵnik mistere malaperis. Oni diris, ke iu maljunulo forŝiris ilin de la muro. Serĉoj ne retrovis ilin. Evidente la ruĝa inko de la bildo timigis la maljunulon. Bezbojnik ne propagandis bolŝevikismon, sed per spritaj bildoj mokis sensencaĵojn en kristanismo. Spriteco ne devus esti malŝatata de sampensulo.

# Tra la Lando de Liberpenso

"Liberpensulo" petas de siaj amikoj sciigon pri Libera Penso en la respektivaj landoj.

Malĝoje mi devas konstati, ke krom la artikolo pri la Sankta Jaro, la patrio de Galilei kaj Giordano Bruno neniam estas eĉ nomata en nia gazeto.

Mi serĉas "La Ragione" (elp. Raĝjone — Racio) en la Bibliografio, vane. Mi serĉas landreprezentanton de Italio, vane. Mi serĉas almenaŭ unu sciigon pri Italio, vane.

Sed tuj sincere mi pensas, kion mi raportu al la gazeto? Verŝajne, kamaradoj scias, ke la ĵus pasinta Internacia Kongreso de Liberpensuloj devis okazi ne en Parizo, sed en Romo.

En Romo dum la sankta jaro, ĉu!?... Kia stranga elpensaĵo, he? Sed tio, ja, tute ne estis laŭ plaĉo al nia papo. La reakcia registaro de ĉi tiea feliĉa duoninsulo estis en harmonio kun lia papa moŝto pri tiu punkto. Tuj tiom da malhelpoj la registaro starigis al Kongreso, kaj, konsiderante la kutimajn metodojn

de faŝistoj, la romaj liberpensuloj ne kuraĝis preni sur sin la organizadon de la kongreso, nek povis rekomendi Romon al ĉiulandaj kamaradoj.

Inter la plej mallaŭdintaj perfortaĵoj mi citu la detruon de la sidejo de la Asocio Giordano Bruno. En la vojo nomata Porta Angelica (elp. Anĝélika) oni vidas nun tabulojn, kiuj kaŝas de la preterpasantoj amason da ruboj. Tie staris, kontraŭ la Vatikano, nia asocio, kaj tiuj ruboj estas ĉio, kio restas de ĝia ejo. Mi devis iri al Porta Angelica kaj penis en la ĉirkaŭaĵoj eltrovi la adreson de sekretario, vane. Regis ĉie konspiro de la silento. Post multaj klopodoj kamarado loĝanta en alia urbo donis al mi necesan adreson. Mi skribis, vane. Per vortoj de la poeto Metastase, mi devas diri, ke la itala liberpensa movado

estas kiel fenikso araba;
ke ie ĝi estas diras ĉiu,
kie ĝi estas scias neniu.

Dornaj tempoj!

Ĉi tiuj ne estas oficialaj sciigoj, sed nur impresoj de roma liberpensulino. La fakto estas kiel dirigitaj. Tamen ni restu kuraĝaj.

Kaj ni esperu, ke en ĉi tiu lando nia movado, kiel la legenda fenikso, reviviĝos el siaj cindroj. Ni esperu, ke baldaŭ en ĉiu lando leviĝos la ruĝa suno de nia idealo por lumo kontraŭ mallumo.

*Romanino.*

---

## Kunveno de Liberpensuloj ĉe la 17. Esperantista Kongreso en Ĝenevo

La 5. aŭgusto okazis kunveno de Liberpensuloj en la Komerca Lernejo, sub la prezido de nia malnova samideano Emile Gasse. Inter la ĉeestantaj gesamideanoj troviĝis: Schoofs (Belgujo), Ivan Kotov (Bulgarujo), Dora Kropp, Karl Peters, D-ro Tschirn (Ĉirn), Oskar Scheidt, Elsner (Germanujo), Ferenc Hugaj (Hungarujo), Alberto Diaz (Hispanujo), Vincze (Rumanujo), Jules Wolf (Svisujo).

S-ro Vincze proponis, ke ĉe la venonta Esperantista Kongreso okazu liberpensa soleno dimance. Akceptita. S-ro Gasse (Francujo) esprimis la deziron, ke oni aranĝu la horon por ebligi al Liberpensuloj aŭskulti al tia elokventa paroladisto kia la franciskano Carolfi aŭ simila talentulo.

Poste Germanoj sciigas, ke la venontan jaron el Liber-Pensa medio sin montros nova oratoro al la Esperantistaro en la persono de D-ro Ĉirn. Post diskuto pri konstantaj servoj ĉiudimanĉe, oni decidas, ke tio estas afero de moroj kaj kutimoj de apartaj popoloj, eble bonaj en Germanujo, kie oni ĉion faras serioze, sed ĉe popoloj tiel neseriozaj kiel la Hungaroj kaj Francoj, tiuj ŝajnus ridinda imito de la antaŭa religio.

Franco atentigas, ke en la Popolaj Universitatoj, oni dum tuta semajno laboras en spirito de Libera Penso kaj klerigo de la amaso. Germana samideano konfesas, ke li eksiĝis el Liberpensa societo pro tio, ke oni tie mokadas la kontraŭulojn, kion li malaprobas. Oni atentigas, ke li estas duoble malprava:

1. ĉar nenia societo povas ekzisti, se oni ne submetiĝas al la decidoj de la plimulto;
2. li estas tro skrupula.

Pastroj, speciale la jezuitoj, uzis ĉiujn batalilojn. . . . ekzemple: la falsan rakonton pri la lastaj momentoj de Voltaire. Ankaŭ la pastroj en ĉiuj landoj daŭre prezentas Francujon kiel kadukan nacion malgraŭ la fakto, ke dum 11 jaroj la Francoj travivis kun nobla konduto terurajn krizojn, kian konduton ĉiu pia nacio povus envii.

La kongresanoj el diversaj landoj parolis pri la stato de Libera Penso en sia lando: S-ro Kotov diras, ke en Bulgarujo la Liberpensuloj estas tiom persekutataj kiom la Komunistoj. En Hungarujo, diras S-ro Hugaj, instruistoj kaj profesoroj estas devigitaj forlasi la lernejojn. En Italujo, malgraŭ la diktatoreco, li surprize konstatis, ke ekskomunigita pastro oficiale instruas en Romo la Historion de la Religioj. Laikaj ŝtataj lernejoj ŝajne ekzistas nur en Francujo.

S-ro Peters sciigas, ke ĉeestanta D-ro Ĉirn, liberpensa pastro, instruas la Liberpenson en Stettin al 700 infanoj. En Wiesbaden la patro de D-ro Ĉirn faras same.

La kunveno esprimas la deziron:

1. ke ĉiu ĉeestanto aniĝu al la Internacia Ligo de Liberpensuloj,
2. ke ĉiu en sia lando daŭrigu energian bataladon por la laikeco en la lernejoj kaj en la ŝtato.

---

## La malriĉa knabineto

de *Kastelano*

Vidu do la knabineton
Kun malgrasa la vizaĝ'
Kiu diras almozpeton,
Mallaŭtvoĉe sen kuraĝ'
La vestaĵo estas trua
La vizaĝo estas blua
Pro malvarmo kaj malsat'.

Al mi diru: kial estas
Do vi sola sur la strat'?
Kie via patrin' restas?
Kial estas la malsat'?
Ĉu vi havas familion?
Ĉu vi amas karan Dion?
Li volonte helpas vin.

Mi nur la patrinon havas,
Nin mizere nutras ŝi;
Ŝi la tutan tagon lavas . . .
Patro mortis pro patri' . . .
Kara dio min forgesis'
Li ne plu sin interesis
Pri mi jen en la mizer'.

## La I. okcidentbohema Esperantotago

okazis la 5.—6. septembro 1925 en Meierhofen dum kiu S-ro Franz Bouschek, Meierhofen, faris referaton "Esperanto kaj la liberpensuloj".

---

## Bibliografio de Internacia Liberpensula Gazetaro

(Daŭrigo. Vidu ankaŭ n-roj 1 kaj 3.)

### Aŭstrio

*Gottlose Jugend* (Sendia Junularo). Batalorgano de la Vienaj liberpensaj Junularogrupoj. Fondita 1925. Germana. Monata. Administracio: Kurt Raff, Wien IX, Porzellangasse 22.

### Germanio

*Der Freidenker* (La Liberpensulo) Centra organo de la unuiĝo de Liberpensuloj por kremacio. Fondita 1925. Germana. Monata. Redaktejo kaj eldonejo: Berlin NO 18, Friedenstr. 60.

*Der Freidenker* und *Neues Leben* (La Liberpensulo kaj Nova Vivo). Revuo de la proletaria Laborkumunumo de la germanaj liberpensaj societoj. Fonditaj 1921. Germana. Monata. Administracio: Essen, Steelerstr. 17.

### Sovet-Unio

*Ateist* (Sendiulo) 1925. Rusa. Monata. Eldonejo: Moskvo, Granatnij per., dom 1.

*Bezvirnik* (Sendiulo) 1925. Ukraina. Monata. Eldonejo: Ĥarkov, Bul. Libkneĥta 64.

### Libroj ricevitaj

"*Kurseto pri persona Magnetismo*" de Blankbarbulo. Bonega 20 paĝa broŝureto, kiu instruas, kiel regi siajn impulsojn, iĝi forta korpe kaj mense. Studinda de ĉiu. Prezo 1 fr. fr. ĉe S-ro Marcel Boubou, 96, rue St. Marceaŭ, Orleans (Loiret), Francio.

---

## *Atentu!*

*La kotizo por nia Ligo estas por 1926 laŭplaĉa sed minimuma gm. 2.— aŭ sama valoro. "Liberpensulo" aperos sesfoje kaj ĉiu kajero ampleksos minimume ok paĝojn. Ĉiu membro havas la rajton publikigi trilinian anoncon jare, tute senpage. Se ni ricevos vian kotizon ĝis fino de januaro, vi ricevos Esperantaĵon. En tiu numero vi trovos vian membrokarton. La ricevo de la membrokarto estas pruvo, ke vi pagis la kotizon 1925. Skribu sur la unuan paĝon de la membrokarto vian precizan adreson. Sur paĝoj 2 kaj 3 gluu poste la statutojn.*

## Landreprezentantoj

Anglio: S-ino Sujadinova-Yelland, 3 Fonthill Road London N 4.
Aŭstralio: S-ro Victor Rutland, 316 Riley Street, Surry Hills, Sidney.
Belgio: H. van doninck, St. Michielskaai 12, Antwerpen.
Francio: Emil Gasse, 15 place Gambetta, Le Havre
Ĉeĥoslovakio: S-ro Theodor Kilian, Jiráskova 317, Dolni Kounice.
Germanio: vidu Estraro (unua paĝo)
Hungario: S-ro Hugai Ferenc, Gyöngyös.
Japanio: Joski H. Ishiguro, Koojimachi P. O. Box 1, Tokio.
Jugoslavio: S-ro Paskal Bogdanoviĉ, Komixa-Vis.
Nederlando: vidu Estraro. (unua paĝo)
Polio: Jan Zawada, ul. Kröla Lesczerynskiego 36 m. 2, Lublin.
Rusio: H. Frank, Leningrad Gubkom Esperantistov, 3-aja Sovetskaja n-o 2 I.kv. 25.
Skotlando: Thomas Crawford, Kelvinhaugstr. 24, Glasgow.
Usono: S-ro Karl Fröding, 419, 7 th. st., Rockford, Ill

La landreprezentantoj prizorgos la aferojn en sia lando. Ili estas ankaŭ rajtigataj alpreni kotizojn.

## *Atentu*

*la prospekton de la eldonejo RUDOLF MOSSE, BERLIN enmetita en ĉi numero.*

### Pagu

vian kotizaĵon. Pro la malbona financa situacio de la ligo ni baldaŭ estas devigataj rezigni je nia gazeto. Granda parto da membroj ĝis nun ne pagis. Insiste ni petas, sendi tuj monon, aŭ vi estas helpanto de la kontraŭuloj, kiuj certe triumfus se nia gazeto malaperus. Do pagu per via landreprezentanto aŭ rekte al la sekretariejo. Germanoj pagu al **Kurt Hubricht, Leipzig-Neustadt**, poŝtĉekkonto Leipzig 43 808.


### GAZETO "QUEEN SILVER"

Kiu scias anglan lingvon devas vidi specimenon de supra gazeto, eldonata de 14 jara knabino, unu el plej interesaj kaj instruaj liberpensaj gazetoj.

Sendu 1/4 Dolaro por specimeno al:

**QUEEN SILVER, R 4, BOX 567, INGLEWOOD, KALIFORNIO.**

Germanoj mendu ĉe:

**KURT HUBRICHT, MARIANNENSTRASSE 22, LEIPZIG-NEUSTADT.**

## Libera Laboristo

**Oficiala organo de la antiaŭtoritataj Esperantistoj** (TLES)

**Plej leginda, ĉar plej riĉenhava sociologia esperanta revuo**

Dumonata, 16 paĝa

Aponprezo por ses numeroj 5 aŭstraj ŝil., 42 britaj pencoj, 3.25 germ. mk., 4 svisaj fr., 1 usona dolaro aŭ egalvaloro en nacia mono. — Specimena numero havebla nur kontraŭ antaŭpago de koncerna ono de la abonprezo.

Abonantoj de 1926a jaro, kies abonmonon ni ricevos ĝis la 15a de decembro, ricevos krom la 6 numeroj aperontaj dum 1926 ankaŭ la unuajn 3 n-rojn de la jaro 1925 laŭ sufiĉo de nia provizo je ĉi numeroj.

### Eldona Komisiono de TLES

**Artur Bolle, Berlin IV, N 58**

Tresckowstr. 58

Poŝtĉeka kto. Berlin n-ro 40266

Ĉiu militkontraŭulo legu:

**Bruno Vogel**

## Vivu la milito

(germanlingve)

.... Kiu legis la libron kaj ankoraŭ vokas "Vivu la milito" estas hundo aŭ estas destinita al mortigado. Kun bruta malkaŝeco ni vidas la tiel nomatan militistan edukadon, kiu sin tre bone montras ĉe la punekzercado kaj kiam la soldatoj atendis en la bordeloj.

Prezo: broŝurita gm. 1.50

☼

### Ĉia en-kaj eksterlanda Literaturo

speziale: Liberpensa, socialista, komunista, kaj esperanta estas liverata plej rapide [poŝtelspezoj ne estas kalkulataj]

☼

Ĉiu Esperantisto devas legi

### Kion vualas la Biblio?

nun presita broŝure.

Prezo: 15 pfenigoj, Angle 2 d., France 1 fr. kaj aliaj landoj samvalore.

Havebla ĉe:

**Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, Leipzig-Neustadt.**

### PROPAGANDA KOMITATO por l' Idealo Supranacia

Starigita estas **"Propaganda Komitato por l' Idealo Supranacia"**, kies anoj aprobas la ideojn de l' filozofo H.-L. Follin, kaj intencas disvastigi tiujn ideojn sur skalo universala. Tiu Komitato konsistas el naŭ membroj; ĝin prezidas s-ro Armand Carpentier; ĉiuj niaj amikoj scias lian sindonemon por universalismo.

*PROGRAMO*

La Komitato intencas propagandi grandskale per flugfolioj, broŝuroj, aperigo de artikoloj en jurnaloj kaj revuoj; per kontraŭdiraj konferencoj, per delegitaroj al la naciaj kaj internaciaj kongresoj paco-amantaj.

Ĝi speciale alvokas la penseman junularon, kiu en la kaoso nuna, serĉas la plej trafajn rimedojn por efektivigi siajn ideojn pri paco kaj libereco.

**

La Propaganda Komitato esperas, ke ĝin helpos en sia agado ĉiuj bonvoluloj; kiuj serĉas en la nokto kie nune dronas la penso, la verecekbrilon kondukonta la homaron je sia liberigo kompleta.

**

La Komitato-Sekretariinon oni povas viziti, kondiĉe ke oni antaŭe konigu al ŝi vizit-tagon kaj horon. Por pliaj detaloj, skribi al ŝi, 23, rue la Boëtie, PARIS (VIII°)

## NOVAJ TEMPOJ

Internacia pedagogia revuo por la nova lernejo

Oficiala organo de TAGE

Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistoj

Demandojn kaj abonon sendu al:

**M. Goldberg, Klemmstr. 14 p., Leipzig - Connewitz (Germanio).**


Ĉiu liberpensula organizaĵo kaj ĉiu liberpensulo, uzu la servojn de nia "Internacia Ligo de Liberpensuloj".

Ĉiujn liberpensajn gazetojn mendu ĉe ni. Tiamaniere vi ŝparas monon por poŝtelspezoj kaj vi subtenas nian movadon.

### Mendu la kolekton de liberpensaj gazetoj

(ĉirkaŭ 35 diversaj gazetoj).

Havebla ĉe la Ligo. Prezo: Por Germanio kaj Aŭstrio gm. 4.—, aliaj landoj gm. 5.— Poŝtelspezoj ne estas kalkulataj

Eldonejo: Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, Leipzig-Neustadt (Germanio). — Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio.)

Wiener
Einbandkunst